

R U S I A E S P E R A N T I S T A U N I O
ĈEFA ATESTA KAJ LINGVA KOMISIONO

Nikolao Gudskov

EPITOMO
de
ESPERANTOLOGIO

INTERLINGVISTIKO
HISTORIO
IDEOLOGIO
KULTURO
MOVADO
INSTRUADO

Helpilo por prepariĝo al la ĈALK-ekzameno

REU – IMPETO
Moskvo-2002

ББК 81. 8
Г 93

Николай Львович Гудсков
Конспект эсперантологии
На языке Эсперанто

Гудсков Н. Л.
Г 93 **Eritomo de esperantologio.** / Конспект эсперантологии. На языке Эсперанто. – Москва: РоСЭ / «Импэто», 2001. – 132 стр.
ISBN

Краткий очерк основных тем, которые необходимо знать для успешной сдачи экзамена на право преподавания международного языка эсперанто: интерлингвистика, история и организация движения эсперантистов, литература и культура (театр, кино, музыка, периодические издания и т.п.) на Эсперанто, методика преподавания.

ISBN

© Rusia Esperantista Unio, 2002

Изд. лиц. № 061863 от 19. 12. 1997.

Подписано в печать 10. 06. 2002

Тираж 300 экз.

Издательство «Импэто», 119048, Москва, аб. ящ. 428

Enhavtabelo

Enkonduko	4
I. Interlingvistiko	6
II. Historio de Esperanto	11
III. Ideologio de Esperanto-komunumo	20
IV. Historio de literaturo kaj kulturo en Esperanto	25
V. Gazetaro kaj libroeldonado	52
VI. Organizoj	67
VII. Aranĝoj kaj renkontiĝoj	76
VIII. Esperanto-centroj	80
IX. Instruado de Esperanto	81
Suplemento I. Historiaj listoj de E-kongresoj kaj kelkaj tradiciaj aranĝoj	92
Suplemento II. Gravaj dokumentoj pri esperantismo	102
Nomindekso	122

Enkonduko

Ekzistas grava manko pri sistemaj materialoj, ebligantaj prepariĝi al B-kaj C-nivelaj ĈALK-ekzamenoj. Certe, plej bonus havi por tio ampleksan lernolibron, donantan la tutan materialon en kiel eble plena formo, kaj verkitan en vigla kaj interesa stilo. Tamen, preparo de tia libro estas komplika tasko, postulanta longan tempon, kaj grandajn eldonklopodojn kaj elspezojn, sed la bezono de iu helpilo por ekzamenoj postulas trovi iun pli facilan solvon. Tial ni decidis rapide aperigi tiun ĉi mallongan broŝuron, kiu estas ne pli ol epitomo (resuma kompendio, superrigardo) de ĉiuj temoj – tamen, epitomo, permesanta jam prepariĝi al la ekzamenoj.

Por dezirantaj fari B-nivelan ekzamenon la broŝuro, se alproprigi ĝian enhavon plene, donas fakte preskaŭ ĉiujn bezonatajn sciojn; ĝenerale la materialoj multe superas la B-nivelajn postulojn. Tamen la ekzameno devas ankaŭ memori, ke instruisto de Esperanto devas regule legi librojn, kaj tiun fakton oni dum la ekzameno ankaŭ kontrolas.

Por dezirantoj fari C-nivelan ekzamenon la broŝuro donas la ĉefan fadenon, kiu helpas al ĝi prepariĝi. Sed por fari la elzamenon bone, nepre necesas legi ankaŭ aliajn librojn – kiajn, oni povas ekscii el la broŝuro.

La broŝuro estas nur konciza kompendio, kaj pro tio ĝia stilo, konforme al la elektita ĝenro, estas tre seka. Tial ĝi ne povas esti interesa legaĵo, pro kio la aŭtoro petas pardonon – sed ja lia celo estas iom alia.

Krom helpi al ekzamenoj, la “Epitomo” povas esti utila ankaŭ al tiuj, kiuj propagandas nian lingvon, ĉar el ĝi eblas rapide ĉerpi gravajn faktojn kaj argumentojn. Por simplaj scivolemuloj la libreto povas esti gvidilo por elekti taŭgajn legaĵojn.

En la tuta teksto estas uzataj landonomoj, unuecigitaj laŭ principo, aplikata en la revuo “Eventoj” (la plej sinsekva kaj logika el ĉiuj ĝis nun ekzistantaj). Bedaŭrinde, apliki simile sinsekvan sistemon pri nomoj de la homoj kaj eĉ de la urboj ne ĉiam eblas, des pli ke la nuna tendenco estas ĉiam skribi la nomojn laŭ la nacia maniero. Tamen, espereble, tiu tendenco, kiu faras Esperanton parte nelegebla, kaj enkondukanta en nian lingvon aregon da literoj, kiujn oni ne scias kiel prononci, iam finiĝos kaj la lingvo restarigos sian koherecon – sed en la nuna eldono estas uzata provizora kompromisa sistemo (fakte, manko de iu sistemo!).

Mi penis, ke la tuta materialo estu prezentata kiel eble plej ekvilibre kaj objektivite reflektu ĉiujn demandojn. Tamen, oni riproĉis kelkfoje, ke en la “Epitomo” estas tro da miaj subjektivaj pritaksoj – nu, plena objektiveco ĝenerale ne eblas. Des pli la korektoj, kiujn oni proponis favore al pli “neŭtrala kaj objektiva” karaktero de la libreto (redukti ĝis minimumo

menciojn pri certaj organizoj, personoj ktp.) mem dependis de subjektiva opinio de tiuj, kiuj proponis la korektojn, kaj de ties ideologiaj preferoj. Do, se mi kun ili konsentus, la subjektiva karaktero de la libro rezulte nemalkreskus aŭ eĉ kreskus.

La kompilinto esprimas dankon al Viktoro Aroloviĉ, Boris Kolker, Valentin Melnikov, Vladimir Samodaj, Anatolo Gonĉarov, Andreo Peĉonkin, kiuj atente legis la preparitajn materialojn kaj per gravaj kritikoj kaj rimarkoj, helpo pri fontoj kaj signifaj aldonoj multe kontribuis al mia laboro, kaj al kiuj la libreto ŝuldas pro ĉiuj siaj pozitivaj flankoj. Speciale la aŭtoro dankas al Sten Johansson, kies helpo estis aparte granda, kaj Irina Gonĉarova, kiu fakte kunaŭtoris la sekcion pri instru-metodiko. Tamen, ĉar ne ĉiujn iliajn konsilojn mi sekvis, ĉiuj de “Epitomo” mankoj devenas nur de mi.

Nikolao Gudskov

I. Interlingvistiko

1. Klasifiko de planlingvoj

Planlingvoj estas lingvoj, speciale kreitaj por la celo de internacia komunikado¹, kaj uzataj aŭ uzitaj por tiu celo en certa komunumo. Lingvosistemoj, ellaboritaj por komunikado, sed neniam realiĝintaj en iom signifa komunumo, estas nur *lingvoprojektoj*. Ĉiuj planlingvoj (kaj projektoj) estas dividataj je pazigrafioj kaj pazilalioj.

Pazigrafioj estas uzataj nur por skriba-lega interkomunikado. Ili prezentas nociojn per simboloj, aŭ kodoj de ideoj, iom similaj al ideogramoj de antikvaj skribsistemoj (tamen pli logike aranĝitaj). Tiaj projektoj ekzistis ĉefe en la 17-18-jc. Nuntempe elementoj de pazigrafioj estas vaste uzataj por limigitaj celoj, ekz. vojsignoj. Planlingvoj, destinitaj ankaŭ al la buŝa interparolado (t. e., propre lingvoj), nomiĝas *pazilalioj*.

Ĉiujn planlingvojn, laŭ la principo de la konstruo, eblas klasigi je aprioraj kaj aposterioraj. *Aprioraj* lingvoj ne havas radikojn en la etnaj lingvoj, sed uzas elpensitajn leksikajn kaj gramatikajn elementojn. Ili, siavice, povas esti *filozofiaj* (konstruitaj sur strikte logika klasigo de nocioj por tiel helpi al “perfekta” esprimo de la pensoj) kaj *empiriaj*, strebantaj nur al facila komunikado. *Aposterioraj* lingvoj estas bazataj sur modelo kaj elementoj de etnaj lingvoj. Ili povas esti *naturalismaj* (se ili fidele sekvas la modelon, kiel Occidental kaj Interlingua) kaj *aŭtonomaj*, aŭ *skemismaj*, se ili havas proprajn (aŭtonomajn) regulojn kaj leĝojn, kiel Esperanto kaj Ido. Ekzistas ankaŭ *miksita* lingvoj, en kiuj trajtoj de la aprioraj lingvoj estas kombinitaj kun elementoj, pruntitaj el etnaj lingvoj (ekz., Volapük).

Pri ellaboro de la teorio de la planlingvoj kaj pri kreo de konkretaj lingvoprojektoj okupiĝis tiaj grandaj sciencistoj, kiel R. Descartes (Kartezio), J. A. Komenský (Komenio), G. W. Leibniz, I. Newton kaj aliaj granduloj de la 17-a-18-a jc. Inter grandaj lingvistoj, serioze konsiderintaj kaj kontribuintaj teorion de la planlingvoj, necesas nomi F. de Saussure (informoj de lia frato-esperantologo René inspiris lin ellabori principojn de la struktura lingvistiko), I. A. Baudouin de Courtenay, A. Meillet, E. Sapir, A. Martinet kaj U. Eco.

2. Ĉefaj planlingvoj

El pli ol 1000 planlingvaj projektoj realiĝis kiel lingvoj nur kvin (Volapük, Esperanto, Ido, Occidental, Interlingua), t. e. ili fariĝis komunikiloj por iom signifaj homaj kolektivoj. El ili nun restas tri. Ankorau

¹ Tre malofte la celo povas esti ankaŭ alia: ekz., por ellabori kaŝkomunikilon ks.

kvar projektoj fariĝis interkomunikiloj por limigitaj grupoj (Idiom Neutral, Latino-sine-flexione, Reform Neutral, Novial — el kiuj neniu plu funkcias). Ĉiuj ceteraj restis nur projektoj.

a) **Volapük.** La projekto de germana katolika pastro-poligloto Johann Martin Schleyer (1831-1912) estis proklamita en 1879 kaj publikigita en 1880. La vortaro estis prenita el etnaj lingvoj, ĉefe la angla, sed la vortoj estis “simpligitaj” ĝis nerekoneblo (ekz., “por faciligi prononcon por ĉinoj kaj infanoj”, estis plene eliminata la sono “r”). Rezulte la lingvo – kvankam aposteriora laŭ sia ideo – tamen aspektas apriora (tial ĝi apartenas al la miksitaj tipo): ekz., mem la vorto “Volapük” devenas de la angla “world speak” – “monda parolo”. La vortfarado estas laŭ la aglutina tipo, kun abunda sistemo de afiksoj, per kiuj eblas formi tre diversajn vortojn kun nuancoj, kiuj ekzistas en neniu nacia lingvo. Sed samtempe tio faris la lingvon sufiĉe komplika. Dum kelkaj jaroj la lingvo disvastiĝis en multaj landoj, kaj fine de 1880-aj la nombro de volapukistoj atingis kelkcent mil (laŭ aserto de volapukistoj – eĉ kelkajn milionojn). Samtempe aperadis ĝis 124 volapukistaj periodaĵoj. Okazis 3 internaciaj kongresoj de volapukistoj (1884 – en Fridriehshafen, 1887 — en Munkeno, 1889 – en Parizo), tamen, pro malfacileco de la lingvo, nur en la lasta oni parolis volapuke. Malfacileco de la lingvo elvokis strebon reformi ĝin, kion draste kontraŭis ties aŭtoro. En la 2-a kongreso aperis Akademio (*Kadem*) de Volapük, kiu ne obeis al Schleyer. Rezultis skismo, kaj Akademio de Volapük komencis lingvajn reformojn kaj poste eĉ ellabori alian, aposterioran, lingvon; parto de volapukistoj aliĝis al Esperanto (ekz., sub influo de L. Einstein la tuta Nurenberga societo), kaj aliaj simple senreviĝis pri la internacilingva ideo. Tial post 1889 la movado komencis malkreski, kaj en 1912 fermiĝis la lasta societo de volapukistoj. En 1930-aj estis provoj renaski simpligitan varianton de la lingvo, tamen sen granda sukceso.

b) **Idiom-Neutral.** Akademio de Volapük en 1892-98 sub gvido de peterburga inĝeniero W. Rosenberger ellaboris novan lingvon, kiu ekde 1898 fariĝis oficiala lingvo de la akademio. En 1902-1906 estis ioma propagando de ĝi. De Volapuko la projekto konservis nur simplecon de la gramatiko kaj aglutinan karakteron, ĝi sekvis principon de leksika internaciismo kaj grado de aŭtonomeco estis malplia ol en Esperanto; la lingvo estis konstante reformata. Reguligante la lingvo-evoluon per limigata kolektivo, la Akademio eliminis la eblon de normala lingva evoluo, do, la lingvo dependis de siaj aŭtoroj, kaj praktike estis uzata inter la akdemianoj mem kaj gvidataj de ili societoj. Krome, kvankam la projekto povus havi iun estonton, Esperanto jam kontentigis bezonon pri internacia lingvo, kaj plejmulto de nekontentuloj transiris al Ido. Post 1908 la lingvo ne plu disvastiĝis, kaj Rosenberger en 1909 ellaboris novan projekton (plene naturalisman) –

Reform-Neutral, kiun posedis malgranda grupo ĉirkaŭ li kaj kiun li propagandis ĝis la unua mondmilito.

c) **Ido**. Ido estas reformita Esperanto (kion aludas la nomo de la lingvo), aperinta surbaze de la projekto de L. de Beaufront (eble, kun partopreno de L. Couturat) en 1907-1908. La adeptoj de Ido asertis, ke ĝi estas pli logika kaj pli internacia ol Esperanto (en ĝia alfabeto ne estas supersignitaj literoj, en la leksikono estas pli da latindevenaj radikoj ktp.). Akuzativo estas aplikata nur fakultative, pluralo estas indikata per ŝanĝo de la finaĵo “-o” je “-i”, adjektivo ne estas akordigata kun substantivo, regula tabelo de korelativoj ne ekzistas, sufiksoj kaj prefiksoj estas pli abundaj ol en Esperanto, sed ne povas esti uzataj kiel mestaraj radikoj (kiel en la veraj aglutinaj lingvoj). Eble, Ido estas vere iom pli logika ol Esperanto (kvankam pli profunda analizo tion ne montras), sed ja ankaŭ iom pli komplika por lernado. Do, Ido estas, same kiel Esperanto, aposteriora aŭtonoma lingvo, sed iom pli naturalisma. La aŭtoroj de Ido proklamis specialajn periodojn de reformoj, dum kiuj, post stabila periodo, la lingvo devas esti reformata laŭbezone – do, la idistoj devis denove lerni sian lingvon. Krome, komence la idistoj parolis pri sia lingvo nur kiel pri helpa lingvo, kaj ne favoris al apero de Ido-beletro (tradukita kaj des pli originala). Kvankam poste Ido-kulturo aperis, la lingvo rapide postrestis Esperanton tiurilate. Al Ido aliĝis malpli ol 10% de la tiamaj esperantistoj, sed eĉ tio konsistigis multnombrajn kaj potencajn movadon. En 1920-aj Ido-movado kreskis, sed reforma periodo fine de 1920-aj forpuŝis de ĝi multajn adeptojn (ja fakte necesis denove kvazaŭ relerni la lingvon.). Sekve de tio, ekde la 1930-aj jaroj la Ido-movado stagnas, kvankam ĝis nun aperas en la lingvo du-tri periodaĵoj (la ĉefa estas la revuo “Progreso”), kaj en kelkaj landoj ekzistas malmultnombraj idistaj grupoj. Tutmondaj Kongresoj de idistoj kolektas averaĝe po 15 partoprenantoj.

ĉ) **Occidental**. La projekto aperis en 1922. La aŭtoro estis Edgar von (de) Wahl (1867-1948), iama pionira esperantisto (en 1889 tradukis al Esperanto “Princino Mary” de M. Lermontov). La lingvo estas naturalisma kaj sekvas ĉefe latinidajn modelojn, pruntante plurajn ties mallogikajojn (ekz., diversajn sonojn de la sama litero depende de la pozicio). La eŭropecan karakteron de la lingvo emfazas eĉ ĝia nomo. En 1920-30-aj jaroj ekzistis certa movado por ĝi, estis eldonataj periodaĵoj, sed post la dua mondmilito plejparto de la restantaj occidentalistoj aliĝis al Interlingua.

d) **Novial**. Projekto proponita en 1928 de Otto Jespersen, en kiu li provis kombini logikecon de Ido kaj naturalismecon de Occidental. Ĝis la dua mondmilito ekzistis magrandaj grupoj de novialistoj, ĉefe en Skandiaj landoj.

e) **Interlingua-IALA**. En 1951 estis publikigita projekto Interlingua, ellaborita en kadroj de *International Auxilliary Language Association*

(ekzistinta en 1924-1953) ĉefe de usona lingvisto Alexander Gode (1900-1970). La projekto estas pure naturalisma, kaj sufiĉe proksima al Occidental. Laŭ ideo de la kreinto, tekston en Interlingua klera eŭropano (nepre konanta la latinan aŭ iun latinidan lingvon) devas kompreni tuj, sen anticipa lernado. Sed tro blinda sekvo al la modeloj de la fonto-lingvoj malhelpas, bedaŭrinde, same facile skribi kaj paroli en ĝi. Post ĝia publikigo aperis movado por enkonduko de la lingvo, plejparto de occidentalistoj kaj parto de idistoj al ĝi aliĝis. Ekde 1954 ekzistas internacia organizo por tiu lingvo (“Union Mundial pro Interlingua”), estas eldonataj kelkaj periodaĵoj. Tamen kvanto da adeptoj de Interlingua, malgraŭ bona financa subteno far iuj riĉaj adeptoj, en la tuta mondo apenaŭ superas kelkajn milojn, kaj da bonaj parolantoj estas ne pli ol kelkcent personoj.

Aldono 1: “Russki jezik” de Ju. Križanić.

Unu el fruaj aposterioraj projektoj estas tiu de kroata diplomato Juraj Križanić (1618-1683), longe loĝinta en Rusio. La projekto, kreita en 1659-61, estas ne de propre internacia lingvo, sed de la lingvo komunslava, ĉar ĝia aŭtoro strebis al unuiĝo de ĉiuj slavaj popoloj. Ĝi estis bazita ĉefe sur lingvoj rusa, serbo-kroata kaj pola kaj enhavis 59% da komunslavaj radikoj, 10% – da rusaj kaj slavonaj, 9% da serbokroataj, 2,5% da polaj ktp. La lingvo povis uzi kaj latinajn literojn, kaj la kirilajn². La sintezo estis tute sukcesa, sed neniu krom Križanić mem (en siaj verkoj) la lingvon uzis.

Aldono 2: Simpligitaj naciaj lingvoj.

Al planlingvoj proksimas projektoj de simpligitaj naciaj lingvoj, adaptitaj por pli facila internacia uzado. Fakte, tio estas aposterioraj lingvoj kun unusola fontolingvo. Plej konataj, kaj eĉ iugrade komunike realiĝintaj, estis du tiaj projektoj: “Latino sine flexione” kaj “Basic English”.

Latino sine flexione estis proponita en 1903 de G. Peano (1858-1932), fama itala matematikisto kaj logikisto. Ĝi estas la latina lingvo kun ekstreme reduktita gramatiko laŭ la principo, ke la plej bona gramatiko estas nula gramatiko: deklinacio estis anstataŭita de prepozicioj, nombro – de numeraloj ktp. En tiu lingvo estis dum kelka tempo publikigataj sciencaj tekstoj.

Basic English (=British American Scientific International Commercial English) estis proponita en 1929 de Ch. K. Ogden (1889-1957). La angla vortaro estis reduktita ĝis 850 bazaj vortoj, kaj la ceteraj nocioj estis transdonataj per vortturnoj. Ĝi estis aktive propagandata en 1930-40-aj, sed ne sukcesis enradikiĝi.

3. Esperanto kiel planlingvo

Esperanto estas aposteriora aŭtonoma lingvo. La vortaro estas bazita ĉefe surbaze de latinida leksiko kun pluraj pruntaĵoj el la helena (ĉefe internaciismoj), germana kaj angla lingvoj, ankaŭ estas certa kvanto da

² La formo “cirila”, troviĝanta en PIV, estas evidenta francismo, kaj tial evitendas.

slavdevenaj radikoj. Vortfarado estas simila al la aglutinaj lingvoj (kiel la turka, hungara, ŝahila kaj japana), t. e. per afiksoj; kvankam la fakto, ke la senŝanĝaj afiksoj povas ludi memstaran rolon de radikoj, proksimigas ĝin al izolaj (aŭ amorfaj) lingvoj, kiel la ĉina kaj vjetnama.

Esperanto estas aŭtonoma (skemeca) lingvo, ĉar ĝi obeas nur proprajn regulojn, kaj vorto pruntita de kiu ajn lingvo eniras Esperanton en esperantigita formo kaj dependas nur de la reguloj de Esperanto mem.

Esperanto estas stabila, ĉar ĝi evoluas simile kiel naciaj lingvoj, tamen surbaze de netuŝebla Fundamento, en kiu eĉ ne unu vorton nek unu komon oni rajtas ŝanĝi. Tial ĝi konservas logikecon kaj regulecon.

Esperanto ankaŭ havas iom da aprioraj elementoj, precipe la finaĵojn *-i*, *-u*, *-us*, pronomon *ĝi*, Tabelon de korelativoj (*ĝi*, tamen, estas duonapriora, ĉar sistemigas kaj vastigas rudimentajn tabelojn de naciaj lingvoj, i.a. la rusa), kaj ankaŭ kelkajn aliajn (la plej fama ekzemplo estas la radiko “*edz*”).

4. Kaŭzoj de sukceso de Esperanto kompare al aliaj planlingvoj

a) Lingvistikaj kaŭzoj

Esperanto estas facile lernebla lingvo dank’ al simpla gramatiko, internacia vortprovizo kaj reduktita pro kvanto da radikoj, dank’ al riĉa afiksa sistemo.

Esperanto estas stabila lingvo, kiu konstante evoluas surbaze de netuŝebla Fundamento. Tial, unue, la lingvo dum paso de la tempo ne fariĝas nekomprenebla, kaj, due, ne disfalas je dialektoj.

b) Sociologiaj kaŭzoj

Esperanto apartenas al sia portantaro (“popolo”), tio estas al ĉiuj esperantistoj kune, kaj ĝia sorto ne dependas de arbitra kaj subjektiva volo de apartaj personoj. Tial ajna novaĵo en la lingvo, proponita de kiu ajn, povas enradikiĝi en la lingvo nur per aprobo de la lingva komunumo entute. Tio estas la socia bazo por ke la lingvo konservu siajn kontinuecon kaj unuecon.

c) Kulturaj kaŭzoj

Esperanto de la komenco estis konsiderata ne kiel nura helplingvo, sed kiel plenvalora kultura portanto: unue, kiel kultura ponto inter diversaj popoloj kaj, due, kiel bazo por kreo de la internacia, tutmonda kulturo. Siavice, tia rilato al la internacia lingvo rapide pliriĉigis ĝin, faris ĝin pli esprimiva kaj tial pli utila ol ĉiuj rivalaj projektoj ankaŭ en simpla helpa funkcio.

Grava kultura stabiliga faktoro estas ankaŭ la ideologia karaktero de Esperanto-movado, emocia rilato de multaj esperantistoj al “sia kara lingvo”, pro kio ajna atenco al la lingvo aspektas por ili kiel iaspeca sakrilegio. Tio estis aldona kialo de fiasko de ĉiuj reformprojektoj.

II. Historio de Esperanto

1. Biografio de Zamenhof

Biografio de Zamenhof estas granda esplorterenon, sur kiu laboris pliraj esperantistoj kaj pri kiu aperis gravaj libroj; tial pri ĝi ĉi tie eblas paroli nur skize. La ĉefaj eventoj en la vivo de Zamenhof estas prezentitaj en la suba kronologia tabelo. Necesas atenti kelkajn gravajn momentojn pri la personeco de la Majstro, kiuj helpas kompreni kial li sukcesis (fakte, la sola dum la monda historio) ne nur proponi, sed ankaŭ vivi planlingvon.

1) Influo de la familio kaj ĉirkaŭaĵo. De la naskiĝo Zamenhof troviĝis sub influo de kelkaj malsamaj kulturoj kaj ideoj, kio permesis al li vidi la mondon pli vaste, ol kutime (la kulturoj rusa, en kiu edukis lin la patro kaj la gimnazio, la juda, venanta de tradiciema patrino kaj proksima ĉirkaŭaĵo, la pola, venanta el la medio; ateismo de la patro kaj pieco de la patrino, ktp.). Ĉiuj menciitaj (kaj ankaŭ ne menciitaj) influoj kontribuis evoluon de lia penso. Do, li naskiĝis en taŭga loko kaj en taŭga familio.

2) Lingvaj kapabloj kaj konoj. Sendube, kapabloj de Zamenhof pri la lingvoj estis neordinaraj. Kelkaj lingvoj estis por li fakte propraj: la rusa, germana (inkluzive la jidan kiu tiutempe estis konsiderata germana ĵargono, kaj pri kies literatura normigo Zamenhof poste laboris) kaj la pola. Parte li ŝuldas tion al la patro, fremdlingva instruisto – almenaŭ, dank’ al li Majstro bone posedis la literaturan germanan kaj francan. Li bone sciis ankaŭ la klasikajn mortajn lingvojn (latinan, grekan kaj hebrean), iom malpli bone – la anglan. Grado de scio de aliaj lingvoj estas diskutata, sed inter lingvoj, kiujn li almenaŭ iom konis, estas la itala, eklezia slava, litova. Certe, li bone konis Volapukon kaj poste – novaperantajn gravajn planlingvojn. Do, lia lingvistika bazo estis tre granda. Samtempe, bonŝance li ne fariĝis profesia lingvisto, kaj rigoraj sciencaj paradigmoj ne ĝenis liberan disvolvon de lia pensado.

3) Literatura talento. Sukceson al Zamenhof donis ankaŭ lia literatura talento, riveliĝanta en liaj verkoj. Li ja ne nur ellaboris modelan stilon en Esperanto, sed bone verkis ankaŭ en la rusa kaj aliaj lingvoj.

4) Personeco. Oni ofte emfazas modestecon de Zamenhof. Tamen tio estas troigo. Ekzemple, rifuzo pri la aŭtoraj rajtoj pri la lingvo venis de klara kompreno ke tio servas al bono por la afero. Li posedis certan karismon: liaj familianoj, inkluzive la fratojn, bopatron, gefilojn fariĝis liaj arda adeptoj (ja ne facilas fariĝi “profeto en propra lando”), kaj li povis flamigi per siaj paroladoj amasojn de esperantistoj. Li neniam rifuzis monsubtenon, se tio

helpis al la afero. Liaj konvinkoj evoluis, sed nur sub influo deinterne, deekstere devojogi lin neniam eblis.

1859 – 03(15). 12 en Bjalistoko (Bjalystok, Belostok) de Marko kaj Rozalia Zamenhof naskiĝis la filo Lazaro.

1873 – la familio Zamenhof translokiĝis al Varsovio.

1878 – kreo de Lingve Uniwersala (la unua “Praesperanto”).

1879 – aliĝo al Medicina fakultato de Moskva Universitato.

1881 – reveno al Varsovio (aliĝo al tiea universitato).

1881-87 – partopreno en fruaj cionismaj rondetoj.

1884 – renkontiĝo kun Klara Zilbernik.

Konatiĝo kun la lingvo Volapük kaj kritiko de ties koncepto.

1885 – ricevo de medicina diplomo; komenco de kuracista praktiko en Veisiejai (Litovio);
reveno al Varsovio.

1886 – studado de oftalmologio en Vieno, komenco de okulkuracista praktiko.

1887 – eldono de la Unua Libro kontraŭ doto de sia fianĉino; edziĝo al Klara Zilbernik.

1889 – komenco de redaktado de “La Esperantisto”.

1889-90 – provo eklabori en Ĥerson.

1892-94 – helpado de termezuristo W. H. Trompeter, oferinta parton de sia salajro al Zamenhof por ke li povu okupiĝi pri Esperanto.

1893 – transloĝiĝo al Grodno.

1894 – laboro pri reformo de Esperanto (proponita por la voĉdonado kaj, rezulte, neakceptita).

1894 – traduko de “Hamleto” de Ŝekspiro.

1895 – ĉeso de “La Esperantisto” pro cenzura malpermeso disvastigi ĝin en Rusio pro aperigo en ĝi de artikolo de Lev Tolstoj “Prudento kaj kredo”.

1997 – klara anonco pri definitiva ŝiro de rilatoj kun cionismo.

1898 – reveno al Varsovio.

1900 – “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia” (sub pseŭdonomo Unuel).

1901 – “Hilelismo”.

Atingo de relativa materia bonstato.

1903 – “Fundamenta Krestomatio”.

1905 – “Fundamento de Esperanto”.

Nomita kavaliro de Franca Honora Legio.

Partopreno en la 1-a Universala Kongreso en Bulonjo-sur-Maró (Francio); kongresa parolado pri unikeco kaj signifo de la kongreso kaj forpasintaj pioniroj; “Preĝo sub la Verda Standardo”.

- “Proverbaro Esperanta”.
- 1906 – Partopreno en la 2-a UK en Ĝenevo (Svisio); kongresa parolado pri la Interna ideo de Esperanto.
 “Homaranismo”.
 Komenco de eldonado de “La Revuo”, kie aperadis tradukoj de Zamenhof.
- 1907 – partopreno en la 3-a UK en Cambridge (Britio); kongresa parolado pri la esenco kaj celo de niaj kongresoj.
 Traduko de “Revizoro” de Gogol.
- 1908 – partopreno en la 4-a UK en Dresden; kongresa parolado pri la lingvaj reformoj.
 Tradukoj de “Georgo Dandin” de Molière, de “Ifigenio en Taŭrido” de Goethe, de “Rabistoj” de Schiller.
- 1908-14 – tradukado de la Biblio.
- 1909 – partopreno en la 5-a UK en Barcelono; kongresa parolado.
 Tradukoj de “Rabeno de Baĥaraĥ” de Heine, de “Gimnazio” de Aleĵhem.
- 1910 – partopreno de la 6-a UK en Vaŝingtono; kongresa parolado pri rekonfirmo de la principoj el “Esenco kaj estonteco”.
 Partopreno kaj elpaŝo (pri neceso paroli en Esperanto) en la 1-a Rusia Kongreso.
 Traduko de “Marta” de Orzeszko.
 Apero de traduko de “Batalo de l’ vivo” de Dickens (tradukita en 1891).
- 1911 – partopreno de la 7-a UK en Antverpeno; kongresa parolado pri organizaj problemoj de esperantista komunumo.
- 1912 – partopreno de la 8-a UK en Krakovo; la lasta kongresa parolado, en kiu li plene rezignis de ĉiuj rajtoj je Esperanto kaj oficiala rolo en la movado.
 1-a eldono de “Lingvaj respondoj”.
- 1912-14 – nesukcesaj provoj organizi kongreson de homaranoj.
- 1913 – partopreno en la 9-a UK en Berno, la unuan fojon sen publika parolado.
- 1914 – nesukcesa vojaĝo al neokazinta pro milito 10-a UK en Parizo, komplika reveno el Kolonjo al Varsovio tra Danio, Svedio kaj Finnlando.
- 1915 – “Letero al diplomatoj”.
- 1917 – 14.04 mortis en Varsovio³; 16.04 entombigita.

³ Post la morto de Zamenhof estis eldonitaj ankaŭ 4 volumoj de «Fabeloj» de Andersen, pri kies traduko li laboris la tutan vivon.

2. Historio de Esperanto-movado

Historio de Esperanto-movado estas jam sufiĉe longa kaj riĉa, ĉiu el la eventoj, indikitaj en la suba kronologia tabelo, meritas apartan libron aŭ, almenaŭ, artikolon (kaj multaj tiaj ekzistas). Por resti en la kadroj de la ĝenerala superrigardo al tiu kronologio indas, tamen, aldoni karakterizoj de la ĉefaj periodoj de la historio.

1) La rusa periodo 1887-1895. Plejmulto de la esperantistoj troviĝis sur la teritorio de Rusia Imperio, kaj tie estis la centro de la movado, tamen necesas emfazi ankaŭ gravecon de la germanaj pioniroj en tiu periodo (ekz., Leopold Einstein kaj W. H. Trompeter). Fine de la periodo post voĉdonado en 1894 ĉesis streboj al lingvaj reformoj.

2) La franca periodo. 1895-1905. La centro de la movado translokiĝas al Francio, kie okazas grandaj propagandaj sukcesoj, aperas la unua landa asocio ktp. Gravan rolon tiutempe ludis L. de Beaufront. Ne hazarde ĝuste en Francio okazis la unua UK.

3) La internacia periodo. 1905-1914. Post la 1-a UK la movado fariĝis vere internacia, rapide disvolviĝis E-kulturo. Samtempe ekflamis Ido-krizo – la lasta serioza provo de lingvaj reformoj. Post malsukceso de serioza skismo la movado rapide disvolviĝis sur plene stabila lingva bazo, aperis internaciaj E-organizaĵoj.

4) La unua mondmilito. 1914-1919. Dum la mondmilito la movado ĝenerale stagnis. Tamen Esperanto plenumis grandajn humanajn servojn fare de UEA; pluraj personoj konatiĝis kun la lingvo memstare kaj disvastigis ĝin eĉ en militkaptitejoj, kio formis la bazon por la postmilita disfloro de la movado.

5) Disvastigo kaj progreso. 1919-1933. La movado rapidege evoluis pro, ĉefe, du faktoroj. Unue, en tiu periodo rapide kreskis ĝia aplikado kaj eĉ oficiala agnosko en diversaj fakaj kampoj (radio, komerco, turismo), malgraŭ malsukceso ĉe Ligo de Nacioj; disvolviĝis E-instruado kaj perfektigis ties metodoj. Samtempe la ĉefa kresko de esperantistaro okazis en kadroj de vigla laborista E-movado.

6) Malprogreso pro persekutoj kaj skismoj. 1933-1939. La movado ricevis gravajn batojn pro persekutoj de esperantistoj komence en hitlera Germanio, poste – en stalina Sovetio. Samtempe okazadis organiza kaj ideaj skismoj kaj en la laborista kaj en neŭtrala movadoj. Multaj atingoj de la antaŭa periodo estis perditaj. Samtempe rapide kreskis la nivelo de E-literaturo.

7) Stagno dum la dua mondmilito. 1939-1946. En tiuj jaroj la stagno estis pli serioza ol dum la unua mondmilito pro pli granda milita krueleco; eĉ en neŭtralaj landoj ne eblis organizi vere efikajn humanajn servojn.

8) Renaskiĝo kaj disvolviĝo. 1946-1969. Post la milito la nivelo de la neŭtrala movado rapide restariĝis, aparte kiam meze de la 1950-aj ĝi renaskiĝis en la Orienta Eŭropo. La laborista movado, tamen, neniam plu atingis la nivelon, kiun havis komence de la 1930-aj. UEA eĉ ricevis certan agnoskon ĉe UNESKO, tamen atingi pli grandajn sukcesojn, proksimigantajn Esperanton al la Fina venko, ne povis.

9) Serĉado de nova identeco. 1969-ĝis nun. Pro tio esperantistoj komencis serĉi novajn vojojn por sia agado. Tiu serĉado elvokis dolorajn kverelojn kaj skismojn. Aperis novaj, ofte kontrastaj ideaj fluoj, kiuj devas helpi trovi novajn agadmanierojn en la ŝanĝiĝanta mondo (de protekto de minotitataj popoloj ĝis kreo de propraj ŝtatecaj strukturoj). Tiu serĉado plu daŭras, tamen notindas, ke neniam E-kulturo evoluis tiom rapide, kiel dum lastaj du jardekoj.

1887 – 26. 07 estis ricevita cenzura permeso por disvastigi la Unuan Libron.

1888 – la Dua libro kun aldono, aliaj broŝuroj.

Nurenberga societo de volapukistoj transiras al Esperanto kaj fariĝas la unua societo de esperantistoj.

1989 – Adresaro de la unua milo de esperantistoj.

“La esperantisto”.

1894 – voĉdono pri reformoj kun la rezulto nenion ŝanĝi.

1895 – ĉeso de “Esperantisto” en Rusio.

“Lingvo Internacia”.

1898 – Unuiĝo Franca por Esperanto.

1904 – la unua internacia renkontiĝo de esperantistoj en Calais [Kale’], Francio.

1905 – 1-a UK en Bulonjo-sur-Mar (iniciatinto – A. Michaux). Bulonja Deklaracio pri Esperantismo.

Lingva Komitato.

La revuo “Esperanto”.

1906 – Centra Oficejo.

1907 – fondo de ISAE.

1907-08 – Ido-krizo.

1908 – fondo de UEA far H. Hodler kun delegita reto kaj “Esperanto” kiel ties organo.

Apero de Akademio de Esperanto en kadre de Lingva Komitato.

1914-18 – agado de UEA dum la unua mondmilito: servoj por perado de privataj informoj pri la sorto de militkaptitoj, vunditoj ktp. (ĉ. 200000 kazoj).

- 1921 – Fondo de SAT far Lanti.
 Komenco de eldonado de “Esperanto Triumfonta” far T. Jung
 (ekde 1925 ŝanĝinta la nomon al “Heroldo de Esperanto”).
- 1922 – Kontrakto de Helsinko inter UEA kaj CO pri komuna agado.
 Provo (malskcesa) ricevi oficialan agnoskon en Ligo de Nacioj.
- 1929 – fondo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno far H. Steiner.
- 1929-31 – skismo en SAT, forfalo de la sovetia esperantistaro el SAT.
- 1930 – fondo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago far A. Cseh.
- 1933 – eldono de “Enciklopedio de Esperanto”.
 Komenco de persekutoj de esperantistoj far nazioj en Germanio,
 malpermeso de la laborista E-movado.
- 1934 – eldono de Plena Vortaro.
- 1936 – skismo en la neŭtrala E-movado je UEA kaj novfondita Internacia
 Esperanto-ligo kiel federacio de landaj asocioj.
- 1937-38 – persekutoj de esperantistoj en Sovetunio, ĉeso de E-movado tie.
- 1938 – fondo de TEJO, la 1-a IJK en Groet (Nederlando).
- 1939 – plena malpermeso de E-movado en Germanio.
- 1939-45 – preskaŭa ĉeso de Esperanto-movado. En ĉiuj landoj, okupitaj de
 Germanio kaj Sovetio, malpermeso de E-movado. En Svedio
 aperadas “Malgranda Revuo”.
- 1946-49 – unuiĝo de IEL kaj UEA sub la nomo “UEA”, sed kun aliĝintaj
 landaj asocioj.
- 1950 – lanĉo de Belartaj Konkursoj de UEA.
- 1951 – Munkena Deklaracio.
- 1952 – komuna malfermita letero de UEA kaj SAT al Stalin kun akuzoj pri
 persekutoj de esperantistoj.
- 1953 – fondo de Mondpaca Esperantista Movado.
- 1954 – Montevidea Rezolucio de Unesko.
- 1958 – Eldono de “Esperanta antologio”.
- 1959 – solena festado de centjara jubileo de Zamenhof.
 Pola Radio komencis ĉiutagajn elsendojn.
- 1966 – kolektado de subskriboj por UN favore al Esperanto. Malsukceso ĉe
 UN.
- 1969 – Deklaracio de Tyresö.
- 1970 – eldono de Plena Ilustrita Vortaro.
- 1974 – eldono de “Esperanto en perspektivo”.
 Skismo dum UK en Hamburgo kaj kreo de Neŭtrala Esperanto–
 movado far I. Lapenna.
- 1980 – eldono de Plena Analiza Gramatiko.
 Nova (moderna) Statuto de UEA.
 Manifesto de Raŭmo.

- 1984 – Dua, plilarĝigita, eldono de “Esperanta antologio” (plej elstaraj originalaj poeziaj verkoj).
- 1985 – dua rezolucio de Unesko.
- 1987 – solena festado de centjarigo de Esperanto, preskaŭ 7000-persona UK en Varsovio.
- 1988 – eldono de “Trezoro” (prezento de originala prozo, aperinta dum 100 jaroj).
- 1996 – Praga Manifesto.

3. Historio de Esperanto-movado en Rusio kaj Sovetio

La movado en Rusio-Sovetunio ĝenerale evoluis simile al la tutmonda, nur iuj tendencoj riveligis, pro cirkonstancoj en la lando, pli draste, la aliaj estis ne tre rimerkeblaj. Tial la ĉefajn periodojn de ĝia historio eblas prezenti jene:

- 1) Komenca elprovado de la lingvo, formiĝo de E-komunumo. 1887-1905.
- 2) Ddisvolviĝo de la movado, eldonado, unuaj landaj kongresoj. 1905-1917.
- 3) Kresko de intereso al Esperanto kaj sporada disvastigo de ĝi dum la civila milito. 1917-1921.
- 4) Disfloro: disvastigo, instruado, aplikado de Esperanto. Viglaj kontaktoj kaj kunagado kun la internacia laborista movado. 1921-1930.
- 5) Izoliĝo de movado, kresko de limigo por la disvastigo. 1930-1938.
- 6) Pereo de la movado (kaj fizika neniigo de pluraj aktivuloj). Nur tre malofta sporada riveliĝo de hazardaj aktivecoj. 1938-1956.
- 7) Renaskiĝo de la movado, reapero de internaciaj kontaktoj, sciencaj esploroj, provoj de eldonado, enlandaj renkontiĝoj, bone organizita junulara aktivado. 1956-1979.
- 8) Plua disvastiĝo en kondiĉj de la ŝtata kontrolo. Kresko de la kvanto de la kluboj, pluraj novaj iniciatoj. 1979-1989.
- 9) Ekzisto en kondiĉoj de libereco. Drasta kresko de internaciaj kontaktoj. Profesinivela eldonado de libroj kaj revuoj. Kvanta malkresko, organizaj kaj financaj problemoj. Serĉado de novaj formoj kaj strategio de la landa movado. 1989-ĝis nun.

1888 – “La neĝa blovado” far Puŝkin tradukita de A. Grabowski fariĝis la unua aparta beletra libro en Esperanto.

1889 – el 1000 unuaj esperantistoj, kies adresoj estis publikigitaj en “Adresaro”, 911 estis loĝantoj de Rusia Imperio.

Apero de la unuaj esperantistaj societoj en Moskvo kaj Odeso.

1890 – fondo de Esperanto-societo en Ivanovo-Voznesensk

- 1892 – fondo de la unua oficiale registrita E-societo: “Espero” en Peterburgo.
- 1895 – ĉesigo de disvastigo de “Esperantisto” en Rusio.
- 1896 – la unua teatra prezento en Esperanto: “La unua brandfaristo” de Lev Tolstoj far smolenskaj esperantistoj.
- 1904 – la unua rusia E-gazeto “Espero” (3 numeroj).
- 1905-1908 – eldonado de “Ruslanda Esperantisto” (31 numeroj)
- 1908 – eldonado de “Espero”, suplemento al la ruslingva “Vestnik znanija”.
Fondo de librejo “Esperanto” en Moskvo far A. Saĥarov.
Fondo de Rusia Esperantista Ligo.
- 1909-1917 – eldonado de “La Ondo de Esperanto”.
- 1910 – 20-25. 04 en Peterburgo okazis la unua Rusia Esperantista Kongreso, kiun partoprenis Zamenhof.
Fondo de Instituto de Esperanto en Moskvo.
Fondo de Universala Ligo.
- 1911 – proceso kontraŭ A. Postnikov; kondamno pro spionado al 8 jaroj de bago. Fermo de Universala Ligo kaj de Rusia Esperantista Ligo.
- 1913 – 2-a Rusia Esperantista Kongreso, Kievo.
- 1917 – aktiva partopreno de multaj esperantistoj en revoluciaj eventoj, ĉeso de LOdE.
- 1918-21 – ofte okazanta instruado de Esperanto en Ruĝa Armeo.
- 1921 – 3-a Rusia Esperantista Kongreso, fondo de Sovetlanda Esperantista Unio.
- 1923 – la unua radioelsendo en Esperanto de Radio Kominterneta.
- 1925 – la unua sovetia E-a poŝtmarko.
- 1926 – 6-a SAT-kongreso en Leningrado.
- 1926-35 – stimulado de internacia esperantista laborista korespondado, aktiva agado de esperantaj korespondantoj, abunda publikigado en gazetaro de peresperantaj informoj.
- 1920-aj-komenco de 1930-aj – vasta instruado de Esperanto en lernejoj.
- 1930 – lasta partopreno de sovetiaj esperantistoj en SAT-kongreso; ĉesigo de oficialaj rilatoj kun SAT.
Fondo de eldonkooperativo EKRELO.
- 1933 – ĉesigo de esperantlingvaj radioelsendoj.
- 1935 – kreskanta ŝtata premo al SEU; limigoj por disvastigo de Esperanto.
- 1937 – aresto de pluraj esperantistaj aktivuloj.
- 1938 – fermo de stabejo de SEU, amasaj arestoj de esperantistoj; pluraj esperantistoj mortkondamnitaj kaj ekzekutitaj.
- 1956 – reapero de unuaj esperantistaj grupoj.
Provo restarigi SEU.
- 1957 – renkontiĝo de sovetiaj kaj eksterlandaj esperantistoj en kadroj de Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj.

- Broŝuro de N. Andreev.
- 1959 – unuaj esperantistaj tendaroj. Lanĉo de Baltaj Esperantaj Tendaroj.
- 1961 – libro de I. Sergeev.
- 1962 – Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj ĉe SSOD.
- 1963 – partopreno de sovetiaj esperantistoj en UK en Sofio (de tiu tempo – en multaj UK-oj).
- Komenco de eldonado de esperantaj broŝuroj ĉe la Komisiono.
- 1965 – Adresaro, kiel praformo de SEJM.
- 1966 – Fondo de SEJM.
- Rusa-esperanta vortaro de E. Bokarev.
- 1966-79 – agado de SEJM.
- 1967 – lanĉo de SEJT-oj.
- 1974 – Esperanto-rusa vortaro de E. Bokarev (2-a eldono – 1982).
- Apero de Problema grupo pri interlingvistiko en Instituto pri lingvoscienco.
- Eldono de lernolibro de B. Kolker en formo de “Metodikaj rekomendoj” (poste multfoje oficiale – en 1976, 1978, 1980 – kaj neoficiale reproduktata en multaj urboj).
- 1979 – fondo de ASE surbaze de la Komisiono.
- 1979-83 – eldono de 11 esperantlingvaj suplementoj al “Moscow News”.
- 1982 – 2-a Konferenco de ASE. Sukcesa “balota ribelo” de esperantistoj-delegitoj.
- Kurso de B. Kolker en “Kemio kaj vivo” (“Ĥimija i ĵiznj”).
- 1984 – lernolibro de Z. Semjonova kaj M. Isaev.
- 1986 – Internacia MEM-renkontiĝo en Volgogrado.
- 1988 – aliĝo de multaj sovetiaj esperantistoj al SAT pro falo de la 58-jara malpermeso.
- Fondo de SEJM-2.
- 1988-90 – apero de kooperativoj de Esperanto-instruistoj (“Kopso” en Moskvo, “Espero” en Leningrado), turismaj esperantistaj entreprenoj, eldonejoj (Esperanto-redakcio de “Progreso”, transformiĝonta je memstara “Impeto”, “Sezonoj”), kursoj en diversaj gazetoj (“Trezvostj i kultura”, “Tramvaj” ka.).
- Lanĉo de EoLA-j.
- 1989 – 3-a konferenco de ASE – Kongreso de restarigita SEU.
- Aliĝo de SEU al UEA.
- 1989-90 – memstariĝo de aro da respublikaj Esperanto-asocioj.
- 1990 – Unuafoja partopreno de sovetiaj SAT-anoj en SAT-kongreso (Linz, Aŭstrio) post 60-jara paŭzo.
- 1991 – kreo de REU surbaze de SEU pro la disfalo de USSR.
- 1992 – apero de REA.

Eldono de lernolibro de B. Kolker en “Nauka”.
SAT-kongreso en Kaŭno – la unua sur postsovetia teritorio post
1926 – kun abunda partopreno de rusiaj esperantistoj.
1994 – unuiĝo de REU kaj REA en REK en Niĵnij Novgorod.
1995 – IJK apud Peterburgo.
1996 – SAT-kongreso en Peterburgo.
1998 – SAT-kongreso en Odeso.
2000 – transformo de SEJM al REJM dum REK en Ĉeboksaro.
SAT-kongreso en Moskvo.

III. Ideologio de Esperanto-komunumo

1. La movado kaj komunumo. Kutime oni miksas la nociojn “E-movado” kaj “E-komunumo”. Tamen la “movado” estas strebo disvastigi la internacian lingvon, kaj al ĝi povas aparteni ankaŭ homoj, kiuj ne scias (aŭ malbone scias) la lingvon mem. Nun tio malofte okazas⁴, sed en la fruaj jaroj de la E-historio, kaj eĉ ĝis 1930-aj estas konataj kelkaj propagandantoj de E-o, kiuj mem ne estis esperantistoj. De la alia flanko, la esperantistoj, kiuj bone scias kaj uzas la lingvon por siaj celoj (Esperanto-komunumo = esperanta popolo = esperantistaro ks.), povas ne partopreni la movadon, sed simple vivi en “Esperantio”. Ekz., SAT, kiel *peresperanta* asocio (sed ne *poresperanta*) ne okupiĝas rekte pri disvastigo de E-o (do, ĝi estas nemovada organizo), sed pri tio okupiĝas kunlaborantaj kun SAT landaj laboristaj E-asocioj – LEA-oj (kiuj, do, estas movadaj organizoj). De la alia flanko, ofte oni nomas “movado” nur UEA kaj landajn asociojn⁵, kio estas nekorekte: ja, ekz., AIS San Marino, kiu distanciĝas de UEA (kaj eĉ preferas ne uzi la vorton “Esperanto”), ja okupiĝas pri disvastigo de la internacia lingvo en la sciencaj kaj universitataj medioj – sekve, ĝi estas tipa movada institucio. Do, la E-movado kaj E-komunumo estas diversaj, kvankam dense interplektitaj (ili ne povas ekzisti unu sen la alia), sociaj fenomenoj. La movado estas nepre bazita sur certa(j) ideo(j), kvankam la komunumo principe povas ekzisti aŭ sen klare formulitaj ideoj, aŭ eĉ kun la kontraŭmovadaj.

2. La Interna ideo. “Esperantan popolon” kunligas ne nur scio de Esperanto mem, sed ankaŭ la ideo pri la progres-, pac-, solidareporta rolo de la internacia lingvo. Tiu ideo nomiĝas “la Interna ideo”. Ofte oni ne

⁴ Moderna ekzemplo estas Transnacia Radikala Partio (kun centro en Italio), kiu strebas, interalie, al enkonduko de Esperanto en internaciaj organizoj, sed inter kies membroj esperantistoj tre malmultas.

⁵ Ankaŭ tiujn fakajn asociojn, kiuj disvastigas Esperanton en koncerna medio, sed ne nur aplikas la internacian lingvon por propraj celoj.

agnoskas sian apartenon la ideo, sed en alimaniere vortumita formo parolas pri la samo. Plej ĝenerale ĝin esprimas la himno esperantista “La Espero” kaj kelkaj aliaj poemoj de Zamenhof. La Interna Ideo troviĝas ankaŭ en oficialaj esperantismaj dokumentoj: en la 1-a paragrafo de la Bulonja Deklaracio – sed nur koncerne pluretnajn ŝtatojn, kaj en la 3-a paragrafo de la Munkena Deklaracio. La logika sekvo de la Interna ideo estas strebo al la Fina Venko, t. e. atingo de tutmonda praktika apliko⁶, de Esperanto. Ĝi donas certan komunan celon al ĉiuj esperantistoj, kaj unuigas la movadon por Esperanto kaj la E-komunumon. La Interna Ideo, tiel aŭ aliel esprimita, estas bazo por ĉiuj ideologiaj fluoj de esperantismo krom raŭmismo.

3. Homaranismo. En 1901 Zamenhof eldonis ruslingve broŝuron “Hilelismo kiel solvo de la hebrea demando”⁷, en kiu li kontraŭstarigis al cionismo la koncepton de universalismo surbaze de la principo “agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi” (atribuata al hebrea saĝulo de la 1-a jc. a.n.e. Hilel) kaj proponis al la hebrea popolo unuigan rolon inter diversaj landoj kun helpo de Esperanto. La principon li poste (en 1905) aplikis al ĉiuj popoloj, kaj proponis krei komunan neŭtralan religion, kiu helpos unuigi la homaron kaj kune kun neŭtrala intergenta lingvo kontribuos al pacigo de la homaro. En 1906 li donis al tiu projekto la nomon “homaranismo”. Li ne trovis multajn adeptojn pro tio tial, ke, estante edukita kiel ateisto, li ne komprenis la esencon de la interreligiaj diferencoj, kiuj baziĝas sur malsamaj nekongrueblaj dogmoj⁸; nur la ideo pri unu dio, sama por ĉiuj, por diversaj religianoj ne taŭgas, des pli la ideo pri ekzisto de ajna dio ne taŭgas por ateistoj. Tamen ĝis nun ekzistas provoj revivigi homaranismon. Fakte, homaranismo estas provo evoluigi la Internan ideon ankaŭ al la religia kampo kaj doni al ĝi certan mistikan signifon.

4. Neŭtralismo. El la fakto, ke la lingvo internacia estas nacie neŭtrala, kaj el la aserto de la Bulonja Deklaracio pri tio, ke ĉiuj politikaj, religiaj kaj ceteraj aplikoj de Esperanto estas privata afero de apartaj esperantistoj, estis farita konkludo pri tio, ke la Esperanto-movado estas principe neŭtrala kaj devas neniel ajn tuŝi politikajn, sociajn, religiajn kaj ceterajn demandojn. Sur tiaj pozicioj vivis ĉiuj plej grandaj organizoj de esperantistoj (krom SAT),

⁶ Tamen necesas kompreni, ke la Finan venkon diversaj esperantistoj komprenas diverse: por iuj ĝi signifas nur oficialan aplikadon en internaciaj rilatoj kaj instancoj, por aliaj – akcepton de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiu tutmonde, por triaj – establiĝon de la internacia lingvo kiel la sola lingvo de unuiĝinta homaro.

⁷ Pro bankroto de eldonisto la eldonkvanto ne disvastiĝis.

⁸ Eĉ kristan-ekumenisma movado estas neakceptebla en pluraj eklezioj, ekz., en la rus-ortodoksa eklezio ekumenismo estas konsiderata kiel terura herezo.

kiel UEA, ILEI, TEJO, plejparto de naciaj E-asocioj (krom la laboristaj), ekde 1905 ĝis 1970-aj jaroj; ofte tia prezento de neŭtraleco de Esperanto okazas ĝis nun. Tamen jam en 1947 en la statuto de UEA aperis mencio de la homaj rajtoj, kies aplikado estas kvankam komunhoma, tamen ne tute neŭtrala politike. Samtempe, UEA oficiale organizadas dum UK-uj kristanajn diservojn⁹, kvazaŭ agnoskante kristanisman privilegiitan ideologio! Neeble de la plena politika neŭtraleco estas pruvata ankaŭ per tio, ke la nazia reĝimo vidis eĉ la plej neŭtralajn esperantistojn siaj politikaj kontraŭuloj, kvankam por plu ekzisti ili penis plene subiĝi al la nazia reistaro (propagandis naziajn ideojn, eksigis judajn membrojn ktp.).

5. Aktiva neŭtralismo. Certa devio de la neŭtralismo estis “aktiva neŭtralismo” aŭ “humaneca internaciismo” de Ivo Lapenna, kiun li komencis evolugigi post sia kverelo kun novaj gvidantoj de UEA en 1974 en sia “Neŭtrala Esperanto-Movado” kaj la revuo “Horizonto”: li, fakte, egaligis “neŭtralecon”, “Internan ideon” kaj liberal-demokratiajn valorojn, kio, certe, estas sufiĉe aktiva politika pozicio¹⁰. La koncepto ne ricevis iom amasan subtenon, kaj post la morto de Lapenna NEM, kune kun liaj ideoj, tuj dissolviĝis.

6. Laborista esperantismo. En 1910-aj jaroj en la rondoj de esperantistoj-laboristoj aperis kompreno, ke Esperanto povas bone servi kiel materiala ilo por proleta internaciismo. Ĝi donis la solan realan eblecon al “unuigo de proletoj de ĉiuj landoj”, do, Esperanto devis servi al klasaj celoj de laboristoj. Tiu apliko de Esperanto ne estas, certe, politike neŭtrala. Sed la neŭtralan movadon ili samtempe ne konsideris vere neŭtrala: ĝia neŭtralismo permesis apliki Esperanton ne nur al scienco, medicino ks., sed ankaŭ, ekzemple, al komerco, kiu ja estas afero burĝa kaj, sekve, neneŭtrala politike ne malpli ol la laborista esperantismo. Tial neŭtralismajn asociojn, kiel UEA, oni eknomis “burĝaj”. Efektive, sinsekve supertendenca konduto de SAT faris ĝin ofte pli reale neŭtrala ol UEA, kiu en praktika vivo ne kontraŭas al

⁹ Temas ne pri fakaj kunvenoj, pri kiuj ja rajtas kiuj ajn grupoj, sed pri kultaj agoj – por iu politika grupo demonstracio dum UK kun siaj sloganoj estus nepre malpermesita...

¹⁰ Elekto inter “paco sen libero” kaj “milito por libero”, aŭ inter “morto starante” kaj “vivo sur genuoj” ktp, estas nur persona elekto laŭ tiu aŭ alia prefero de valorprioritatoj; kiu el ili estas pli “morala” estas problemo nesolvebla per diskutoj kaj ne rilatanta al apliko de Esperanto. Principe, al la Interna ideo egale respondas tutmonda apliko de Esperanto en federacio de lokaj komunumoj (anarkiisma modelo) kaj en tutmonda imperio, kun ĉiuj gradoj de la mezaj inter ili eblecoj. Vojo de efektivigo de la idealo estas ja afero de elekto aktiva, sed certe ne neŭtrala.

diversaj diktatoroj per tio subtenante ilin¹¹. Sur principoj de laborista esperantismo estis kreita kaj funkcias ĝis nun SAT. Kvankam ofte en laborist-esperantismaj verkoj estas kritiko de la Interna ideo, kiel “burĝa”, en ili samtempe temis pri la rolo de Esperanto en estonta homara unuigo, kio estas, fakte, nur alia vortumo (aŭ aspekto) de la sama nocio.

7. Sennaciismo. El kunfandiĝo de la Interna ideo kaj laborista esperantismo naskiĝis koncepto de sennaciismo, ellaborita de E. Lanti fine de la 1920-aj jaroj. Laŭ li, sennaciismo estas "kultura doktrino, kies ĉefaj celoj estas: 1) malapero de ĉiuj nacioj, rigardataj kiel sendependaj, suverenaj unuoj; 2) mondmastromado kaj racia utiligado de ĉia energio k materio profite al ĉiuj homoj de nia planedo; 3) unuecigo je ĉiuj mezuroj kaj kalkuliloj; 4) praktikado de sennacieca lingvo (Esperanto) kun la celo, ke ĝi fariĝu la sole uzata kulturlingvo. La sennaciismo signifas la venkon de l' homeco super la nacieco; ĝia realiĝo estus la triumfo en la homa cerbo de la racia tendenco super la mistike senta." La ekzisto de nacioj estas en tiu koncepto proklamata kiel plago de la homaro, kondukanta al malamo kaj militoj, kaj estonta socialisma socio (imagebla nur tutmondskale) devas reciproke asimili ilin ĉiujn. Nepra kondiĉo por malapero de la nacioj estas vasta uzado de Esperanto unuavice de laboristoj, strebantaj al klasa liberiĝo; siavice, vasta uzado de Esperanto devas helpi al sennaciigo, kaj, tial, unuiĝo de la mondo. Sennaciismo estas la plej ekstrema (kaj plene logika) evoluigo de la Interna ideo: la homaro fariĝu unusola nacio kaj parolu unusolan komunhoman lingvon. Alimaniere oni povas prezenti sennaciismon kiel “homaranismon sen ajna mistikismo”.

8. Raŭmismo. Parto de partoprenintoj de la 36-a IJK en la finna urbeto Raŭmo en 1980 subskribis la Manifeston, kiu la unuan fojon reale flankenmetis la Internan ideon de Esperanto kaj anstataŭigis ĝin per iuj aliaj pli gravaj valoroj. La ĉefa ideo de la Manifesto estas, ke la “prceloj” de esperantistaro (tutmonda akcepto de la internacia lingvo kun paciga rezulto ktp.) ne tre aktualas, sed esperantistaro kun propra kulturo jam ekzistas, kaj havas propran valoron kaj intereson. Eĉ pli: ĝi fariĝis siaspeca nova etno, dissemita tra la tuta mondo (kiel ciganoj aŭ judoj), kaj devas kondukti simile al tiaj diasporaj etnoj, defendante sian identecon kaj disvolvigante sian kulturon. Raŭmistoj, kies ĉefa ideologo estas Giorgio Silfer (fondinto kaj gvidoro de la kooperativo “Literatura Foiro”), signife malpli multas ol “finvenkistoj” (kiel ili nomas ĉiujn ceterajn esperantistojn), sed estas influaj

¹¹ En 1968 UK okazis en Madrido, kie regis faŝisma reĝimo de Franco – tion eblis konsideri agnosko de tiu reĝimo far UEA. Por laborist-esperantistaj organizoj tia “neŭtralismo” estas neakceptebla.

sur la kultura kampo: ekzemple, ili lanĉis en 1993 agadon de Esperanto PEN-centro (farinte tiel gravan servon ankaŭ por la Esperanto-movado!). En 1998 jaro surbaze de la ideoj de Silfer estis proklamita, kaj en 2001 – kreita “Esperanta civito”, kiu eĉ havas sian konstitucion, konsulon (=prezidenton). La unua konsulo estis elektita Walter Ŝelazny, senaton kaj aliajn atributojn de la ŝtato, kaj eĉ strebas fariĝi “subjekto de internacia juro”. Tio paradokse proksimigas raŭmismon kun certaj ideoj de Lanti, kiu en kadroj de sia sennaciismo revis pri io simila¹².

Aldona rimarko. En 1991 estis provo forigi kontraŭdirojn inter raŭmismo kaj tradiciaj esperantismaj konceptoj dum ILEI-konferenco en Voss (Norvegio). Tamen, “Proklamo de Voss” ne kontentigis la raŭmistojn kaj ne okazis seriozan influon al la cetera esperantistaro, por kiuj ĝiaj asertoj estis tro ordinaraj.

9. Etnodefenda esperantismo. Tute mala al sennaciismo estas la ideo, ke Esperanto, tutmonde aplikiĝinte, savos la malgrandajn kaj aliajn lingvojn kaj etnojn, kiuj malaperas pro ekstera lingvoimperisma premo. La ideo aperis jam delonge, sed fariĝis speciale populara kaj sinsekve aplikiĝas ekde 1970-aj jaroj. Ĝi estas populara en medioj de eŭropuniaj esperantistoj, strebantaj persvadi pri valoro de Esperanto eŭropajn aŭtoritatojn, kaj iel adapti esperantismon al komuneŭropa ideologio. Kun tiu ideologio estas ofte ligita la ideo pri propedeŭtika valoro de Esperanto¹³: se Esperanto helpas pli bone lerni aliajn lingvojn, ĝi kontribuas al plurlingvismo, kiu ja estas oficiala celo de EU instancoj!. Nun la ideo pri etnodefenda, propedeŭtika, diferenckonserva ks. rolo de Esperanto estas tre vaste uzata en kampanjoj por Esperanto en Eŭropa Unio.

10. Moderna socie aktiva esperantismo. En 1969 dum 25-a IJK en sveda urbo Tyresö estis akceptita Deklaracio, en kiu estas starigita la celoj: 1) pli aktive enmiksiĝi en la mondan lingvan situacion, kiu ja estas neadekvata enkadre de ĝenerala batalo por la digno de la homo kaj, eĉ, 2) lanĉi la aktivecojn kiuj celos plivastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo. Tiamaj gvidoroj de TEJO baldaŭ ekgvidis UEA, kiu ekde mezo de 1970-aj fariĝis multe pli politike engaĝita kaj maldekstra

¹² Fakte, «raŭmisma» estis jam sennacieca strukturo de UEA, kiel ĝin kreis H. Hodler en 1908 por ke esperantistoj jam apliku Esperanton por sia bono, ne atendante ĝian tutgloban agnoskon; same «raŭmisma» estis SAT, kiu celas jaman aplikadon, sed ne disvastigon de Esperanto. Senkonsciaj, «elementaj raŭmistoj» estas ĉiuj esperantistoj, kiuj ĝuas etoson de renkontiĝoj, konsumas diversajn servojn kaj tute ne pensas pri disvastigo de la lingvo, ĝia paca misio ktp.– do, partoprenas nur la komunumon, sed ne movadon.

¹³ Reale, la propedeŭtika valoro de Esperanto estas pruvita nur por sufiĉe malgrandaj infanoj. En pli ĝenerala senco ĝi estas pli afero de kredo kaj similas propagandan miton.

idee (sed, certe, ne partipolitika!). Tio eĉ elvokis malgrandan skismon en 1974 – Ivo Lapenna (kvankam siatempe li mem enkondukis mencion pri homaj rajtoj en Statuton de UEA), opiniis plian socian engaĝiĝon de la asocio “komunisma influo”. Sed la evoluo de UEA en 1970-aj-90-aj jaroj direktiĝis ne laŭ deziroj de Lapenna. Tamen ankaŭ grava socia engaĝiĝo reale ne okazis. Nur en 1992 reprezentanto de jam sekva generacio Mark Fettes verkis artikolon “Ni eniru la socian kampon”. Tiu artikolo fariĝis ideologia bazo de la Praga Manifesto, akceptita en 1996 dum 81-a UK, kaj kiun subskribis jam miloj da personoj, sed, certe, ne sennaciistoj kaj raŭmismoj.

Notindas, ke certaj ideologioj en E-komunumo aperis sub influo de eventoj en la makrosocio: la 1-a paragrafo en Bulonja Deklaracio ŝuldas al Unua Rusa revolucio, formiĝo de la laborista esperantismo – al la Dua Rusa revolucio, Deklaracio de Tyresö – al eventoj de 1968, Praga Manifesto – al falo de la Berlina muro ktp. Ligo de certaj ideoj, aperintaj en la E-komunumo, kun eventoj, okazigantaj en la “makrosocio”, estas ne ĉiam evidentaj, kaj esplori ilin estas komplika, sed tre interesa tasko.

IV. Historio de literaturo kaj kulturo en Esperanto

Periodigo. Ĝenerale, la historion de literaturo en Esperanto eblas disdividi je 5 ĉefaj periodoj: pionira (1887-1903); maturiĝa (inter 1903 kaj la unua mondmilito), profesiiĝa (inter la du mondmilitoj), matura (1945-1970) kaj moderna (de proksimume 1970 ĝis nun). Ene de la periodoj oni, de unu flanko, povas trovi certajn subperiodojn; de la alia flanko, verkoj de pluraj aŭtoroj, kreintaj dum kelkaj periodoj, povis ne multe evolui dum la tuta vivo, kaj tial malcertigi limojn inter la periodoj.

Kiam temas pri nomoj de verkistaj skoloj, devenantaj de iu nacieco aŭ loko, tio ne signifas, ke ĉiuj anoj de la skolo estas nepre samlokanoj kaj samnacionoj. Ekzemple, poezio de la svisa franco E. Privat stile kaj ideoe apartenas al la Rusa (Slava) skolo, kaj de la franco G. Waringhien – al la Budapeŝta.

Ĉie sube estas indikitaj la datoj de la unuaj eldonoj de la libroj, kvankam multaj menciitaj verkoj kaj kolektoj estis du kaj pli da fojojn reeldonitaj.

Per grasaj literoj estas indikitaj la aŭtoroj kaj librotitoloj, kiuj estas rekomendataj por unuavica legado pro ties modele alta literatura kvalito aŭ elstara histori-literatura signifo.

1. Poezio.

Esperanto, kiel ĉiu juna lingvo, komencas disvolvi siajn kreajn eblecojn de la poezio. Tial de la komenco aperadis (kaj daŭre aperadas) pli da talentaj poetoj ol prozistoj, kaj en poezia kreado la lingvo pli frue montris sian maturecon. En poezio pli rimarkeblas diversaj skoloj, ol en prozo. Eĉ pli: tre multaj bonaj prozistoj estas ankaŭ poetoj, kio en naciaj literaturoj kvankam ja okazas, sed multe malpli ofte.

1) La unua poeto estis L. Zamenhof mem, kiu jam en la Unua Libro donis ekzemplojn de poeziaj tradukoj kaj esprimivaj originalaĵoj. Lin sekvis multaj aliaj, inter ili A. Grabowski, kiu jam en 1893 kompilis antologion de 110 verkoj de diversaj aŭtoroj “La liro de la esperantistoj”. Ekverkis Leo Belmont, Vasilij Devjatnin, A. Dombrovski (Dambrauskas), M. Goldberg, A. Kofman, Feliks Zamenhof kaj aliaj pioniroj, kies originalaj kaj tradukitaj verkoj eniris (kune kun ekzercoj, prozaĵoj kaj sciencaĵoj) en 1903 “**Fundamentan Krestomation**”, kompilitan de Zamenhof kaj kiu fariĝas la ĉefa bazo por plua disvolvo de la nova internacilingva literaturo. Kvankam multaj el la verkoj en ĝi nun ŝajnas ne sufiĉe lertaj kaj plibonigindaj, ĝi donis la ĉefan bazon por la plua disvolviĝo de la literaturo.

2) Formiĝo de la Rusa skolo. La aŭtoroj de la Fundamenta Krestomatio estis plejparte rusoj kaj poloj. Do, de la komenco influo de la slava poezio al la esperanta estis tre forta, kaj restis la ĉefa trajto de esperanta poezio ĝis la 20-aj jaroj (kiam kaj la Rusa skolo draste kreskis nivele, kaj aperis la Budapeŝta). Tamen jam en 1900-1910-aj jaroj tiu frua Rusa skolo (aŭ, kiel nomis ĝin W. Auld, primitiva romantismo) rimarkinde evouis kaj kreskis nivele. Rapide kreskis majstreco de **Antoni Grabowski**, kiu multe tradukis, kaj en 1913 eldonis la libron “El Parnaso de l’ popoloj”, kie estis kolektitaj 6 originalaj poemoj kaj multegaj tradukitaj (plej sukcese el la pola). En 1918 aperis lia brila traduko de “**Sinjoro Tadeo**” far Mickiewicz. Evoluis ankaŭ verkado de Leo Belmont (Leopold Blumenthal) kaj de Vasilij Devjatnin, kies originalaj kaj tradukitaj poemoj aperis en 1906-1911 en kvar volumetoj. En 1909 dum la Barcelona UK gajnis la poezian konkurson – “florludojn” – la unua E-poetino, germanino Marie Hankel.

3) Propra voĉo de la Esperanto-poezio. En 1910-aj jaroj aperis novaj junaj poetoj, kiuj havis iom pli memstaran rilaton al la poezio, ol la poetoj-pioniroj, kaj kuraĝis esprimi en Esperanto siajn personajn sentojn, kvankam ankoraŭ ne ĉiam sufiĉe lerte. Tia sinteno rilate la poezion kvazaŭ aŭguris ties disfloron post la unua mondmilito. Temas pri **Edmond Privat** (“**Tra l’silento**”, 1912), **Georgo Deŝkin** (“**Versaĵoj**”, 1912), Stanislav Schulhof (“Per espero al despero, 1911; “Kion la vivo alportis”, 1912; “Aŭtunaj floroj”, 1912). Ankaŭ menciindas en tiu vico Czesław Kozłowski (“Petaloj”, 1912), Bela Manto (Boris Mirskij) kaj Lev Levenzon.

4) La Rusa poezia skolo, ensorbinte la atingojn de la unua periodo de la originala poezio, disfloris en 1920-30-aj jaroj; pluraj poetoj, apartenantaj al ĝi, fruktodone verkis ankaŭ post la dua mondmilito. Sub ĝia influo estis ne nur rusoj, sed ankaŭ la latvaj, estonaj, polaj poetoj. La plej elstaraj estas **Nikolao Hohlov** (“**Tajdo**”, 1928), **Eŭgeno Miĥalskij** (“**Prologo**”, 1929; “Fajro kuracas”, 1932; “Kantoj de l’ amo kaj sopiro”, 1934¹⁴), **Nikolaj Nekrasov** (plej fama pro traduko de “Eŭgeno Onegin”¹⁵ far Puŝkin, 1931, sed ankaŭ aŭtoro de priesperanta “**Sonetkrono**”¹⁶), **Hilda Dresen** (“**Norda naturo**”, 1967; multaj tradukoj el la estonaj kaj rusaj poetoj), Hendrik Adamson (“**Vesperkanto**”, 1967), Nikolao Kurzens¹⁷ (“**Mia spektro**”, 1938), Georgo Deŝkin (“**Elektitaj versaĵoj 1909-56**”, 1957), Aleksandr Logvin (Lilier) (“**Sur la vivovojo**”, 1964), Ludmila Jevseeva (“**Versoj**”, 1987).

6) Budapeŝta skolo. Tio estas la poetoj, grupiĝintaj ĉirkaŭ la revuo “**Literatura mondo**”, kaj ĉefe – **Julio Baghy** kaj **Kolomano** (Kálmán) **Kalocsay**, kiuj la revuon redaktis. La revuo kaj samnoma eldonejo, fariĝinte la ĉefa kultura centro en Esperantujo inter 1922 kaj 1948, grave influis la literaturajn gustojn de la tutmonda esperantistaro kaj levis E-literaturon sur la profesian nivelon, evoluiginte esprimrimedojn, estetikajn valorojn, poezian teknikon. La modelo por ĉiuj estis poemoj de Kalocsay kaj Baghy mem. Al Kalocsay apartenas poemaroj “**Mondo kaj koro**” (1921), “**Streĉita kordo**” (1931), “**Rimportretoj**” (1931), “**Izolo**” (1938), “**Ezopa saĝo**” (1956), sub pseŭdonimo Peter Peneter erotikaj “**Sekretaj sonetoj**” (1932) kaj sub pseŭdonimo Emiano Imby – erotika epopeo “**Dekdu noktoj de satano**”. Krome, li multege tradukis poezion el aliaj lingvoj (inkluzive “**Inferon**” de Dante kaj duvoluman kolekton “**Tutmonda sonoro**”). Al Baghy apartenas poemkolektoj “**Preter la vivo**” (1923), “**Pilgrimo**” (1926), “**Migranta plumo**” (1929) kaj “**La vagabondo kantas**” (1933). La poeziaj principoj de Kalocsay kaj Baghy, tamen, malsamis: la unua strebis la pliriĉigo de la lingvo per sinonimoj kaj neologismoj, la dua – al klareco kaj simpleco de esprimrimedoj. Ankaŭ temperamente ili malsamas – dum Kalocsay estis la intelektulo, Baghy estis emociulo kiu gajnis grandegan favoron de la legantoj. Krom tiu duopo, al la skolo apartenas aliaj hungaroj: **Emba** (Emeriko Baranyai), kies poemoj estas kolektitaj en “**Ekzilo**” (1938) kaj “**Ekzilo kaj azilo**” (1962), L. Tárkony (“**Soifo**”, 1964), F. Szilágyi, kaj

¹⁴ La lasta poemo de Miĥalskij «Reforĝo de homoj» pereis kun la aŭtoro.

¹⁵ Post Nekrasov diversaj poetoj penis fari pli bonan tradukon de tiu ĉefverko (S. Rublov, I. Ĥoves, N. Danovskij), tamen iliaj provoj apenaŭ estis pli bonaj ol la traduko de Nekrasov.

¹⁶ Laŭ informo de V. Samodaj, post perejo de Nekrasov restis manuskripto de granda originala poemo «Kazanova», kiu malaperis en 1960-aj.

¹⁷ Oni foje klasigas lin kiel poeton de Budapeŝta skolo.

franco Georgo Maŭra (Gaston Waringhien), aŭtoro de la kolekto “Duonvoĉe” (1938, 1962).

Gravan signifon por evoluo de E-poezio havis du kolektivaj poemaroj de LM “Dekdu poetoj” (1934) kaj “Naŭ poetoj” (1938), parto de kies aŭtoroj apartenis al la Budapeŝta skolo, parto – al la rusa, kaj kelkaj – al eksterskolaj novaj fluoj. Inter la lastaj necesas speciale mencii poemojn de anglo **L. N. Newell**, kies poluritaj poemoj karaktere aŭguris postmilitan aperon de la Brita skolo. Liaj “**Kolektitaj poemoj**” aperis en 1987 en aparta libro.

7) “**Parnasa gvidlibro**” (1932) far K. Kalocsay kaj G. Waringhien estas la plej grava teoria atingo de la Budapeŝta skolo. Ĝi starigis la teorion fundamenton por internacilingva poetiko, kaj ebligis al E-poetoj serioze studi la metion. Ĝin suplementas ankaŭ la studo de Kalocsay “Lingvo Stilo Formo”. La dua grava teoria atingo estis la libro de Lajos Tárkony “De paĝo al paĝo”, kiu fariĝis la unua literaturkritika esploro, analizanta verkojn de esperantaj aŭtoroj laŭ kriterioj de nacilingvaj literaturoj.

8) Ekster ĉiuj skoloj troviĝis la brile-burleska **Raymond Schwartz**, kiu kreis satiran, ironian kaj humuran poezion ekde 1920-aj jaroj ĝis 1960-aj. Liaj versaĵoj troviĝas en la kolektoj de diversĝenraj verk(et)oj “Verdkata testamento” (1926), “La stranga butiko” (1933), “La ĝoja podio” (1949) kaj “**Kun siaspeca spico!**” (1971). Li kiel neniu alia aŭtoro montris, cetere, la riĉajn esprimeblecojn de nia lingvo, abundege uzante vortludojn, enkondukante tiajn poeziformojn kiel limeriko, kaj montrante neimageblan riĉecon de simpla klasika Esperanto.

9) Postmilita poezio. Skota (aŭ, eble pli ĝuste, brita) skolo anonciĝis per apero de la libro “**Kvaropo**” 1952, (**William Auld**, John Dinwoodie, John Francis, **Reto Rossetti**). Dinwoodie poste ĉefe tradukis, Francis verkis prozon, sed Rossetti ankaŭ poste eldonis brilajn poemojn (“Pinta krajono”, 1959) kaj Auld fariĝis la plej fama originala poeto en Esperantujo (poemaro-epopeo “**La infana raso**”, 1965, “Unufingraj melodioj”, 1960, “Humoroj”, 1969, “En unu verda vivo” (1978), k.a., pluraj tradukoj, literaturologiaj verkoj ktp). Al la skolo apartenas **Marjorie Boulton** (“**Kontralte**”, 1955, “Eroj”, 1959, “Rimleteroj” – kune kun Auld – 1976, “Du el” – kune kun Thorsen – 1985). La skolon karakterizas alta intelekto de poemoj, kaj sukcesa strebo kunigi tradiciojn de la angla poezio kun la esperantaj.

Inter aliaj britaj poetoj menciindas Victor Sadler, aŭtoro de “Memkritiko” (1967). En la moderna periodo aperis inter britaj esperantistoj novaj bonaj poetoj, unuavice menciindas Daphne Lister (“Ĝis nun”, 1976 kaj “Kaj poste”, 1986), **Krys Ungar** (“**Meznokto metropola**”, 1991) kaj **Timothy Carr** (“**Sur parnaso**”, 1998).

10) Poetoj de diversaj popoloj.

Marin Ljubin (Asen Grigorov), bulgaro, estas unu el plej bonaj reprezentantoj de laboristtendenca poezio (apud Emba). Liaj poemoj estas kolektitaj en “Ruĝa aŭroro” (1930) kaj “Garbo” (1930).

Ĥrima (Ĥristo Gorov) estas alia bulgara poeto-laboristo. La plej grava verko – “Poemo de l’ plugisto” (1930); liaj poemoj estis kolektitaj en “Ribela kordo” (1983).

Geraldo Mattos (brazilano, nun prezidanto de AdE) estas unu el la elstaraj niaj poetoj, aŭtoro de poemo “La tento de la junulo” (1953), versodramo “Ivan VI” (1953), tankaaro “Miniaturoj” (1959), poemaroj “Arĉoj” (1967), “Ritmoj de vivo” (1968), sonetaro “La libro de Nejma” (1985).

Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), germano, pli konata kiel aŭtoro de prilingvaj verkoj, kie li pledas al pure (kaj tro) logika aliro al Eperanto – tiel nomata “Analiza skolo” – estis ankaŭ bona, kvankam tre seka, originala poeto, eldoninta librojn “Trombonoj de Jeriko” (1984), “Abismo” (1988), “La mago” (1989), en kiuj tekstoj ofte estas paralelaj – en la germana kaj en Esperanto.

Baldur Ragnarsson, islandano kaj tre rimarkinda poeto verkis librojn “Ŝtupoj sen nomo” (1959). ”Esploroj” (1973), “Fia preĝlibro” (1992). Gravan signifon havas ankaŭ liaj tradukoj de la islanda kaj antikva skandia poezio.

Poul Thorsen, dano, aŭtoro de “Rozoj kaj urtikoj” (1954), “Sen paraŝuto” (1963), “Du el” (kune kun M. Boulton, 1985), estas tre rimarkinda poeto, ankaŭ belega tradukisto el la dana.

Clelia Conterno-Guglielminetti, italino, en 1969 eldonis poemkolekton “Eta vivo”.

Miyamoto masao – la plej elstara figuro inter japanaj verkistoj (prozo, poezio, historio, gravaj tradukoj el la japana). Lia plej grava poezia libro estas “**Invit’ al japanesko**” (1971). Ekzistas ankaŭ lia komuna kun Ueyama masao poezia kolekto “L’ omnibuso kun la tri pasaĝeroj” (1980).

Ueyama masao, japano, verkis originalan poemaron “**Por forviŝi memoron pri ŝi**” (1974).

Edwin de Kock, sudafrikano nun loĝanta en Usono, eldonis librojn “Ombroj de la kvara dimensio” (1961), “Fajro sur mia lango” (1967), “Kvin elementoj” (1970), “Saluton al la suno” (1983), “Vojaĝoj kaj aliaj poemoj” (1992). Liaj poemoj estas ofte tre “eksperimente modernismaj”.

Nikolino Rossi, italo, eldonis libron “Sur la vivopado” (1980) kaj poste multe kontribuis al la revuo “Literatura Foiro”.

Giorgio Silfer (Valerio Ari), italo, verkis libron de lirikaĵoj (poeziaj kaj prozaj) “Desislava ridetas”. Li estas ankaŭ aŭtoro de la dramo “Doktoro Rosales” (1973) kaj fantasta libro “La spegulo de Velodajo” (1990).

Menciindas ankoraŭ mutaj poetoj, kontribuintaj evoluon de E-poezio (Jaume Grau Casas, kataluno, "Amaj poemoj", 1924; Sylla Chaves, brazilano, "Animo prisma", 1959, "Karnavalo", 1981; Vesna Skaljer-Race, kroatino, "Maristo surmaste"; 1969; Albert Goodheir, nederlandano en Britio, "Merlo sur menhiro", 1974; Mauro Nervi, italo, "La turoj de l' ĉefurbo", 1978; Reina de Jong, nederlandanino, "Divershumore", 1980; Gerrit Berveling, nederlandano, "Tri 'stas tro"; 1987, Jarlo Martel-Monto (Jarl Hammarberg), svedo, konata poeto konkretisma en la sveda kaj en Esperanto, "Ajn", 1983, "ike ize ive", 1991; "Kanto pri Minotaŭro", 1993; Armand Su, ĉino, "Poemoj", 1992; Julius Balbin, pola judo, nun usonano, "Inter vivo kaj morto", 1996; Aira Kankkunen, finnino en Svedio, "Neniu povas ŝanĝi hieraŭon", 1996; Carmel Mallia, maltano, "Marionetoj", 1999; "Havenoj", 2001; Mao Zifu, ĉino, "Ŝanĝado"), sed apenaŭ eblas mencii ĉiujn!

11) Praga skolo. Dum la periodo post la dua mondmilito riveligis kelkaj brilaj poetoj-esperantistoj en Ĉeĥio – ili kaj tradukis, kaj verkis originale: **Tomáš Pumpr** (kies traduko de **“Bapto de caro Vladimir”** far K. Borovsky onidire pli bonas ol la originalo), Jiří Kořínek, Karolo Piĉ (“Angoroj”, 1982), **Eli Urbanová**¹⁸ (“Nur tri kolorojn”, 1960, **“El subaj fontoj”**, 1981) k.a. En 1980-aj K. Piĉ, E. Urbanová kaj Josef Rumler fariĝis ideologoj de “Praga skolo”, kies principojn formulis J. Rumler en la libreto “Abunde kaj redunde¹⁹” (1986): poezia lingvo bezonas multegajn sinonimojn kaj neologismojn por esti esprimiva. Feliĉe, en bonaj poemoj de la pragskolanoj tiu tendenco ne tro fortis, kvankam komplikas legi iliajn prozajn tekstojn pro multaj vortoj kies signifojn oni malfacile fiksas en la memoro. Ekzistas kvaropa “skola prezento” de la praganoj: **“Kvarfolio”** (1985) de Kořínek, Urbanova, Rumler kaj Ĉestmir Vidman.

12) **Ibera skolo.** En 1993 konatiĝis per la poemaro "Ibere libere" grupo el originalaj poetoj kaj prozistoj el la "Iberaj landoj" Hispanio kaj Portugalio: **Jorge Camacho (Georgo Kamaĉo), Miguel Fernández** (plua verko "El miaj sonoraj soloj", 1996), Gonçalo Neves ("Simptomoj", 1999) kaj Liven Dek (Miguel Gutiérrez). Ilin karakterizas pli-malpli modernisma kaj eksperimentema stilo kaj lingvaĵo. Grandparte ili verkas en tradicio de "liberaj versoj". Ĉiuj kvar verkas ankaŭ prozon. Jorge Camacho elstare regas poezian teknikon, kaj pluraj el liaj poemoj estas klarsencaj kaj esprimivaj. Ankaŭ M. Fernandez prezentas ofte altkvalitajn poemojn, dum poezio de la aliaj dronas en eksperimentoj farantaj la verkojn ofte simple nekompreneblaj.

¹⁸ Al Urbanova apartenas ankaŭ brila grandega prozaĵo – autobiografia romano-konfeso «Hetajro dancas» (1995).

¹⁹ Laŭ lingvaĵo de pragskolanoj tio signifas «superflue».

Al la skolo oni foje kalkulas ankaŭ **Abel Montagut**, kiu verkis sciencfantazian epopeon per klasikaj heksametroj **“Poemo de Utnoa”** (1993). Plua verko: "Karnavale", 1997.

13) Moskva skolo. Tiu ĉi poezia skolo formiĝis ĉefe el a) heredaĵo de rusa poezia skolo antaŭ la dua mondmilito; b) insista traduka kaj verka laboro de moskvaj esperantistoj en 1960-aj; c) kantokulturo de la sovetia, ĉefe SEJMa, E-movado; ĉ) konscia kleriga kaj eduka laboro de B. Tokarev kaj V. Samodaj; d) ekzisto dum multaj jaroj de Moskva Literatura Esperanto-klubo en kadroj de la klubo “Lev Tolstoj”. Al la skolo apartenas: Konstantin Gusev, Bonifatio Tornado (pseŭdonimo de Boris Tokarev, “Versoj”, 1991), Vladimir Samodaj (multaj versaĵoj troviĝas en la libro “Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM”, 1999), **Mikaelo Bronŝtejn** (“Kantoj de Mikaelo Bronŝtejn, 1995, “Jen, denove” 1998, poemoj en la libro “Legendoj pri SEJM”, **“Du lingvoj”**, 2002) Valentin Melnikov, **Miĥail Giŝpling** (“**El sisma zono**”, 1994, **“Eola harpo”**, 1999), **Ivan Naumov** (“**Plejo**”, 1995), Klara Ilutoviĉ, Solomon Vysokovskij, Oĉjo (Oleg) Dadaev (“Kvio”, 2000), Grigorij Arosjev (“Sonet”, 1999, “. ru”, 2001), kelkaj el kiuj sukcesis eldoni proprajn poemarojn. Ĉiujn poetojn karakterizas granda estimo al klasikaj poeziaj formoj, klaraj rimo kaj ritmo, deziro sekvi kaj modelojn de versfarado de la plej rafinitstilaj esperantaj aŭtoroj kaj de la rusa poezio. Kiel aparta skolo la moskvaj poetoj estas prezentataj post apero de la kvaraŭtora libro **“Moskvaro”** (Melnikov, Ilutoviĉ, Vysokovskij, Dadaev) en 1998.

14) Aliaj modernaj rusaj poetoj. Dise tra Rusio kaj ekssovetio verkas diversaj poetoj. Apartajn originalajn librojn eldonis Gafur Gazizi (“Zigzage”, 1986), Nadija Hordienko-Andrianova (“Vagante tra la mondo maltrankvila”, 1987), Miĥail Ternavskij (“Koloroj”, 1987), Nikolaj Lozgaĉev (“La tago de l’ eterno”, 1987, kaj postmorta “Sub tranĉrando de ponard”, 1998) kaj Aleksej Ĵuravlov (“Versoj diversaj”, 1994). En 1996 aperis la libro de kvaropo Viktor Ĉaldajev, Gafur Gazizi, Nikolaj Lozgaĉev kaj Alen Kris **“Kvarteto”** (1996).

2. Prozo

1). Antaŭ la unua mondmilito.

Esperantlingva beletra prozo komenciĝis per tradukoj el naciaj lingvoj. La unua aparte eldonita libreto estis **“La neĝa blovado”** de Puŝkin, tradukita de **A. Grabowski**, baldaŭ aperis “Princino²⁰ Mary” de Lermontov, лшгт tradukiby de Wahl. En 1891 estis verkita la unua originala rakonto: “Nur unu vorton” de L. E. Meier; en 1992 sekvis “Okazo” kaj “En la tombo” de Enbe (N. Borovko), kaj aliaj verkoj. En 1895 aperis la unua libroforma eldono de

²⁰ de Wahl tradukis la vorton “княжна” ĝuste “princino”, ne “princidino”!

originala proza verko – “**Kraleviĉ Marko**” de bakuano **Abesgus**, verkita interese kaj altnivele. Kelkaj originale verkitaj rakontoj (plej bonaj laŭ la opinio de Zamenhof) eniris la “Fundamentan Krestomation” (1903).

En 1905 aperis la unua originala romano – “Kastelo de Prelongo” de franco Valliene. En 1907 li eldonis la duan romanon – “Ĉu li?” En 1912 anglo-germano Luyken aperigis la romanon “Paŭlo Debenham”, en 1914 – la duan – “Mirinda amo”. La enhavo de la romanoj estis aventura, sed ne tre altnivela.

Krom kelkaj elstaraj esceptoj (ekz., rakontoj de Ivan Ŝirjaev kaj primovada novelo de Aleksandr Saĥarov “Superforta ambicio”, 1913), laŭ la stilo la unuaj prozaj provoj estis sufiĉe mallertaj, pezaj. Ĝin forte influis la franca lingvo pro tradukoj de Beaufront en “L’esperantiste”. Revolucio en la stilo faris **Kabe** (Kazimierz Bein), tradukinta plurajn gravajn verkojn el la pola kaj rusa (i.a., “Patroj kaj filoj” de Turgenjev, “**Faraono**” de Prus k.a.). Kabe ne verkis originale, ĉar li opiniis, ke traduklaboro donas pli da komplikaj stilaj taskoj por disvolvi la lingvon. Li liberigis esperantan prozon de pezaj formoj (i.a., komplikaj verbaj tempoj), kaj faris ĝin same fleksebla kiel en slavaj originaloj. Tiel li preparis la grundon por posta disvolviĝo de vere altnivela originala esperanta prozo (bonaj poeziaj verkoj aperis jam antaŭ la unua mondmilito).

2). Inter la mondmilitoj.

Post la unua mondmilito subite aperis pluraj vere altkvalitaj verkistoj-esperantistoj, verkintaj tutan aron da bonkvalitaj originalaj romanoj. Eĉ la lasta romano de **Luyken** “**Pro Iŝtar**” (1924) tre diferencas de liaj pli fruaj romanoj kaj fariĝis unu el klasikaĵoj de nia literaturo.

Ekde 1923 ekverkis **Jean Forge** (Jan Fetke), polo, kiu verkis sentimental romanon “Abismoj” (1923) kaj sciencfantaziajn romanojn “**Saltego trans jarmiloj**” (1924) kaj “Mr. Tot aĉetas mil okulojn” (1931). En 1961 aperis lia novelaro “La verda raketo” kaj en 1973 – kolekto de humoraĵoj “Mia verda breviero”. La intrigoj estas ĉiam streĉaj, la stilo leĝera kaj atentokapta.

Julio Baghy, hungaro, – ne nur granda poeto, sed ankaŭ prozisto kaj dramverkisto. La plej elstara lia proza verko estas roman-duopo “**Viktimoj**” (1925) kaj “**Sur sangato**” (1933) pri la eventoj dum la civila milito en Rusio. Krome, li verkis la romanojn “Hura” (1930), “Printempo en aŭtuno” (1931), ĉarman instruan romaneton por komencantoj “La verda koro” kaj novelojn, kolektitajn en la libroj “Teatra korbo” (1924), “Dancu, marionetoj” (1927), “Migranta plumo” (1929), “Verdaj Donkiĥotoj” (1933) kaj “Koloroj” (1962).

Teodor Schwartz, la mecenato de la unua periodo de “Literatura Mondo”, verkis en 1923 facilan romanon “Novaj Robinzonoj” pri fuĝo el siberia militkaptitejo.

Unu el la plej elstaraj prozistoj, poetoj, dramverkistoj **Raymond Schwartz** komencis sian verkadon post la unua mondmilito. Lia unua romano, aperinta en 1930, “**Anni kaj Montmartre**”, jam montris lian neordinaran kaj altan talenton.

Hendrik Jan Bulthuis verkis romanojn ne tro zorgante pri komponado kaj iom 19-jarcentkaraktere, tial iom enue, sed liaj romanoj ja estas rimarkindaj: “Idoj de orfeo” (1923), “Jozef kaj la edzino de Pottifar” (1936), “La vila mano” (1928), “Inferio” (1938).

Hans Weinhengst, aŭstro, – aperigis en 1931 bonan realisman romanon “**Turstrato**, 4” pri vivo de laboristoj en Vieno dum ekonomia krizo.

Stellan Engholm, svedo, estas aŭtoro de majstraj vivromanoj “Al Torento” (1930), “**Homoj sur la tero**” (1932), “Infanoj en Torento” (1934 kaj 1939), “Vivo vokas” (1946), kie ne estas viglaj intrigoj, sed kiuj estas atentokaptaj pro vivega prezento de ordinara vivo de “ordinaraj” homoj; bone komprenis la infanan psikologion. Unu el la plej elstaraj stilistoj de E-literaturo. Liaj romanoj esence estas ideaj verkoj.

N. Barthelmess verkis kelkajn librojn, kiuj montris profundan komprenon de la infana psikologio (“Diablidoj”, 1928, “Juneca ardo”, 1936, “Vartejoj”, 1938 kaj ankaŭ kelkajn novelojn en 1947, kolektitajn en “Ne plu ludo”, 1973).

L. N. Newell, anglo, verkis novelaron pri Egiptio “**Bakŝiŝ**” (1938), kie kun drasta realismo kaj ioma ironio montris malsamecon de diversaj kulturoj kaj pensmanieroj en ilia kunpuŝiĝo. La libro estas elstara fenomeno de E-novelarto.

K.R.C. Sturmer (pseŭdonime ankaŭ K. Robinson), anglo, estis psikologie trafa novelisto (“Se grenereto”, 1930).

En la intermilita periodo aperis ankaŭ talentaj satiristoj. Dorno (Frans van Dooren), flandro, verkis en 1936 satiran novelaron “Aventuroj de lia reĝa moŝto Stultulof la X-a de Fuŝio” kaj primovadan komedion “Levu la manojn!” (1939). Izrael Lejzerowicz, pola hebreo, verkis primovadajn humuraĵojn kaj satiraĵojn, kolektitajn en 1936 en la libro “El la Verda Biblio”.

3). Post la dua mondmilito.

Post la dua mondmilito aperis aro da novaj brilaj aŭtoroj. En “Literatura Mondo” estis publikigitaj brilaj psikologiaj – kaj samtempe iom ironiaj – noveloj de **Reto Rossetti**, poste kolektitaj en la libro “**El la maniko**” (1955).

Libro de lia frato **Cezaro Rossetti** “**Kredu min, sinjorino!**” (1950) estas la plej bonstila, leĝera, atentokapta romano, kiu iam ajn aperis en Esperanto.

En 1960 **John Francis** publikigis la novelaron “**Vitrulo**”, kies rakontoj, kelkaj fantazie-fabelaj, aliaj realismaj, transdonas profundajn filozofiajn ideojn. En 1978 aperis lia ampleksega romano “La granda kaldrono” kaj en 1982 la sciencfantazia romano “Misio sen alveno”.

Plurajn belegajn novelojn kaj dram(et)ojn verkis **Marjorie Boulton**. Ili estas kolektitaj en la libroj “**Virino ĉe landlimo**” (1955) kaj “**Okuloj**” (1967). Ŝi verkis ankaŭ brilajn rakontojn pri siaj ŝatataj bestoj – katoj.

Inter tre talentaj prozistoj troviĝas Verda Majo (Hasegawa teru), japanino, loĝinta longe en Ĉinio (“Verkoj de Verda Majo”, 1982).

Jean Ribillard, franco, apartenas al la plej elstaraj niaj stilistoj, kaj samtempe filozofie profundaj aŭtoroj, kvankam elsub lia plumo aperis nur libreto da rakontoj “Vagado sub palmoj” (1956) kaj nefinita romano “**Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud**²¹” (1963).

Johan Hammond Rosbach, norvego, verkis en simpla klasika lingvo plurajn novelarojn: “Bagatelo” (1951), “Homoj kaj riveroj” (1971), “La mirinda eliksiro” (1967), “Disko” (1970), “Silka kuseno” (1991), “Nomoj” (1999) kaj romanoj “Verda robo aŭ ordinaraj indianoj” (1974), “Fianĉo de l' sorto” (1977), “Unumane” (1991).

Ankaŭ post la dua mondmilito daŭre verkadis **Raymond Schwartz**. Proze ĉe li aperis granda brila romano “**Kiel akvo de l' rivero**” (1963), poste kelkfoje reeldonita, kaj rakontaro “**Vole ... novele**” (1971), en kiuj li prezentas sin kiel unun el la plej bonstilaj kaj altnivelaj niaj prozistoj, en kies verkoj estas kombinitaj brila uzado de ĉiuj internaj potencoj de la lingvo (interalie, majstreco pri vortludoj), ironio kaj psikologieco.

Francisko Szilagyi, hungaro, loĝinta en Svedio, estis elstara novelisto. Liaj noveloj kolektiĝis en libroj “La granda aventuro” (1945), “Inter Sudo kaj Nordo” (1950), “**Koko krias jam**” (1955). La plej genie verkita lia novelo estas “**Flamsalamandro**”. Krome, li verkis brilan romanon “**Mistero minora**”.

Sandor Szathmari, hungaro, jam en 1939 verkis romanon “**Vojaĝo al Kazohinio**”, eldonitan nur en 1957. Ĝi estas unu el la ĉefverkoj de la E-prozo en kiu la aŭtoro provis unuigi la ĝenrojn de utopio kaj antiutopio, uzante la satiran tradicion de Swift. Krome, li verkis novelojn, eldonitajn en du kolektoj: “Maŝinmondo” (1964) kaj “Kain kaj Abel” (1977). Speciale menciindas la novelo “**Vincenzo**”, elstara enhance kaj stile.

Tibor Sekelj, jugoslavia mondvojaĝanto, verkis novelojn kaj librojn pri vojaĝoj kaj historio, geografio, etnografio ks. (parton – komence en la hispana, serbokroata kaj aliaj lingvoj, poste tradukitaj en Esperanton, parte – dekomence en Esperanto). Liaj libroj estas “Nepalo malfermas la pordon” (1959), “Tempesto super Akonkagvo” (1959, originale hispana), “Tra la

²¹ M'Saud – “Feliculo” – estas nomo de azeno.

lando de indianoj” (1970, originale hispana), “Premiitaj kaj aliaj noveloj” (1974), “Mondo de travivaĵoj” (1981), “**Kumeŭaŭa, filo de ĝangalo**” (1988), “Ĝambo rafiki” (1991), “Temuĉino la filo de la stepo” (1993, originale serbokroata).

Lina Gabrielli, italino, verkis la librojn “La kombilo” (1962), “Bill kaj lazuraj okuloj” (1964, kune kun Atus Goldoni), “Karnavalo” (1973), “La ĝardeno de la urbestro” (1978). Ŝi verkis ankaŭ poemojn.

En 1966 Teodoro Schwartz (Soros) eldonis dokumentan romanon “Maskerado ĉirkaŭ la morto” pri vivo en Hungario sub nazioj. Lia filo – la fama miliardulo György Soros (legu: Ŝoroŝ), longe ne permesis eldoni ĝiajn tradukojn al aliaj lingvoj, por ne “ofendi” ankoraŭ vivantajn personojn, sed lastatempe aperis la angla traduko kaj eĉ la rusa (tamen, ne el la originalo, sed el la angla).

Bertram Potts, novzelandano, bona novelisto (kolektoj “Nokto de timo”, 1970, “La nova butikisto de Nukogaia kaj aliaj noveloj”, 1978, “Kaverno apud la maro”, 1983).

Lois Beaucaire, franco, famiĝis pro siaj “bervalajoj” (Bervalo – elpensita lando, tro simila al Francio) – anekdotoj plejparte maldecaj, origine naciaj sed ofte “esperantigitaj” enhave: “Kruko kaj Baniko” (1970) kaj same spritaj maldecaj noveloj kun E-fono: “El la vivo de bervalo sentaŭgulo” (1974). Krome, “**Fabeloj de Verda Pigo**” (1982) estas spritaj (kvazaŭ) porinfanaj rakontoj kun esperantisma enhavo.

4). Moderna prozo.

Dum 12 jaroj, inter 1963 kaj 1975, en Esperanto preskaŭ ne aperadis novaj originale verkitaĵoj: kvazaŭ aktiva movado ĉe UN kaj aliaj zorgoj ĉesigus kreivon en la lingvo. Tamen ekde 1975-76 ĉiam pli da novaj verkoj de pluraj novaj aŭtoroj ekaperadis ĉiujare kun intenso neniam ekzistinta pli frue.

Lorjak (Jacques Louis Mahé), franco – verkis romanojn “Neologisme”, “Transe”, “Regulus”, “**Eŭlalia**”, “Mariagnes”, “Kromosomoj”, rakontaron “Iluzioj”. Parto el liaj verkoj estas atentokaptaj kaj spritaj (ankaŭ rilate la lingvouzon), sed aliaj iom tro malviglaj kaj enuaj. Notindas, ke en 1960-aj Mahé sukcesis kiel reĝisoro fari unikan originale esperantan duonprofesian detektivan filmon “Angoroj”.

Konisi gaku, japano, – verkis altnivelajn sciencfantaziajn rakontojn (“Edeno n-ro 5”, 1972; rakontaro “Vage tra la la dimensioj”, 1976).

Oka kazuta estas aŭtoro de originala romano pri maldekstraj esperantistoj en Japano en 1930-aj “Matenruĝo” (verkita en 1935, eldonita en 1976).

Miyamoto masao verkis originalan novelaron “Pri arto kaj morto” (1967) pri famaj verkistoj kaj artistoj, “Japanaj vintraj fabeloj” (1989) kaj romanojn “Naskitaj sur la ruino – Okinavo” (1974), “La morta suito” (1984) pri esperantisto-anarkiisto Sakae Oosugi, “.

Ueyama masao kiel prozisto verkis novelaron “Ne grimacu!” (1967) kaj “Pardonon!” (1970).

Johan Valano (Claude Piron), belgo, loĝanta en Svisio, en 1970-80-aj verkis serion da detektivaj tiel nomataj “Ĉu-romanoj”: “Ĉu vi kuiras ĉine?” (1976), “**Ĉu li bremsis suffiĉe**” (1978), “Ĉu li venis trakosme” (1980), “Ĉu ni kunvenis vane?” (ankaŭ sub la nomo Johan Balano aperis samseria pornografiaĵo “Ĉu ŝi mortu tra-fike?” – 1982) kaj rakontaron “Ĉu rakonti novele?” (1986). Inter ne “ĉu” romanoj estas “Ili kaptis Elzan” (1995), “Tien” (1997). Liajn verkojn distingas perfekta lingvouzo kaj plej modela stilo, atentokaptaj intrigoj, sed ne tre profunda enhavo. Sub lia propra nomo aperis la plej fama instru-romaneto “Gerda malaperis” (1983) kaj legolibroj por progresantoj “Dankon, amiko!” (1990) kaj “Kisa malsano” (1991). Li estas ankaŭ aŭtoro de poemoj, kanzonoj kaj esperantologiaj verkoj.

Julia Pióro, polino, verkinta novelaron “El tero kaj etero” (1964), poste abunde produktis kolektojn: “Hieroglifo” (1979), “Fenestro kristala” (1981), “Ora abelo” (1988).

István Nemere estas la plej fekunda originala aŭtoro en Esperanto, aperiginta ĝis nun ĉ. 20 librojn (diversstilaj – psikologiaj, sciencfantaziaj, sociaj, detektivaj, aventuraj – romanoj, noveloj, eseetoj), el kiuj indas mencii kelkajn romanojn: “**Sur kampo granita**”, “La fermita urbo”, “**La blinda birdo**”, “**La monto**”, “Serĉu mian songon”, “La alta akvo”, “Dum vi estas kun mi”, “**Pigre pasas la nokto**”. Li verkis ankaŭ agentromanojn en stilo plena de perforto kaj rapidaj agoj, “Vivi estas danĝere” kaj “Vi povas morti nur dufoje”, kredeble la solaj el tiu speco en Esperanto. Bedaŭrinde, pluraj el aliaj liaj verkoj estas tro surfacaj kaj eĉ ne ĉiam bonstile verkitaj.

Oldřich Kníchal, ĉeĥo – aŭtoro de originalaj noveloj (en “Mediteme”, 1980) kaj romanoj (“Kiuĵ semas plorante”, 1984, kun Ēva Tófalvi, kaj “Adiaŭ, Kuzko!”, 1987), ankaŭ de interlingvistika verko “Komenio kaj internacia lingvo” (1974). Plej legindas la unua romano.

Endre Tóth, hungaro, famiĝis pro novelaro “Lappar, la antikristo” (1982).

Karolo Piĉ, ĉeĥo – ekde 1981 aperis kelkaj liaj romanoj kaj novelaroj, verkitaj en brila stilo kaj kun profunda enhavo: “**Litomiŝla tombejo**” (1981), “Mortsonorilo de Chamblay” (1983), “Klaĉejo” (1987), “Bermuda triangulo” (1989), “Ordeno de verkistoj” (1997). Tamen la legadon ege malhelpas tio, ke li estis unu el la plej fidelaj adeptoj de la Praga skolo, kaj liaj verkoj, pro falsa koncepto de plialtigo de lingva esprimebleco, estas supersaturitaj de malkompreneblaj vortoj, netroveblaj en vortaroj.

Julian Modest (Georgi Miĥalkov), bulgaro, verkis kelkajn bonajn novelojn (novelaroj “Mistera lumo”, 1987 kaj “Songe vagi”, 1992), romanetojn “Maja pluvo” (1984) kaj “La ora Pozidono” (1984), kelkajn

dramverkojn. Bedaŭrinde, lia kreivo poste malintensiĝis, sed en 2001 aperis nova rakontaro “La fermita konko”.

Bernard Golden, usonano loĝanta en Hungario, verkis multegajn prilingvajn eseojn, sed ankaŭ novelojn (“Bestoj kaj homoj”, 1986) kaj teatraĵojn.

Spomenka Ŝtimec, kroatino – la plej talenta virino, kiu iam verkis esperantan prozon. Ŝiajn verkojn distingas intima intonacio kaj profunda virina vivrigardo. Ŝiaj libroj: “**Ombro sur interna pejzaĝo**” (1984), “Vojaĝo al disiĝo” (1990), “Nesenditaj leteroj el Japanio” (1990), “Geografio de miaj memoroj” (1992), “**Kroata milita noktolibro**” (1993), “Tena” (1996), “Aŭstralia pupo” (1997).

Trevor Steele, aŭstraliano – verkas tre talentajn kaj perfektstilajn romanojn kaj rakontojn. La romano “Sed nur fragmento” (1987) estas verkita surbaze de kelkaj (aŭstraliaj) epizodoj el biografio de N. Mikluho-Maklaj. La rakontoj el kolekto “**Memori kaj forgesi**” (1992) pri aŭstralia provinca vivo distingiĝas per fajna psikologieco. Romano “Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen” (1994) temas pri travivaĵoj de anglo en Germanio. “Falantaj muroj” (1997) rakontas pri ŝanĝoj en Eŭropo en 1990-aj. En 2000 aperis “**Neniu ajn papilio**” – nova versio de la romano el 1994, kaj la unua volumo de la romano “La fotoalbumo” – kroniko pri Aŭstralia familio. Ĝenerale, li estas la plej elstara verkisto, aperinta dum lastaj dek jaroj.

Sergo Elgo (George Lagrange), franco – eldonis kelkajn romanojn (“Ŝia lasta poŝtkarto” – 1988, “La nokto de ezoko”, 1992) “La floroj de l’ krepusko”, 1995, “Surklifa” (2000) kaj rakontojn (“La paneo kaj aliaj noveloj”, 1998).

Kiel “eksperimentan prozon” oni povas mencii novelojn de la samaj iberianoj, kiuj verkis “Ibere libere”: M. Fernández, J. Camacho (=G. Kamaĉo), Gonçalo Neves kaj Liven Dek, kiuj plej plene prezentiĝis en la novelaro “Ekstremoj” (1997). Lingve ili sekvas la principojn de Fernando de Diego²². Enhave ili ofte emas inciti la leganton per priskribo de netradiciaj seksrilatoj ktp.

Grava trajto de la prozo de la 1980-aj-90-aj jaroj estas apero de aro de romanoj, bazitaj sur biografioj de la aŭtoroj, ofte tre malkaŝe rakontantaj pri la intimaj travivaĵoj. Tio estas jam menciitaj “Litomiŝla tombejo” de K. Piĉ, prozo de S. Ŝtimec kaj T. Steele, sed ankaŭ brilaj romanoj de la hungaro Blazio Vaha “Adolesko” (1987, historio de vojo de religie edukita knabo al ateismo), Ulrich Matthias “Fajron sentas mi interne” (1990, pri interna maturiĝo de adoleskulo-junulo esperantisto), **E. Urbanová** “**Hetajro**

²² Fernando de Diego, hispano, poste venecuelano, ne verkis originale, sed serioze influis E-prozon per altnivelaj tradukoj de klasikaĵoj el la hispana (inkluzive “Don Quijot-on”). Pro neologismemo proksimas al la pragskolanoj, sed ne tiom ekstremisma.

dancas” (1995, tre malkaŝa rakonto pri sia intima vivo), hispano Manuel de Seabra “La armeoj de Paluzie” (1996, familia kroniko). Ĝuste la aŭtobiografiaj libroj estas la plej bonaj aŭ solaj ĉe tiuj aŭtoroj.

Inter la plej laste aperintaj talentaj prozistoj estas menciindaj la sekvaj: **Anna Löwenstein**, anglino vivanta en Italio, verkinta furoran historian romanon pri la romia imperio de la 1-a jc. “**La ŝtona urbo**” (1998)²³, Marko Picasso, italo, aŭtoro de la romano “La tunelo” (1998) kaj **Hignio Garcia**, hispano, loĝanta en Kanadio – aŭtoro de antiutopia sciencfantazia novelaro-romano “**Kapturnoj**” (1999), kiu riveligis kiel plej profunda enhave libro de lastaj jaroj.

Ĉiujn aŭtorojn de la prozaj (same kiel de poeziaj) verkoj ne eblas nomi, ĉar ilia kvanto en 1980-aj-90-aj kreskis neimageble. Inter ne menciitaj supre restis, certe, kelkaj tute dignaj verkoj kaj aŭtoroj, sed notindas, ke ankaŭ kvanto da subnivelaj pseŭdorealismaj, detektivaj, virinaj, erotikaj kaj ceteraj rakontoj kaj romanoj estis sufiĉe granda en ĉiuj periodoj de la ekzisto de Esperanto.

5). Rusaj esperantistoj-prozistoj.

Malgraŭ nekomparebla kvanto da poetoj-esperantistoj, rusia esperantistaro liveris relative malmulte da prozistoj. Krom la aŭtoroj de la komenca periodo, antaŭ la unua mondmilito estis publikigitaj kelkaj noveloj de Ivan Malfeliĉulo (Ivan Ŝirjaev), kiu plu verkis en 1920-aj. Pro serioza psikologieco lin oni nomis “esperanta Dostojevskij”. En 1995 estis publikigita ankaŭ tre interesa lia aŭtobiografia romano “Sen titolo”. En 1913 aperis satira, sed samtempe trafe psikologia novelo de **Aleksandr Saĥarov** “**Superforta ambicio**”. En 1926 estis eldonitaj rakontoj de L. IVN (Vsevolod Ivanov) “Ruĝo kaj blanko”. Kelkajn bonegajn fabelojn, rakontojn kaj novelojn verkis en 1920-30-aj **Vasilij Eroŝenko** (vd. modernajn kolektojn “Lumo kaj ombro”, 1979, “El vivo de la ĉukĉoj, 1992). Aparte elstaras lia novelo “**Trimova ŝakproblemo**”²⁴. Sed la plej elstara proza verko de rusa esperantisto estis romano “**Metropoliteno**” de **Vladimir Varankin** (1933), elteninta kelkajn eldonojn. La romano estas unika mejloŝtono en la Esperanta literaturo pro sia interesa konstruo kaj valora

²³ Fakte, la romano komence estis verkita en la angla, kaj poste tradukita al Esperanto de la aŭtorino mem. Tamen, en Esperanto ĝi aperis pli frue, kaj la anglalingva eldono estis mallongigita. Tial ni povas plenrajte nomi ĝin originala. Ekzistas supozoj, ke simile estis verkita ankaŭ kelkaj aliaj famaj originalaj romanoj, i.a. “Vojaĝo al Kazohinio” de S. Szathmari kaj “Metropoliteno” de V. Varankin.

²⁴ La novelo brile transdonas la etoson de la 1937, ties percepton de la sampempulo. En sovetia ruslingva literaturo tiaj estas tre malmultaj (A. Gajdar, “La soroto de tamburisto”, L. Ĉukovskaja, “Sofja Petrovna”, K. Paustovskij, “Norda novelo” – la cetera abunda literaturo pri tiuj jaroj estis verkita jardekojn poste) kaj tial la novelo de Eroŝenko havas gravan signifon ne nur por E-literaturo.

enhavo psikologie kaj socie, kvankam iom kritikinda stile²⁵. Post 1956 ĝis nun, malgraŭ abunda poezia verkado, aperis nur malmulte da aŭtoroj de proza beletro. Eldoniĝis kolekto de geografiaj noveloj de Vladimir Glazunov (kiu jam verkis en 1920-aj) – “Sfinkso de Steplando” (1988), en 1960-aj Bonifatio Tornado (Boris Tokarev) verkis ĉarman romanon-fabelon “Ardes”, eldonitan nur en 1996. En 1990 ĉe “Sezonoj” aperis libreto de sciencfantaziaj rakontoj de Miĥail Korotkov. Bedaŭrinde, li, kaj ankaŭ multe promesintaj per bonaj noveloj antaŭ deko da jaroj Aleksandr Parfentjev kaj Viktor Sapoĵnikov (“Ljuska Benc”, 1992), poste ne disvolvis siajn talentojn de originalaj prozistoj. Kelkajn nemalbonajn provojn verki beletron entreprenis en lastaj jaroj Dmitrij Cibulevskij kaj Nina Korĵenevskaja (kelkaj libretoj eldonitaj). La plej interesa prozo nun apartenas al **Mikaelo Bronŝtejn** (ankaŭ poeto, tradukisto kaj kanzonisto), kiu aŭtoris E-teman romanon “Oni ne pafas en Jamburg” (1993), beletrigitajn rememorojn “**Legendoj pri SEJM**” (2 eldonoj – 1992 kaj 1999) kaj kelkajn rakontojn. Bonajn novelojn verkas Lena Karpunina (nun loĝanta en Germanio) – la kolekto “La bato” (2000).

6). Ĝenroj de la originala prozo.

Fakte, dum pli ol jarcento de internacilingva literaturo en ĝi aperis preskaŭ ĉiuj ĝenroj, ekzistantaj en literaturoj naciaj. Pluraj specimenoj estis menciitaj supre: psikologiajn kaj vivromanojn verkis, ekzemple, S. Engholm kaj J. Francais, sciencfantaziajn²⁶ – J. Forge, kosman operon – I. Nemere, ktp. Cetere, en Hispanio en 1980-90-aj oni eldonis kolektojn SF-erojn, kie aperas ankaŭ tiuĝenraj originalaĵoj²⁷. Ne mankas utopioj – ilin, krom S. Szathmari, verkis ankaŭ aliaj aŭtoroj, eĉ T. Jung (“Lando de l’ fantazioj”, 1927). Aventuraj romanoj kaj noveloj estis jam inter la unuaj, originale verkitaj. Aperis ankaŭ krimromanoj (de D. Dorval, C. Tavanti, I. Nemere, D. Moirand, S. R. C. Gates, S. Johansson), en kelkaj el ili murdoj kaj krimoj aperas en esperantista medio (ekz., “Murdo en Esperantujo” de D. Moirand,

²⁵ En la tiutempa rusa sovetia literaturo stile kaj karaktere al la romano de Varankin similas verkoj de I. Erenburg, B. Jasenskij kaj B. Lapin.

²⁶ En tiu ĉi libro estas ĉie uzata la termino “sciencia fantazio”, sed ne disvastiĝinta “sciencia fikcio”. La lasta termino estas evidenta anglismo – en la anglalingva tradicio oni distingas literaturon “fikcian” kaj “ne fikcian”, sed ĝi ja tute fremdas al aliaj tradicioj (ekz., al la rusa), kie oni komprenas la terminojn “beletro” kaj “arta literaturo”, kaj distingas ilin de “dokumenta literaturo”; kaj la beletro povas esti “realisma” kaj “fantazia” (sciencia kaj fabeleca = fantasta).

²⁷ Arda propagandanto de Esperanto, mondfama Harry Harrison, mencianta la lingvon en ĉiuj romanoj pri Rustimuna Ŝtalrato, originale en Esperanto verkis unusolan rakonton: “Ni venos, Doktoro Zamenhof, ni venos!” (Literatura Foiro 111, februaro 1988, p. 10-15).

“Varmas en Romo” de C. Tavanti)²⁸. La unua sentimentala virina romano aperis jam en 1919 (de A. Sinnotte, “Lilio”), en moderna epoko tiajn romanojn produktas Manjo Austin. Ekzistas ankaŭ erotikaj verkoj, ekz. la menciitaj verkoj de L. Beaucaire kaj J. Balano. El diversaj popularaj ĝenroj preskaŭ mankas nur fantasto (ekzistas nur apartaj noveloj, kaj ĉefe sen kutimaj drakoj kaj baronoj) kaj hororo. Do, legemulo povas trovi preskaŭ ĉion laŭ sia gusto.

3. Antologioj.

Kiel rezultoj de certaj periodoj de la evoluo de E-literaturo aperis kolektivaj verkoj kaj antologioj. La unua tia antologio estis kompilita de A. Grabowski “El Parnaso de l’ popoloj” (1894), la sekva tiaspeca verko, asertanta certan ekziston de Esperanto kiel literatura lingvo, estis kompilita de Zamenhof “Fundamenta Krestomatio”. En la intermilita periodo estis aperigitaj de “Literatuta Mondo” kolektivaj verkoj “Dekdu poetoj” (1934) kaj “Naŭ poetoj” (1938), montrantaj evolunivelon de la tiutempa poezio. Kiel rezulto de la evoluo de la prozo aperis en 1964 “33 rakontoj”. Krono de tiuj antologioj estis kompilita de W. Auld “Esperanta antologio”, kies unua eldono, kun verkoj de 100 poetoj, aperis en 1958 okaze de 100-jara datreveno de Zamenhof, kaj la dua – en 1984, kun verkoj jam de 163 poetoj, okaze de atendata tiam 100-jariĝo de Esperanto. La proza duvoluma antologio, dediĉita al la sama datreveno kun verkoj de 100 aŭtoroj, aperis en 1988 kaj nomiĝas “Trezoro”.

Tre bona iniciato por stimuli verkadon en Esperanto venis de la eldonejo “Kleks”, kiu eldonis en 2001 antologian rakontaron “Mondoj” (redaktoroj G. Handzlik, T. Chmielik, S. Johansson), kaj kiu konsistas el 34 rakontoj de 30 aŭtoroj el ĉiuj mondopartoj. Kaj tiajn antologiojn oni planas aperigi regule. □

Aldonaj rimarkoj. 1) Antologia principo en periodo post la dua mondmilito estas uzata en prezento de novaj skoloj de E-poezio, kaj estas interese, ke tiaj kolektoj inkludas kutime po kvar aŭtoroj (kvankam al certaj skoloj aŭ kreaddirektoj apartenas po pli da poetoj). Tio estas “Kvaropo” (1992) – la skota skolo, “Kvarfolio” (1985) – la praga skolo, “Ibere libere” (1993) – la ibera skolo, “Kvarteto” (1996) – rondo de poetoj ĉirkaŭ “Sezonoj”, “Moskvaro” (1988) – la moskva skolo.

2) En pluraj landoj estis entreprenitaj grandaj traduklaboroj por diskonigi siajn nacilingvajn literaturojn en formo de antologioj. Tiaj antologioj, ofte kelkpartaj (laŭ periodoj aŭ speco de literaturo: poezio, prozo, folkloro), estas rezultoj de celkonscia laboro de tradukistoj kaj eldonistoj el certaj landoj. En iuj el tiuj antologioj la nivelo de tradukoj estas vere alta, sed, bedaŭrinde, ne en ĉiuj.

²⁸ Estas amuze, sed Esperanto-medio inspiras aŭtorojn de krim-romanoj ankaŭ ce nacilingvaj verkistoj-neesperantistoj: ekz, en la rusa en 1986 aperis tia romano de L. Juzefoviĉ «Klub “Espero”». Ekzistas ankaŭ aliaj tiaj verkoj.

4. Porinfana kaj instrua literaturo.

Tiu ĝenro en Esperanto, bedaŭrinde, ne abundas. Oni povas nomi nur kelkajn poetojn, kiuj verkis originale precipe porinfanajn versaĵojn (Ludmila Jevseeva, Bertram Potts, Zofia Mirska) kaj preskaŭ neniujn prozistojn: eble, la sola elstara escepto estas “Fabeloj de verda pigo” de Beaucaire (1982). Kelkaj libroj estas pli lerniloj ol vere originalaj prozaĵoj (eĉ se bone kaj atentokapte verkitaj), kiel pluraj verkoj de S. MacGill.

Inter libroj, speciale dediĉitaj al instruado (ne nur, kaj eĉ ne unuavice, por infanoj), estas veraj ĉefverkoj, ekz., legolibroj de E. Privat “Karlo” (1909), de J. Baghy “La verda koro” (1938), de C. Piron “Gerda malaperis” (1981), de M. Bronŝtejn “Mamutido Miĉjo” (2000). Tiaj libroj, interese verkitaj, ofte surbaze de ofteca vortaro, ofte kun ĉiam pli komplikaj esprimoj kaj enkonduko de novaj vortoj, vere helpas al lernantoj kun pli granda intereso alproprigi kaj perfektigi la lingvoscion. Por pli serioza alproprigo ne nur de la lingvo, sed ankaŭ de Esperanto-movado kaj kulturo, ricevo de bazaj konoj, bone servas progresigaj legolibroj-krestomatiaj kun ekzercaroj “**Paŝoj al plena posedo**” de William Auld (1974), “Faktoj kaj Fantazioj” de Marjorie Boulton (1988), “**Vojaĝo en Esperanto-lando**” de Boris Kolker (1992).

5. Scienca literaturo en Esperanto.

Scienca literaturo en Esperanto estas relative granda, tamen originale en Esperanto estas verkita nur limigita kvanto da libroj kaj artikoloj. Tio estas kompreneble: komunumo, kiu disvolvas la konkretan sciencan en certa lingvo, devas nombri ne malpli ol ĉ. cent personoj, kaj, konsiderante malvastecon de la komunumoj de konkretaj sciencistoj-esperantistoj, povas temi nur pri provoj pruvantaj eblecon uzi Esperanton en ĉiuj sciencoj, sed ne pri praktika uzado. Alia afero estas la popularaj verkoj, kiuj celas nefakulojn. Inter ili aperadis bonaj kaj foje eĉ elstaraj verkoj. Jen kelkaj el la sciencopopularaj aŭtoroj, verkintaj esperante.

Eŭgeno Ajsberg, ruso formigrinta Francion, en 1932 verkis la libron “**Fine! Mi komprenis la radion!**” Tiu libro estis poste reverkita en la franca kaj tradukita en multajn aliajn lingvojn; pluraj rusaj inĝenieroj de pli aĝa generacio unuan fojon en sia vivo konatiĝis kun radiotekniko per “Радио? Это очень просто!”

Paul Neergard, dano, botanikisto, estas la plej bona populariginto de la sciencoj. Originale en Esperanto li verkis tri librojn: “Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso” (1937) – libro, tiutempe tre aktuala ne nur science, sed ankaŭ politike, ĉar ĝi senmaskigis la naziajn elpensadojn; “Atako sur ĝardenplantoj” (1954) – populara skizo de fitopatologio, kaj la ĉefverko

“**La vivo de la plantoj**” (1957) kun diversaj botanikaj skizoj. La libro estis tradukita al pluraj naciaj lingvoj.

Endre Dudich, hungaro, estas aŭtoro de populara libro pri geologio “Ĉu vi konas la teron?” (1983). La libro – pro scienca nivelo kaj enhavriĉeco, kaj samtempe sufiĉe leĝera stilo, povas esti konsiderata kiel modelo de la ĝenro. Ankaŭ Daniela Deneva Power verkis geologian scienc-popularan libron: “Tertremoj” (1991). Ĝenerale, geologia literaturo en esperanto estas relative abunda: inter 1974 kaj 1990 aperis ok volumoj de “Geologio Internacia” kun kontribuoj de pluraj geologoj el diversaj landoj. Parenca al geologio la grundoscienco, kaj ankaŭ pri ĝi aperis bona libro “El la polvo de la tero” far William F. Rohl (1967). Pri la ankŭ proksima al geologio sfero – speleologio – rakontas “La bela subtera mondo” (1959) de Leander Tell.

Ankaŭ medicino fariĝis la fako, pri kiu oni fin-fine komencis verki originalajn popularajn librojn. El ili indas noti la librojn de germano Harald Schicke “La korpo de la homo” (1993) – tre bone ilustrita, de japano Masayuki Saonji pri orienta diina masaĝo (Yumeiho-terapio), tradukita al diversaj naciaj lingvoj, ĉino Zhu Bin “Facile legebla akupunkturologio” (1992) k.a.

Pri arkeologio verkis originalan libreton “Interesa arkeologio” (1973) jugoslavo Marinko Ĝivoje.

Pri astronomio aperis bela libro de David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel “Kosmo kaj ni” (2001).

Inter ĝeneraltemaj sciencopopularaj verkoj por infanoj kaj adoleskuloj indas mencii la librojn de hispano Alberto Fernandez “Senĝenaj dialogoj” (1971) kaj de sloveno Zlatko Tišljar “Duobla spiralo” (1991).

Pri la lingvo ĝenerale, kaj pri la arto publike paroli speciale, temas la libro de **Ivo Lapenna** “**Retoriko**”, kelkfoje eldonita (1950, 1958, 1971).

Dum lasta jardeko seninterrompe verkas ĉiam novajn librojn pri ĉiam novaj temoj el arkeologio, filologio, matematiko, ankaŭ, certe, esperantologio franco Andre Cherpillod (nur por ekzemplo: “La mortotuko de Torino”, “Historio de la ciferoj”, “Zamenhof kaj judismo”, “Pressis-Bourre kaj alĥemio”...). Foje liaj verkoj estas veraj “scienc-esploraj detekтиваĵoj”, sed sen la fina ĉion klariganta momento.

6. Soci-politika literaturo en Esperanto.

Ĝenerale, soci-politika literaturo en Esperanto estas abunda, sed plej ofte tradukita. Tamen ankaŭ originalaj verkoj de famaj esperantistoj ne mankas. Inter ili necesas mencii la verkojn de Zamenhof – pri hilelismo kaj homaranismo, kaj lian lastan verkon – leteron al diplomatoj. Gravan verkon “**Federala sperto**” (1958, komparo inter Usono, Svislando kaj Ligo de Nacioj) verkis **Edmond Privat**, kiu ja elstaris ne nur kiel esperantisto, sed ankaŭ kiel grava diplomato kaj politikisto. Tre gravas la verko de **Eŭgeno**

Lanti “**Naciismo**” (1930), en kiu li profunde esploras tiun socian fenomenon. Eksteresperantismajn verkojn, precipe de la jura vidpunkto, kreis ankaŭ Ivo Lapenna (“Aktualaj problemoj de nuntempa internacia vivo”, 1952, k.a.). Ankaŭ pliuraj aliaj liaj libroj tuŝas tre gravajn problemojn de la socio. Dum lastaj jardekoj tre interesajn originalajn librojn eldonis Gilbert Ledon (“Moderna mito: la kolektiveco”, 1986; “Sennaciece tra nia mondo”, 1989, “Al la tero returne, 1992 k.a.). Ekzistas tre valora artikolaro “**Soci-politikaj aspektoj de Esperanto-movado**” (1978), kompilita de Detlev Blanke, troviĝanta ĉe la limo inter literaturo politika kaj esperantologio. En 1989 aperis en Esperanto libro de Bruno Vogelmann “La nova realismo”, komence verkita en la germana kaj tradukita de la aŭtoro mem. La libro temas pri la sociaj ideoj de la aŭtoro, ĝi estis tradukita el Esperanto al 25 naciaj lingvoj.

Originalajn artikolojn pri soc-politikaj problemoj verkis ankaŭ multaj aliaj aŭtoroj, sed ili estas plejparte dissemitaj en diversaj revuoj (“Sennacieca revuo”, “Monato” kaj multaj aliaj), kaj malofte konsistigas librojn. Inter gravaj lasttempaj verkoj indas, tamen, menciigi libreton de Zlatko Tišljar “Eŭropa ideologio” (1998), ĉar tie li meditas pri la estonto kaj sorto de Eŭropa Unio lige kun neceso apliki Esperanton en la interpopolaj rilatoj.

6. Esperantologia literaturo.

Certe, la plej grava literaturo pri Esperanto kaj ĉio al ĝi rilata aperis kaj aperadas en Esperanto mem. Ĝin eblas disdividi je 1) verkoj pri la lingvo kaj ties karakterizoj, 2) pri historio kaj problemoj de E-movado kaj pri E-kulturo. Al la unua grupo apartenas lingvistikaj verkoj. Unuavice tiurilate gravas verkoj de **L. Zamenhof** mem (“**Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia**”, “**Fundamento de Esperanto**” k.a.). El verkoj de aliaj aŭtoroj plej gravis tiuj de R. de Saussure, E. Wüster, K. Kalocsay kaj G. Waringhien (PG, **PAG**, “**Lingvo, stilo, formo**”, “**Lingvo kaj vivo**”), John Wells “Lingvistikaj aspektoj de Esperanto” (1978). Samtempe al la sama grupo apartenas tiaj teoriaj verkoj pri E-poetiko, kiel “**Parnasa gvidlibro**” kaj popularaj libroj, kompreneblaj kaj utilaj al ĉiuj esperantistoj, kiel “**Esprimo de sentoj en Esperanto**” de **Edmond Privat**, “**La tuta Esperanto**” de **Henrik Seppik** (1938), “**Ne tiel, sed tiel ĉi!**” de **F. Faulhaber** (1965) kaj “**La bona lingvo**” de **Claude Piron** (1989). Gravajn informojn pri historio de Esperanto, kaj ankaŭ pri interlingvistiko (kiu ĉiam interesas esperantistojn), eblas trovi en verkoj, dediĉitaj al tiu fako, inter kiuj plej gravas verkoj de **Ernst Drezen**, speciale lia “**Historio de la mondlingvo**”

(1931, 1991)²⁹. Gravas ankaŭ diversaj bibliografioj, inter kiuj tre valoras ĝis nun “Bibliografio de Internacia lingvo” de P. E. Stojan (1929). Grandan valoron por ellaboro de la lingvopolitiko havas la libro sub redakto de Reinhard Selten (nobelpremiito pri ekonomio en 1994) “La kostoj de la eŭropa (ne-)komunikado” (1997), eldonita paralele en Esperanto kaj 3 naciaj lingvoj. En la dua grupo literaturo abundegas. Ĝin eblas disdividi je a) biografioj de Zamenhof; b) historioj pri Esperanto-movado ĝenerale kaj en apartaj landoj kaj periodoj; c) rememoroj de esperantistoj; ĉ) skizoj pri Esperanto-literaturo kaj kulturo; d) ĝeneralaj esperantologiaj verkoj.

a) Biografiojn pri Zamenhof verkis E. Privat (1920), E. Drezen (1923), M. Boulton (1962), N. Maimon (1978), Ludovikito (Itô Kanzi)³⁰, 1982. Ĉiu ili havas siajn avantaĝojn, kaj fakte suplementas unu la alian.

b) Pri fruaj jaroj de Esperanto-historio plej valoras legi 2-voluman libron de E. Privat “Historio de la lingvo Esperanto” (1923, 1927). Vere leginda estas esearo de **G. Waringhien “1887 kaj la sekvo”**. Tre ĝalora esploro pri persekutoj de esperantistoj en diversaj landoj en diversaj epokoj prezentas **Ulrich Lins en “La danĝera lingvo”** (1988). Pri historio de laborista E-movado ekzistas gravaj eldonoj **“Historio de SAT”** (1953) kaj “Vivo de Lanti” far E. Borsboom (1976). Valorajn skizojn pri historio de la movado en Sovetio en 1960-80-aj jaroj eblas trovi en libroj de D. Cibulevskij “SEJM” (1994) kaj “ASE” (2000).

c) La plej interesaj kaj enhavriĉaj estas rememoroj de **P. Lengyel, A. Saĥarov “Rememoroj de centprocenta esperantisto”, E. Privat “Rememoroj de pioniro”, R. Harry “Aventuroj en Esperantujo”**. Por rusiaj legantoj tre gravas libroj de **M. Bronŝtejn “Legendoj pri SEJM”** kaj **V. Samodaj “Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM”**.

ĉ) Esperanto-kulturologio, eĉ literatura kritiko, estas prezentita plejparte en apartaj artikoloj en revuoj, recenzoj, ankaŭ antaŭ- kaj postparoloj. Menciindas gravaj verkoj de Lajos Tárkony (Totsche) “De paĝo al paĝo” (1932), Drago Kralj “Kvar prelegoj pri la Esperanta literaturo” (1960), W. Auld “Vereco, distro, stilo”, (1981) kaj “Kulturo kaj internacia lingvo” (1986). Tre interesa por ĉiu interesiĝanto pri E-kulturo estas kolekto de diverstempaj kaj diverstemaj eseoj de K. Kalocsay “Dek prelegoj” (1985). Pri frua periodo de de E-a literaturo donas kompletan bildon la trivoluma

²⁹ Inter modernaj interlingvistikaj libroj, verkitaj ne en Esperanto, sed tradukitaj al ĝi, indas mencii tiun de Umberto Eco “La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo” (1994).

³⁰ La plej grava merito de la japana esperantisto Itô Kanzi – Ludovikito – estas eldono kaj reeldono de plena kolekto de verkoj de Zamenhof kaj ĉiuj eldonaĵoj, kiuj aperis antaŭ 1900 (“esperantaj inkunabloj”), dank’ al kio ili nun atingeblas por esperantologoj kaj ĉiuj dezirantoj kun ili konatiĝi.

“Krestomatio de Esperanta literaturo” de István Szerdahelyi (1979, 81, 82). Ampleksajn skizojn de historio de E-a liteaturo kaj kulturo oni trovas en “Esperanto en Perspektivo”, en “Gvidlibro por supera ekzameno”, en “Panoramo de Esperanta literaturo” (1979) de Marinko Ĝivoje kaj “Studoj pri la Esperanta literaturo” (1980) de Vilmos Benczik. Pri E-teatro verkis kelkajn studojn Zofia Banet-Fornalowa.

d) La plej gravaj verkoj estas **“Enciklopedio de Esperanto”**, kiun iniciatis kaj ĉefredaktis Ivan Ŝirjaev kaj redaktis I. Kókény kaj V. Bleier (1933-34), **“Esperanto en perspektivo”**, kiun verkis kaj ĉefredaktis Ivo Lapenna kaj kunverkis U. Lins kaj T. Carlevaro (1974). Ili povas doni superrigardon al ĉiuj problemoj, rilataj al Esperanto. Ekzistas tiaspecaj libroj pli koncizaj, kaj tial pli oportunaj por uzado. Inter ili la plej valora estas **“Gvidlibro por supera ekzameno”** sub redakto de Alfonso Pechan (1979). Bedaŭrinde, la bildo pri la lastaj 20-25 jaroj de la evoluo de Esperantomovado kaj kulturo, ĝis nun ne reflektiĝis en iu tia resuma libro.

7. Vortaroj.

Vortaroj estas la ĉefaj atestiloj de la reala stato de la lingvo, normigas ĝin kaj servas ankaŭ kiel gravaj rimedoj por lingvouzado. La vortaroj povas esti Esperanto-nacilingvaj, nacilingvaj-esperantaj kaj pure esperantaj kun klarigo de la vortoj per esperantlingvaj difinoj.

En la Unua Libro troviĝis vortareto – listo de ĉ. 900 radikoj. Poste Zamenhof kompilis pli ampleksajn vortarojn. La Universala vortaro, aprinta en 1894, havis 2599 radikojn, en la Fundamenton ĝi eniris kun 2666 radikoj, kiuj havas tradukojn al kvin lingvoj (angla, germana, franca, rusa kaj pola). Al tiu vortaro, kies vortprovizo estas konsiderata “fundamenta”, AdE de temp’ al tempo aldonas listojn de novaj “oficialigitaj” vortoj – entute 1759. Bedaŭrinde, pri oficialigo de vortoj AdE okupiĝas ĉiam malpli aktive³¹. Ĉiuj cetera vortoj, eĉ komunuzaj, eĉ jam uzitaj de Zamenhof mem, de la rigora vidpunkto povas esti konsiderataj kiel “neologismoj”. Reale, tiajn vortojn, kiuj venas el la bezonoj de la vivo mem pro apero de novaj nocioj kaj disvolvo de la malnovaj, neniu vere konsideras “neologismoj”: per tiu termino oni nomas nur vortojn, arbitre enkondukitajn de certa aŭtoro kiel sinonimoj de komunuzataj vortoj “por pliriĉigi la lingvon”. Foj-foje, vere, tiaj novaĵoj enradikiĝas en la lingvo, sed pli ofte – ne. Inter adeptoj de

³¹ Estas amuze, ke pluraj ofte kaj komune uzataj vortoj restas “neoficialaj”. A. Löwenstein en postparolo al sia romano “La Ŝtona Urbo”, rakontas, ke ĉiam penis eviti neologismojn, sed ne sukcesis, kaj donis la liston de la uzitaj neoficialaj vortoj, inter kiuj: agnoski, areo, bankedo, ekzotika, etoso, feki, investi, koncipi, kultivi, mesaĝo, peniso, persvadi, pisi, sugestii, ŝablono, ŝoki, teamo, torturi, tribo, versio (mi prezentas nur parton el ŝia listo!).

enkondukado de neologismoj-sinonimoj estis foje eĉ famaj kaj bonaj aŭtoroj, kiel A. Grabowski, K. Kalocsay, F. De Diego, K. Piĉ.

Naciaj vortaroj. Nacilingv-esperantaj kaj Esperant-nacilingvaj vortaroj tre varias laŭ amplekso de malgrandaj instruaj vortaretoj ĝis seriozaj sciencaj verkoj, kiuj gravas por ĉiuj esperantistoj sendepende de ilia gepatra lingvo (almenaŭ por vortaristoj kaj seriozaj lingvistoj kaj verkistoj. Principojn por krei bonajn vortarojn (kiun devas sekvi ĉiuj bonaj vortaristoj) ellaboris en 1910 E. Grosjean-Maupin. En la Esperanto-francan vortaron li inkludis, laŭeble, ĉiujn vortojn, kiuj troviĝas en la literaturo, por helpi al uzantoj kompreni ajnan tekston. En Franca-esperanta vortaro, laŭ li, male, devas esti vortoj, rekomendataj por uzado (do, ĝi plenumas la normigan funkcion). Inter naciaj vortaroj plej gravas ĝis nun la “Esperanto-germana enciklopedia vortaro” de Eugen Wüster (aperis nur la unuaj kvar volumoj ĝis la litero “K” en 1923-1929).

Esperanto-esperantaj vortaroj. La unua estis “Vortaro Esperanto-Esperanta” de Emile Boirac (1909), prezidanto de Bulonja UK kaj la unua prezidanto de AdE. Tiun vortaron sekvis “Vortaro Esperanta”, verkita de Kabe (1910), kiu donis bonajn difinojn de la vortoj kaj ĝeneraligis la normon. En 1930 aperis Plena Vortaro – PV – (en 1934 – ties korektita dua eldono, plurfoje represata), kun kompilis E. Grosjean-Maupin, G. Waringhien, A. Esselin kaj – por “teknikaj” vortoj – S. Grenkamp-Kornfeld kun 6900 radikoj. Suplemento de G. Waringhien el 1953 aldonis pliajn 966 radikojn. PV estis la plej grava fonto de normigo de la lingvo, sed ne estis sufiĉe plena, kaj oni longe strebis prepari Plenan Ilustritan Vortaron (PIV). En 1955 aperis la unua volumo de “Ilustrita Vortaro de Esperanto” de F. Azorin (ĝis litero “K”), kun ilustraĵoj en la teksto kaj etimologiaj notoj, sed, sub influo de G. Waringhien (evidente pro sento de konkurenco), I. Lapenna kaj ĝenerale AdE, anoncis ĝin “kontraŭfundamenta”, kaj la dua volumo, bedaŭrinde, ne aperis. Nur en 1970 G. Waringhien sukcesis finprepari kaj aperigi PIV-on kun ĉ. 15600 radikoj kaj ilustraj tabeloj en la fino; en 1987 aperis “Suplemento” al ĝi. PIV fariĝis la plej aŭtoritata lingva fonto. Tamen, ĝi nun iom malnoviĝis, kaj, ĉar la aŭtoroj estis ĉefe francoj, en ĝi foj-foje troviĝas francismoj. Nun estas finita laboro pri revizio de PIV far Michel Duc Goninaz, la eldono devos okazi en 2002. Ekzistas kelkaj utilaj vortaroj de ne-PIV-aj vortoj (neologismoj), kiuj helpas al la legantoj de komplikaj verkoj – “Neologisma glosaro” de Henri Vatré (1986) kaj “Nepivaj vortoj” de André Cherpillod (1988).

Inter aliaj gravaj vortaroj necesas nomi ampleksan volumon de Rüdiger Eichholz “Esperanta bildvortaro” (1988), kie bildoj kun subskriboj (368 bildkompleksoj!) klarigas diversajn flankojn de la vivo kaj diversajn fakojn. Inter esperantaj terminoj, troviĝantaj en la vortaro, 407 radikoj ne troviĝas en

PIV. Elstaran signifon havas ankaŭ multvoluma “Etimologia vortaro de Esperanto” de Ebbe Viborg (1989-2001).

Esperanto-rusaj vortaroj. La unua serioza vortaro, post vortaro de 1905, estis “Plena E-R vortaro de Saĥarov” kun ĉ. 9000 vortoj (1916, poste pluraj reeldonoj), poste aperis en 1929 vortaro de V. Sutkovoj. Ilia amplekso, tamen, estas ne sufiĉe granda. Sed reale bona vortaro aperis nur en 1974: “E-R vortaro” de Eugenij Bokarev, redaktita de Viktor Grigorjev kun 26000 vortoj. Bedaŭrinde, ĝi jam malnoviĝis, kaj, krome, ne sufiĉe grandas. Proveldono kun korektoj de Igorj Galiĉskij aperis en 2000, tamen tio estas provizora solvo de granda bezono.

Rusa-esperantaj vortaroj. Plej granda amaso de tiaj vortaroj estis ne sufiĉe grandaj kaj plenumis nur instruan rolon. Post vortaroj de Zamenhof menciindas granda vortaro de N. Korzlinskij k.a. (1910), A. Saĥarov (1916), E. Spiridoviĉ (1928). Sed vere bonan “Grandan R-E vortaron” kompilis V. Kolĉinskij kaj I. Izgur (1931), kiu, kvankam multflanke malnoviĝis, ĝis nun restas la plej bona. En 1966 aperis 24-milvorta “R-E vortaro” de E. Bokarev, tamen ĝi ne estas kontentiga por serioza moderna tradukisto.

Fakaj terminaroj. Fakaj terminaroj estis prilaborataj de multaj esperantistoj-fakuloj kaj ekzistas por dekoj da fakoj. Ilia amplekso, kvalito kaj utilo por nefakuloj povas esti tre diversa. Kiel ekzemplon de faka terminaro, utila por vastaj rondoj de esperantistoj pro komuna uzado de komputiloj, kaj pro alta filologia kvalito, eblas noti “Komputikan leksikonon” de Sergio Pokrovskij (1995).

8. Teatro

Esperanto-teatro havas tre longan historion, kvankam ĝi ne atingis grandan evolustaton, ĉar ĝi nepre bezonas konstantan publikon, kiun dissemi tra la tuta mondo esperantistaro ne povas disponigi. Tial plejparte teatraj prezentoj limiĝas je 1) amatoraj klubaj grupetoj; 2) bonaj, ofte profesiaj trupoj, prezentantaj spektaklojn nur sporade dum kongresoj kaj aliaj grandaj E-renkontiĝoj; 3) neesperantistaj profesiaj trupoj, parkerigitaj tekstojn por prezenti spektaklon antaŭ esperantistoj³² (“papagoj”, laŭ trafa difino de Vladimir Soroka). Teatro bezonas tekstojn de teatraĵoj kaj prezentojn antaŭ la publiko. La unua apartenas al literatura branĉo, la dua – al specife teatra arto.

1) Originalaj teatraĵoj. Tradukitaj teatraĵoj apartenis al la unuaj provoj de beletra tradukado: ili konsistigas, ekzemple, grandan parton de la traduka heredaĵo de Zamenhof. Tamen originalaj dramverkoj aperis sufiĉe malfrue – ĉ. 1905 – kaj ĝis nun ne tro multas. Inter la unuaj originalaj teatraĵoj eblas

³² Kiel tio efektiviĝas, oni povas kompreni laŭ rakonto pri tia okazintaĵo en la libro de V. Samodaj “Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM”.

nomi “Gustaf Vasa”, kiun verkis en 1910 Reinhold Schmidt. En 1913 sekvis versodramo “Ginerva” de Edmond Privat, prezentita tiujare en Berna UK. Samepoke Roksano (Jeanne Flourens) verkis plurajn originalajn teatraĵojn, i.a. “La fianĉiniĝo de Sovagulineto”. Post la unua mondmilito aperis pluraj originalaĵoj, plejofte mallongaj kaj ofte humure temantaj pri E-movado far Nikolaj Hohlov (“Morto de delegito de UEA”), Julio Baghy, Raymond Schwartz (kolektitaj en “Verdkata testamento”), Felix Hiller (“Ho, tiuj fremduloj!”). Baghy kaj Schwartz plu laboris tiukampe ankaŭ post la dua mondmilito. Baghy verkis vere elstaran triaktaĵon “Sonĝo sub pomarbo”. Krome, solidan kontribuon al originalaj dramverkoj faris Marjorie Boulton (kies unuaktaĵoj estas kolektitaj en “Virino ĉe landlimo”) kaj Emilia Lapenna (kolektoj “Teatro en societo” kaj “Nova teatro”). Giorgio Silfer verkis teatraĵon “Doktoro Rosales” (1973), Valdemar Vinař – monodramon “Ĉerande de abismo”. Plurajn amuzajn skeĉojn kaj teatraĵojn, daŭrigante la tradicion de Schwartz, sed instrucele, nuntempe verkas dum lastaj jardekoj Stefan MacGill (“Najbaroj kaj Boroj”, 1989 kaj kelkaj aliaj kolektoj); parto de liaj teatraĵoj kaj skeĉoj estas speciale verkitaĵoj, tamen, por eduki komencantojn. Ĉefe la saman celon – paroligi kursanojn – havas unuaktaĵoj de E. V. Tvarožek (“Ni ludas teatraĵojn”, 1971). Julian Modest estas aŭtoro de dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof “Ni vivos!”, kolektoj “Doktoro Braun vivas en ni. Kripto” (1987), “Invento de l’ jarcento” (1992). Kelkajn primovadajn teatraĵojn verkis Bernard Golden (“Antaŭ la kursoj”, 1994).

2) La unua konata en la historio teatra prezento okazis en 1896 en Smolensk, kie lokaj esperantistoj prezentis sub gvido de Aleksandr Zakrevskij komeidieton de Lev Tolstoj “Unua brandfaristo”, tradukitan de V. Burenkov. Amatora kluba teatro ekzistas de tiu tempo ĝis nun; ĝi ludas gravan rolon en la kluba vivo, lingva kaj E-kultura progresigo de la klubanoj, sed ne havas seriozan kulturan signifon.

Dum unuaj UK-oj okazis teatraj prezentoj nur per amatoraj fortoj. Tiaj prezentoj okazadis ankaŭ poste. La unua vere profesia teatra prezento okazis dum la 4-a UK en Drezeno en 1908 en Reĝa Operejo. Tio estis “Ifigenia en Taŭrido” de Goethe, tradukita de Zamenhof, kaj reĝisorita de Emmanuel Reicher. Ludis profesiaj aktoroj el diversaj germanaj teatroj. La brila prezento pruvis la eblecon fari vere profesionan teatron en Esperanto. La tradicio daŭris ankaŭ poste, kaj estis kelkaj spektakloj sukcese luditaj de profesiaj aktoroj ankaŭ en aliaj UK-oj, kvankam ne en ĉiuj.

Grandan rolon en Esperanto-teatro ludis Julio Baghy – mem profesia aktoro, kiu faris teatro-prezentojn jam en militkaptitejo en Siberio, kaj multege reĝisoris kaj ludis en spektakloj en intermilita periodo, kaj en aktoraj trupoj, kaj sola kun diversaj roloj kaj skeĉoj.

En la 20-aj jaroj aperis Esperanto-kabaredo, kiu, diference de aliaj E-teatroj, povis kontinue ekzisti samloke dum jaroj. Temas, tamen, ĉefe pri Parizo, kie agis Raymond Schwartz. En 1920-27 funkciis lia *kabaredo* “*Verda Kato*”, en 1936-39 – “*Bolanta kaldrono*”, kaj en 1949-59 – “La tri koboldoj”. Li mem plejparte verkis por la prezentoj, reĝisoris kaj ludis tie. La kabaredoj faris prezentojn ankaŭ dum UK-oj, kaj fine de la 1930-aj – en radio. Poste, laŭ tradicio kaj parte materialo de Schwartz, en Parizo ekzistis kabaredo “*La ruza kruĉo*”, gvidita de Ĵak le Puil.

IAT. Internacia Arta Teatro funkciis inter 1958 kaj 1969, ĝin fondis kaj direktis Srdjan Flego. Ĝin partoprenis diversnaciaj profesiaj aktoroj kaj teatraj teknikistoj. La teatro prezentis entute 33 teatraĵojn dum 53 prezentoj en diversaj grandaj esperantistaj renkontiĝoj (inkluzive UK-ojn), plus dum du propagandturneoj en 1959 kaj 1960 (tamen inter ili nur du originale esperantajjn). En la teatraj prezentoj partoprenis 36 geaktoroj el diversaj landoj, sed konstante, krom Flego mem, ludis Jana Ravsel kaj Mladen Ŝerment.

BET. Bulgara Esperanto-Teatro estis fondita en 1959 surbaze de grupo de aktoroj-esperantistoj el teatro “*Trudov Front*” en Sofio. La teatro, kies konsisto kelkfoje renoviĝis, ekzistis ĝis la mezo de 1990-aj kaj prezentis dekojn da spektakloj. Ĝi estis la plej longdaŭre ekzistinta kaj plej fekunda profesia E-trupo en la historio.

Pola Esperanto-teatro (PET) je la nomo de Antoni Grabowski prezentiĝis en diversaj landoj kaj kelkaj UK-oj. Ĝin fondis aktora geedza paro Kalina Lieńkiewicz kaj Zbigbew Dobrzyński, kaj ĝi ekzistis inter 1971 kaj 1981.

En 1971 komencis agadon E-trupo en Parizo kun teatraĵo “*La reto*” de J. L. Saudian-Rousseau. Surbaze de pluraj sukcesaj prezentoj de tiu teatraĵo en 1976 naskiĝis, kaj dum kelkaj jaroj aktivis, *TESPA* – *Teatro Esperanto en Parizo* sub gvido de George Lagrange. Ĝi prezentis modernajn teatraĵojn en iom modernisma karaktero, krome, eldonis teatran revuon “*La kulisoj*” kaj lanĉis, daŭrigante tradiciojn de R. Schwartcz, kabaredon “*Ruza kruĉo*” (sub gvido de Ĵak le Puil). *TESPA* praktikis diskutojn kun la publiko post la prezentoj, kio celis plibonigi funkciadon de esperantlingva teatra arto.

Post 1981 en Francio funkciis ankoraŭ “*Krizalido*” – Teatro Internacia en Akvitanio, kiu prezentis spektaklojn en diversaj aranĝoj, inkluzive internaciajn, ĝis 2000.

Leningrada-Peterburga E-teatro estis fondita en decembro de 1978 de Viktor Gohŝtejn, Oleg Popkov, Aleksandr Iovlev. En spektakloj ankaŭ partoprenis kelkaj aliaj peterburgaj aktoroj: Gennadij Rudenko, Nikolaj Lavrov, Raŝid Ĥajrullin, Anastasia Popkova. Ili prezentis apartajn scenojn, klaŭnadojn, sed ankaŭ scenojn el “*Hamleto*”, spektaklon laŭ “*Dekdu*” de A.

Blok, monospektaklon “Songŝo de ridinda homo” laŭ F. Dostojevskij (O. Popkov), kaj aliajn. Ili prezentis siajn spektaklojn en disversaj E-renkontiĝoj en Sovetio, Hungario, Bulgario, Svedio; la lasta ilia prezento (laŭ fabeloj de Donald Bissad) okazis en 1995 dum UK en Tampere.

Pro malfacileco kolekti profesian aktoran trupon de esperantistoj en Esperanto estas tre oftaj prezentoj de “Teatro de unu aktoro”. Inter aktoroj, kiuj prezentis multajn monospektaklojn, estas ruso Nikolaj Rytjkov, gepoloj Karina Wackiewicz, Jadwiga Gibczynska kaj Jerzy Fornal, ĉeĥino Eva Seemannová, kroatino Vida Jerman, ka.

En 84-a UK en Zagrebo bone prezentigis nova trupo de profesiaj kroataj aktoroj “*Ponto*” kun moderna teatraĵo de Miro Garvan “La plej longa tago de Maria Theresia” kun Vida Jerman en la ĉefrolo.

Pup-teatroj. Plurajn teatraĵojn oni prezentadis en Esperanto en pupteatroj. Tion oni atingas facile, ĉar por la pupteatraj aktoroj estas pli kutime parkerigi tekstojn en diversaj lingvoj, ol por aliaj aktoroj, des pli en Esperanto (la aktoroj, tamen, pro tio ne fariĝas esperantistoj). Dum PIF-oj (Pupteatraj Internaciaj Festivaloj) en Zagrebo ekde 1968 okazis esperantlingvaj prezentoj de trupoj el diversaj landoj (ankaŭ el Sovetunio) dum ĉ. 25 jaroj.

9. Kinoarto

Kinoarto, kvankam proksima esence al la teatra, diference de la lasta postulas multe da materiaj rimedoj, kaj fakte en Esperantujo ne aperis. Estis kelkaj filmoj, sonigitaj en Esperanto. En 1934 Jean Forge, profesia kinoreĝisoro, sonigis en Esperanto plentempan filmon “Morgaŭ ni komencos la vivon” (originale germanlingvan). Similaj provoj okazis ankaŭ poste, la plej famaj, en 1987-88, estas du esperantigitaj hungaraj filmoj: “En Eŭropo ie” kaj “Mefisto”.

La solan plentempan (duon)profesian ludfilmon – iom ironian krimfilmon “Angoroj” – faris en 1966 Jacques Louis Mahé. La arta valoro de tiu filmo estas, tamen, ne tro alta, kaj de aktoroj oni eĉ povas aŭdi lingvajn erarojn.

Estas strange, sed ankaŭ nun, malgraŭ ebleco pli facile kaj nemultekoste fari ludfilmojn dank’ al videotekniko, neniu signifa filmo dum la lastaj jardekoj aperis.

10. Kanta kulturo³³

Tiu ĉi tereno de Esperanto-kulturo estas preskaŭ ne esplorita sisteme, kvankam poeziaj tekstoj en Esperanto estis kantataj de la unuaj jaroj de la organizita movado, kaj komuna kantado estas grava faktoro por ligi la esperantistaron en “familian rondon”. Post apero de vortoj de «La Espero» –

³³ Tiu ĉi ĉapitro estas kompilita kunaŭtore kun V. Melnikov.

baldaŭ kreigis pluraj variantoj de melodio por ĝi, kaj kun la muziko de F. Menu de Menil «La Espero» iĝis himno de Esperanto, nepre parto de ĉiuj oficialaj ceremonioj. Tamen ni malbone scias, kion kantis niaj antaŭuloj en la kluboj, ĉetablaj, dum renkontiĝoj... Eblas dume iom sekvi la historion nur de la lastaj du-tri jardekoj, sed ankaŭ ĝin ne plene.

Pluraj kantistoj famiĝis en Esperanto-movado dum lastaj jardekoj. Nepre menciindas O. Tzaut (Svisio, disko «Tra la mondo» – kantoj de diversaj landoj), V. Damjanov (Bulgario, du diskoj kun operaj arioj kaj aliaj klasikaĵoj); Nikolin' (lirikaĵoj). En USSR ĉ. 1970 aperis gramofondisko kun litovaj popolkantoj en Esperanto. Inter junularo tre popularas skandiaj rok-grupoj «Persone», «Amplifiki», franca rok-kantisto JoMo (Jean-Marie Leclerc) ka. Dum multaj jaroj furoras profesia nederia folkloro grupo «Kajto» kun altnivela esperantlingva programo, eldoninta plurajn kasedojn kaj kompakt-diskojn. Tamen la plej grava kontribuo por la lingvo el la kanta kulturo indas konsideri la aŭtorajn, bardajn kantojn, kie originala teksto kaj la melodio prezentas unuigon kaj estas riveliĝo ne tiom da muzikaj, kiom da lingvaj valoroj. El tiaj aŭtoroj elstaras Claude Piron (Belgio-Svisio, kasedo «Frandu piron» – ĉefe humuraj kantoj); Ĵak Le Puil (Francio, pluraj kasedoj kun bardaj kantoj), poloj Jan Stanisław Skorupski kaj Georgo Handzlik.

Ekzistas pluraj kantaraj de diverslandaj kantoj, eldonataj ĉie pro diversaj celoj (turismaj kantoj, porkomencantaj, dumvojaĝaj, religiaj, ktp.), kun kaj sen muziknotoj. Bedaŭrinde, nur malmultaj estas sufiĉe zorge kolektitaj kaj aranĝitaj. Plejparte, tamen, en tiuj kantaraj estas tradukoj de diversnaciaj kantoj (ne ĉiam la plej lertaj) kun pluraj eraroj pri aŭtoreco, tradukintoj ktp.

Esperanto-Rok-Asocio – EUROKKA – ekzistanta en Francio ekde 1988 (ekde 1991 – faka sekcio de TEJO) eldonas neregulan gazeton «Rok-gazet'», dediĉitan ne nur al Esperanta rok-muziko, sed ankaŭ al aliaj popularaj muzikaj ĝenroj, kaj kolektojn de muzikregistraĵoj “Vinilkosmo” de la plej popularaj kantistoj.

Ankaŭ en Rusio ekzistas diversaj ĝenroj de kantoj. Famaj Esperanto-poetoj (antaŭ ĉio K. Gusev) multe tradukis popularajn sovetiajn kantojn en Esperanton; en 1960aj jaroj estis eldonitaj kelkaj kantaraj. Junularaj tendaroj postulis aperon de malpli seriozaj kantoj – por «amika rondoj», pri niaj realaĵoj. 15-20 kantoj estas tre konataj kaj tradicie kantataj en ĉiuj nialandaj E-renkontiĝoj dum multaj jaroj; instruado de kantoj kaj «komuna kantado» ĉiam okupas gravan lokon en programo. La 1970aj jaroj iĝis epoko de «prunteŝtelitaj melodioj» – oni verkis E-tekston por popularaj melodioj. Oni ĝis nun kantas «Ne, ne, ne» de D. Lukjanec kaj «Orienton» de L. Novikova. Tamen la bardaj kantoj ne povis ne evolui al pli alta nivelo. Ankaŭ M. Bronŝtejn komencis de la pruntitaj melodioj (ĉefe el Beatles – «Sezonoj», «Amata lando»), sed proksimume ekde 1980 ekverkis plene originalajn

kantojn (“Novaj kondiĉoj”, “Zimbabve” kaj multajn aliajn). Laŭ la stilo kaj talento oni ofte komparas lin kun V. Vysockij³⁴. Tre popularas lia ciklo «Verda ĝardeno» – pri apero de ASE; ankaŭ postaj «Radikoj de dubo» k.a., pluraj ŝercaj kaj satiraj kantoj. Estis eldonitaj kelkaj kasedoj kaj unu kompaktdisko.

El aliaj nunaj rusiaj Esperanto-bardoj menciindas M. Povorin («Velura sezono», «Printempa melankolio», «Fajrereto», «Nekonkrete homo»), A. Obrezkov kaj grupo «Ekvinokso» («Urbo sur Neva» k. m. a.); M. Koĉetkova.

Ankaŭ esperantlingvaj “estradaĵoj” evoluis en Sovetio kaj Rusio en 1980-90-aj jaroj. Komence de 1980-aj aperis grupo de Vladimir Soroka (Poltavo, poste Jalto, en 1990-99 loĝis en Svedio). Tio estis la unua profesia E-ensemblo en nia lando. La unua (kaj la sola grandformata) gramofondisko «Destin’». Meze de 1980aj ekkantis Ĵomart Amzeev (Kazaĥio), komence sola, baldaŭ – duope kun Nataŝa Gerlaĥ. Iliaj kantoj, ofte tristaj, treege popularas inter junularo, kvankam iom similas inter si. Mini-gramofondisko «Somera mondo», pluraj kasedoj, kaj k-disko “Valso por amikoj”. Ankaŭ tiu dueto elmigris al Svedio.

En Rusio estis eldonitaj pluraj kantaroj, menciindas la serioj de Ju. Paseĉnikov (1989-91, 10 kajeroj) kaj de Ju. Karcev (1999-2001, dume 3 kajeroj). Granda parto de la plej popularaj inter rusiaj esperantistoj kantoj de 1960-aj-90-aj jaroj estias kolektita en 2001 laŭ iniciato de Garik Kokolija sur du kompaktdiskoj “Amata lando” kaj “Ni renkontiĝos”, estas planata la 3-a disko.

V. Gazetaro kaj libroeldonado

Esperantan gazetaron oni povas dividi je priesperantaj nacilingvaj gazetoj kaj periodaĵoj en Esperanto. La unuaj servas por informi neesperantistan publikon pri la lingvo internacia kaj havas ekskluzive aŭ plejparte propagandajn celojn. Inter ili lastatempe en Rusio ekzistis “Ruslanda Esperantisto”, eldonita en Jekaterinburgo 6-foje jare. Kelkaj gazetoj eldoniĝas/is en du lingvoj: la nacia kaj Esperanto. Tio povas havi propagandajn celojn (“La Ondo de Esperanto” de A. Saĥarov, “Franca Esperantisto” k.a.) aŭ, servante ankaŭ E-propagandon, esti kaŭzita de nacia cenzuro, kiu postulas paralelajn tekstojn por facila kontrolado de la enhavo. Ambaŭ specoj de nacilingvaj gazetoj estas sufiĉe malmultaj.

Proprasence Esperanto-gazetoj (en la mondo da ili aperadas nuntempe pli ol 300) estas movadaj, kulturaj (ofte gravaj movadaj gazetoj povas havi ankaŭ kulturajn partojn, kaj la kulturaj enteni movadajn informojn) kaj fakaj.

³⁴ Kantojn de V. Vysockij tradukis N. Lozgaĉev (“La birdo Gamajun”, 1989).

Dum la lasta tempo inter E-periodaĵoj de ĉiuj specoj ĉiam pli gravan rolon ludas Interretaj eldonoj.

Dum la lasta tempo inter E-periodaĵoj de ĉiuj specoj ĉiam pli gravan rolon ludas Interretaj eldonoj.

1. Movadajn gazetojn eldonas lokaj, naciaj kaj internaciaj movadaj instancoj, aŭ ili povas esti sendependaj. Ili varias de unufolia kluba bulteneto ĝis ampleksaj kajeroj kun varia enhavo.

1a. Internaciaj movadaj gazetoj.

Esperantisto (antaŭ la 4-a kajero de 1892 — “La Esperantisto”). La unua en la historio gazeto, kiun redaktis Zamenhof mem. Ĝi estis lanĉita en septembro 1889 kaj ĉesis ekzisti en aŭgusto 1895 pro cenzura malpermeso disvastigi ĝin en Rusio (kie troviĝis tri kvaronoj de la abonantoj), ĉar en ĝi aperis traduko de malpermesita artikolo de Lev Tolstoj “Prudento kaj kredo”. Entute aperis 66 numeroj. La gazeto solidarigis la komencan E-komunumon kaj, fakte, vivigis la novan lingvon.

Lingvo Internacia. Post ĉeso de “Esperantisto” fine de 1895 tiu nova gazeto transprenis la rolon de la antaŭa. Ĝin redaktis odesano Vl. Gernet kaj eldonis en Upsalo svedo V. Langlet. En 1897-1901 ĝin redaktis. Ekde 1901 ĝin redaktis sinsekve P. Lengyel en Hungario, parizanoj P. Fruictier kaj Th. Cart. La gazeto ĝisvivis la unuan mondmiliton. Entute aperis 252 kajeroj.

Esperanto estis fondita en 1905 de franca esperantisto Paul Berthelot. En 1907 li transdonis ĝin al Hector Hodler, kiu ĝin faris organo de UEA kaj redaktis ĝis la morto. Tiu ĉiumonata revuo (fakte, ĝi aperas 11-foje jare) estas la ĉefa gazeto de Esperanto-movado kun la plej granda eldonkvanto. En ĝi aperas ne nur novaĵoj de UEA kaj raportoj pri UK-oj, sed gravaj artikoloj pri stato kaj problemoj de E-movado, novaĵoj pri landaj kaj fakaj asocioj, recenzoj pri libroj, plenaj listoj de novaperintaj libroj kaj esperantaĵoj, ktp.

Kontakto. Ĝi estas eldonaĵo de TEJO, aperanta ekde 1963; traktas precipe ne movadajn, sed ĝenerale kulturajn kaj sociajn temojn. Estas destinita por junaj kaj komencantaj esperantistoj, tial uzas facilan lingvaĵon kaj limigitan vortaron.

TEJO Tutmonde. Oficiala organo de TEJO, eldonata ekde 1983 komence dumonate, poste 4-foje jare. La lingvaĵo, diference de “Kontakto”, ne estas simpligita. Temas pri vivo de la organizo kaj aliaj E-movadaj aferoj.

Heroldo de Esperanto. Estis fondita en 1920 de Teo Jung en Kolonjo kiel sendependa gazeto sub la nomo “Esperanto Triumfonta”, en 1925 ricevis la nunan nomon. Nur fine de la 1930-aj “Heroldo” rolis kiel organo de IEL, dum la tuta alia tempo estis sendependa. La redakcio dum la longa historio troviĝis en diversaj landoj kaj urboj (dum la dua mondmilito la gazeto ne aperadis). La aperritmo estis diversa: jen ĉiusemajna (eĉ kelkatempe –

dufojoj dum semajno!), jen dusemajna, ĝis reduktiĝis ĝis 16-foja jare. Jarŝanĝe 1961/62 T. Jung transdonis la “Heroldon” al Ada Fighiera-Sikorska, kiu redaktis ĝin fakte ĝis sia morto en 1996. Post tio ĝi trafis en manojn de raŭmismoj el “Kooparativo de Literatura Foiro” kaj fariĝis tribuno de iliaj ideoj. Nun HdE estas, fakte, organo de “Esperanta Civito”, do jam reale ne sendependa, forte kontraŭstaranta al la tuta tradicia movado.

Sennaciulo. Organo de SAT, ekzistas ekde 1924 (kun kelkaj paŭzoj). Estis periodoj de ĉiusemajna aperritmo, nuntempe aperadas ĉiumonate. Krom oficialaj asociaj informoj, konsistas el kontribuajtoj de legantoj — membroj de la asocio, al kiuj ĝi ja apartenas; ĉiuj frakcioj kaj la junul-fako rajtas informi pri sia agado sur la paĝoj de la gazeto. Plej oftas artikoloj pri gravaj sociaj temoj kaj laborista movado en diversaj landoj, diskutoj pri tiuj temoj, informoj pri SAT-kongresoj. Dum pluraj jardekoj la ĉefredaktoro estis N. Barthelmess, dum lastaj ĉ. 30 jaroj ĝin redaktas ĝenerala sekretario de SAT Kreŝimir Barkoviĉ. Krom “Sennaciulo”, apud SAT estas eldonata dumonata diskutrevuo “*Laŭte!*”.

Esperanto-Gazeto. Eldonaĵo de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto (fondita cele al praktika aplikado de la lingvo, sed opozicie al la lapennisma UEA). Aperadis en 1966-72 (ĝis 1968 — sub la nomo “IOE-Gazeto”) en Beogrado 10-foje jare. Redaktis la fratoj Tibor kaj Antonije Sekelj. Entute estis emisiitaj 65 numeroj.

Eventoĵ. Ĝi estas la plej juna internacia movada gazeto, eldonata ekde 1992 en Hungario (redaktoro – László Szilvasi³⁵), kaj nuntempe – la plej ofta en Esperantujo (aperas 2-foje monate). Traktas nur primovadajn temojn, kaj ne tuŝas problemojn de E-literaturo ks. Ekzistas la reta versio “Ret-info”.

1b. Rusiaj kaj sovetiaj movadaj gazetoj.

Mejdunarodnij jazik (*Международный язык*). Teoria kaj organiza monata revuo de SEU, ruslingva kun E-resumoj. Aperadis de majo 1922 ĝis januaro-februaro 1936. Diverstempe havis ankaŭ aliajn titolojn: “Bjulletenĵ CK SESS”, “Izvestija CK SESS”, “Izvestija CK SESR”, “Sovetskij esperantist”.

Aktuale — en 1973-79 samizdata monata informilo de SEJM, aperis 61 numeroj. Plej longtempaj redaktoroj — V. Ebel (Barnaul) kaj V. Aroloviĉ (Moskvo).

Kurte — operativa informfolio de SEJM (1976-79, n-roj 1-57), poste sendependa (1979-82, n-roj 58-136). Redaktis vilniansanoj: V. Ŝilas, poste S. Gaidamaviĉius.

³⁵ Notindas, ke en 1993-96 kiel helpredaktoroj en la redakcio de “Eventoĵ” sinsekve laboris esperantistoj el Rusio N. Gudskov kaj A. Junusov.

Informacionnyj bjulletenj ASE — oficiala informilo, neregula, plejparte ruslingva. Dum la 10 jaroj (1979-89) aperis 73 numeroj. Respondeca redaktoro — N. Zubkov.

Konkordo. En 1989 Nikolao Grišin, loĝanta en Latvio, fondis informilon, plejparte ruslingvan, de Asocio de Invalidoj-Esperantistoj. Post la disfalo de Sovetunio ĝian redaktadon transprenis Salavat Sahibgarejev, loĝanta en Baŝkirio. Nun ĝi aperas 4-foje jare. Enhavas interesajn artikolojn pri E-historio kaj aliajn materialojn nur en la rusa lingvo.

Moskva Gazeto. Estis lanĉita en 1990 kiel komuna eldono de moskvaj E-organizoj kun ĉefredaktoro Elena Ŝevĉenko. Ekzistis ĝis 1995. Fakte plenumis rolon de la ĉefa movada organo en Rusio, en ĝi estis publikigataj ankaŭ literaturaĵoj kaj recenzoj.

Ruslanda Esperantisto. RE estis eldonata ekde aprilo 1905 ĝis komenco de 1908 (entute 31 numeroj) sub redakto de A. Asnes. Posta peno renovigi ĝin en 1910 fakte ne sukcesis. En 1991 samtitolan monatan primovadan gazeton A. Korĵenkov kun H. Gorecka lanĉis en Sverdlovsk (nun Jekaterinburg). Komence ĝi estis informilo de Urala E-Societo, kaj dum ekzisto de REA (febr. 1992-nov. 1994) — ties organo. Meze de 1997 ĝia enhavo estis transdonita al LOdE, kaj RE fariĝis dumonata ruslingva informilo pri Esperanto. Post 2001 la redakcio decidis ĝin ne plu aperi.

Bulteno de REU — dumonata, plejparte 1-folia, eldonata ekde novembro 1995 ĝis junio 2000. Entute aperis 27 numeroj, el kiuj 15 redaktis Elena Ŝevĉenko. Ekde aŭtuno 2000 oficialaj materialoj de REU aperas en samtitola rubriko de REGo

REGo – Rusia Esperanto-Gazeto – estas la plej nova landskala E-periodaĵo, tamen jam ricevinta grandan popularecon. Ĝi estas komuna organo de REU kaj REJM, publikigas ties oficialajn materialojn kaj ankaŭ plurajn artikolojn, informojn kaj diskutojn pri E-movado en Rusio kaj ĝenerale, havas literaturan parton “Cerbe kaj kore”. Ĝin redaktas Garik Kokolija.

1c. Alilandaj movadaj gazetoj.

Plejmulto de landaj asocioj havas siajn organojn kun informoj primovadaj, ofte ankaŭ kun prilingvaj, historiaj, literaturaj, distraj paĝoj. La plej frua estis la eldonata ekde 1898 gazeto de L. de Beaufront **L’Esperantiste** (dulingva – franca kaj Esperanta). Ĝi malaperis en 1908, kiam Beaufront forlasis Esperanton, sed ĝin anstataŭis **Franca Esperantisto**, parte franclingva, kiu (kun kelkaj paŭzoj) aperadas ĝis nun. Ankaŭ aliaj gazetoj ekzistas dum pluraj jardekoj.

Bulgara Esperantisto — unu el plej longtempaj landaj E-revuoj, organo de BEA, aperas ekde 1919. En 1960-aj -80-aj jaroj estis ĉiumonata (nun —

kvaronjara), amase abonata de sovetianoj kaj konstante publikigis materialojn el USSR.

der esperantist — dumonata, parte germanlingva, informilo de E-istoj, unuigitaj en Kulturligo de GDR (post la fondo de GDREA en 1981 — ties organo), eldonata en 1965-90. Ĉefe primovada, ankaŭ kun soci-politikaj kaj esperantologiaj eroj. Dum preskaŭ la tuta periodo ĝin redaktis Detlev Blanke.

Budapeŝta Informilo. Ĝin eldonis ĉiumonate de 1970 ĝis 1990 Hungara E-Asocio (komence — ties Budapeŝta Teritoria komitato), tamen ĝi publikigis primovadajn informojn kaj diverstemajn artikolojn ne nur rilatajn al Hungario, sed multe pli vaste. En la periodo, kiam en Sovetio ne estis eldonataj oficialaj regulaj revuoj, ĝi estis facile abonebla, kaj sovetianoj konsideris ĝin la plej atingebla primovada informilo. Komence de 1980-aj estis eldonata suplemento al ĝi: la revuo “*Sciencaj komunikaĵoj*”.

2. Kulturaj kaj soci-politikaj gazetoj.

2a. Internaciaj kulturaj kaj soci-politikaj revuoj.

La Revuo. La unua pure kultura revuo en E-o, konsideranta E-on kiel fakto sen diskuto pri reformoj, propagando ks., estis fondita de Karlo Bourlet en septembro 1906 kaj ekzistis ĝis aŭgusto 1914 kiel ĉiumonata 64-paĝa eldono. Sur 48 paĝoj tie aperadis tradukoj de Zamenhof kaj kontribuoj de aliaj plej bonaj tiutempaj aŭtoroj (Kabe, Grabowski, Hodler k.a.), kaj sur 16 paĝoj – informoj de diversaj E-societoj, sciigoj kaj anoncoj. Ĝin eldonis la franca eldonejo Hachette. Ĉiujare ĝi organizis literaturan premi-konkurson.

Literatura Mondo. Tio estis la plej fama – pro alta nivelo kaj kvalito de kontribuajtoj – en la historio kultura revuo en Esperanto. En 1922 ĝin fondis kaj komence redaktis en Budapeŝto Teodoro Schwartz. En 1924 la redaktadon transprenis J. Baghy kaj K. Kalocsay. Malgraŭ tre valora enhavo kaj gravaj internaciaj kontribuajtoj, ĝi ĉesis pro financaj malfacilaĵoj en 1926, tamen renaskiĝis en 1931 (paralele aperis samtitola libroeldonejo) kun la samaj ĉefredaktoroj sub administrado de Vilhelmo Bleier. En 1939 ĝi ĉesis pro la milito. En 1947-49 LM denove aperis, sed devis ĉesi pro la stalinisma influo en Hungario. En 1974-76 japanaj esperantistoj reprenis en ses volumoj la kompletajn jarkolektojn de LM por ke ĝi estu pli bone atingebla por novaj generacioj de esperantistoj.

Sennacieca Revuo, fondita en 1921, estis dekomence organo de SAT, sed en 1924, kun fondo de “Sennaciulo”, fariĝis eldono literatur-sciencia. Ekde 1946 aperas nova serio de SR, ekde 1952 ĝi estas valora ĉiujara kultura almanako kun gravaj artikoloj pri historio, scienco, kulturo, socio kaj literaturaj kontribuajtoj.

La Praktiko. Fondita de Andreo Cseh en 1930 kiel eldonaĵo de Internacia Esperanto-Instituto, poste ĝin eldonis UEA. Monata revuo, “kiu instruas kaj

amuzas”, belaspekta, ilustrita kaj bone redaktata, aperadis kun pluraj interesaj informoj ĝis 1970.

Malgranda Revuo. Dum la dua mondmilito, en 1942, en la neŭtrala Svedio Stellan Engholm ekeldonis literaturan revuon, kiu tenis la torĉon de Esperanto kaj montris, ke kultura vivo en Esperantujo ne mortis eĉ en tiu kruela periodo. La revuo ekzistis ĝis 1952. Ĝia heredanto fariĝis “Norda Prismo”.

Paco. Publicistika kaj beletra revuo, organo de MEM. Aperadis en 1953-73 laŭvice en diversaj landoj (inkluzive 4 sovetaĵajn numerojn), en 1974-90 dumonate en Bulgario (□un ekstraj diverslandaj numeroj), en 1991-95 en Belgio. Enhavis artikolojn pri porpaca batalo, kulturo kaj historio de diversaj landoj, E-movado, esperantologio, ankaŭ poemojn kaj prozaĵojn.

Norda Prismo. Dumonata, fondita en 1955 en Svedio sub redakto de Ferenc Szilagyi (en 1967 lin anstataŭis William Auld) kaj ekzistis ĝis 1973. Estis unu el la plej valoraj literaturaj eldonoj. Komence de 1990-aj estis peno revivigi ĝin, sed la nova revuo ne sukcesis.

Nica Literatura Revuo. Lanĉita en 1955 sub redakto de Gaston Waringhien kaj aperadis 6-foje jare ĝis 1962. Bedaŭrinde, tiu valorega eldono, kiu publikigis elstarajn literaturajojn de la plej bonaj aŭtoroj, ekzistis ne longe. En 1962-66 UEA provis eldoni propran literaturan revuon “Monda Kulturo” sub redakto komence de W. Auld, poste de A. Albault, sed ĝi ne sukcesis longe ekzisti.

Kulturaj Kajeroj, modeste aspekta sed varia enhave revuo aperadis de 1958 ĝis 1998. Ĝi estis dumonata, poste trimonata eldonaĵo de Esperantista Kulturdomo Greziljono en Francio.

Literatura Foiro. Fondiĝis en 1970 laŭ iniciato de italo Georgio Silfer (Valerio Ari) kiel organo de la literatura rondo “La Patrolo”, poste la revuo nomis sin oficiala daŭriganto de “Norda Prismo”; estis eldonata kun diversa aperritmo, sed ĉefe 6-foje jare. Apartenas al Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop) kaj ekde 1993 estas ankaŭ organo de Esperanta PEN-Centro. En diversaj jaroj ĝin redaktis mem G. Silfer, lia edzino Perla Martinelli kaj bulgario Ljubomir Trifonĉovskij (ĝis nun), sed ĉiam sub idea gvidado de Silfer. La revuo estas tre altkvalita nivelo: en ĝi aperas brilaj artikoloj pri la monda kaj Esperanta kulturoj, problemoj de la stilo, planlingvistiko (dum kelkaj jaroj en 1980-aj estis eĉ eldonata aparta revueto “*Planlingvistiko*” kiel branĉo de LF), originalaj kaj tradukitaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj, literaturkritikaj artikoloj, recenzoj. Ideologie, tamen, ĝi estas laŭtparolilo de ekstrema formo de raŭmismo, agordita malamike rilate al tradicia E-movado; lastatempe ĝi fariĝis unu el ĉefaj propagandiloj de la “Pakto por la Esperanta Civito”. LF-koop, krom la gazeto, ankaŭ eldonas librojn.

Fonto. La plej longe aperanta seninterrompe pure literatura revuo en Esperanto – ekde 1980 ĉiumonate, kaj akumulinta la plej grandan amason da literaturaĵoj. Aperas en Brazilio, eldonata de Gersi Alfredo Bays kaj redaktata de Gerrit Berveling.

La Kancerkliniko. Satira revuo, eldonata de Ĵak Le Puil k.a.en Francio ekde 1976: komence 4-foje, poste 6-foje jare. Krom interesaj literaturaj kontribuoj, ĝi primokas eventojn okazantajn en E-movado kaj ĝenerala socio, publikigas erotikaĵojn kaj “maldecajn” ŝercojn.

Monato. La plej ambicia kaj serioza ĵurnalisma entrepreno dum la tuta E-historio, aperinta laŭ iniciato (kaj sub redakto) de germana ĵurnalisto Stefan Maul en 1980. Diference de plimulto de aliaj E-gazetoj ĝi aperas rigore ĉiumonate sen malfruiĝoj. Aspekte kaj enhave ĝi imitas nacilingvajn semajnajn revuojn (tamen, por ke la revuo estu “Semajno”, kiel estis planite komence, reale ne sufiĉis fortoj de esperantistoj). Senescepte en M. aperadas originalaj kontribuoj, sed ne tradukoj el naciaj eldonaĵoj. Diference de nacilingvaj gazetoj ĝi publikigas diverslandajn materialojn de landanoj mem, tial ili estas pli fidindaj (eĉ se foje ne tiom profesinivelaj) ol artikoloj de eksterlandaj ĵurnalistoj. La aŭtoroj de diversaj artikoloj apartenas al diversaj politikaj ideologioj, kio garantias ĝeneralan politike plurisman etoson de la gazeto. Ofte publikigis interesaj eseoj pri diversaj lingvoj de la mondo. Materialoj pri E-movado kaj komunumo tute ne aperas, sed ofte – originalaj rakontoj, noveloj kaj eseoj. En M aperas tre multaj recenzoj pri novaj libroj en Esperanto, tial ĝi helpas sekvi la aktualan staton de E-literaturo. Nuntempe ĝin eldonas Flandra Esperanto-Ligo.

La Gazeto. Ekde 1985 ĝin eldonas 6-foje jare E-klubo de la urbo Metz (Francio) sub redakto de Eŭgeno kaj Madelaine de Zilah. Ĝi publikigas artikolojn pri esperantologiaj problemoj, monda kaj E-kulturo, originalajn kaj tradukitajn verkojn, recenzojn ktp.(krom poezio, ĉar la redakcio opinias, ke poemoj en Esperanto estas publikigataj multe en aliaj revuoj, kaj por LG pli gravas artikoloj pri poezio, da kiuj estas nemulte aliloke). Kultura kaj scienca nivelo de LG estas sufiĉe alta, oni ĝin eĉ difinas “gazeto de intelektuloj por intelektuloj”.

2b. Naciaj kulturaj revuoj.

La Ondo de Esperanto. LOdE estis fondita en Moskvo de A. Saĥarov en februaro 1909. Komence estis parte ruslingva. Ĝi aperadis ĉiumonate ĝis aprilo-majo 1917. Tio estis tre grava eldonaĵo, publikiganta diversspecajn primovadajn kaj kulturajn informojn. En 1991 samtitolan gazeton lanĉis A. Korĵenkov kun H. Gorecka kiel etan kultur-literaturan eldonaĵon. Ekde julio 1997 ĝi ŝanĝis sian karakteron kaj formaton (absorbinte la enhavon de RE), fariĝante enhave kaj primovada, kaj kultura, aperanta tre regule ĉiumonate. Ekde 1999 ĝi konceptas sin sendependa internacia revuo. La enhavo estas

riĉa, altnivela kaj valora, sed kun evidenta influo de raŭmismo kaj kun tendenca informado pri la movado en Rusio.

Cerbe kaj Kore. Etformata monata organo de Moskva Literatura E-Klubo, eldonata kun paŭzoj en 1990-2000. Redaktis V. Samodaj, dum lasta periodo – V. Melnikov. Samtitola rubriko ekzistis sub redakto de M. Bronŝtejn en “Moskva gazeto, nun – aperas en “REGo” sub redakto de V. Melnikov.

Scienco kaj Kulturo. Diverstema revuo (52 paĝoj), eldonata laŭ iniciato de Gennadij Ŝilo de *Eŭropa Jura Universitato Justo* en Moskvo ekde fino de 1995, 6-foje jare. Enhavas tradukitajn kaj originalajn artikolojn pri tre diversaj temoj (scienco, historio, juro, kulturo, E-movado...) kaj ene troviĝas 20-paĝa kajero kun tradukitaj kaj originalaj poeziaĵoj kaj prozaĵoj, recenzoj pri novaj E-libroj kaj priliteraturaj eseoj. Redaktas V. Samodaj.

El Popola Ĉinio. Fama revuo, kiun aperigis en 1950-2000 (kun paŭzo en 1954-56) Fremdlingva Eldonejo, poste Ĉina E-Ligo. Temis ĉefe pri la ĉinaj kulturo kaj vivo, priesperantaj paĝoj estis nemultaj. En 1970-90-aj – la plej bela kaj profesinivela farita revuo en Esperanto, ĉiumonata, kun abundaj koloraj fotoilustraĵoj, tial tre populara inter esperantistoj. Interesiĝantoj pri ĉinaj historio kaj kulturo povis ĉerpi tie tre multe, kvankam aktualaj ofte estis “lakkovritaj”. Nun aperas ne plu surpapere, sed plu ekzistas en Interreto.

Hungara Vivo. Revuo de Hungara Esperanto Asocio, fondita en 1961 kiel kvaronjara, poste iĝis dumonata. Redaktis sinsekve Mihély Gergely kaj Vilmos Benczik. En ĝi estis abundaj kaj interesaj informoj pri Hungario, kaj samtempe – pri E-kulturo (originalaj verkoj de diversnaciaj verkistoj, kritikaj artikoloj, recenzoj ktp). Fakte, ĝia signifo estis tiu de internacia revuo, kaj ĝi iusence anstataŭis iaman “Literaturan Mondon”. Ĝia kvalito estis garantiata de la brilaj kulturaj tradicioj de la hungara esperantistaro. En 1960-aj-80-aj jaroj HV estis fakte la sola kultura revuo en Esperanto, facile akirebla en Sovetio, kie ankaŭ sovetiaj esperantistoj povis foj-foje kontribui. Bedaŭrinde, en 1990 ĉesis.

L'Omnibuso. Dumonata revuo, aperadis en Japanio de 1964 ĝis komenco de 80-aj jaroj. Estis literatura tribuno de japanaj aŭtoroj. En 1990-aj dum kelkaj jaroj en Japanio aperadis dumonata kultura revuo “*Riveroj*” sub redakto de Mine Yositaka.

Nuntempa Bulgario. Monata kultura revuo (ekde 1962 — E-versio de kelklingva prilanda revuo). Aperadis belaspekte inter 1957 kaj 70-aj jaroj, precipe pri Bulgario, sed ankaŭ kun kontribuajoj pure esperantistaj. Estis unu el la plej facile atingeblaj bonkvalitaj esperantaĵoj por sovetianoj en tiu tempo.

L'Omnibuso. Dumonata revuo, aperadis en Japanio de 1964 ĝis komenco de 80-aj jaroj. Estis literatura tribuno de japanaj aŭtoroj. En 1990-aj dum kelkaj jaroj en Japanio aperadis dumonata kultura revuo “*Riveroj*”.

Litova Stelo. Aperadis en kelkaj periodoj: 1914-?, 1922-26, 1935-40 kaj ekde 1991 ĝis nun. Nuntempe – la plej belaspekta kaj enhavriĉa inter landaj E-revuoĵ, daŭre aperantaj paperforme, simila strukture al iama “Hungara Vivo” – temas kaj pri litovaj kulturo kaj vivo, kaj pri originala E-kulturo.

3. Fakaj gazetoĵ.

3a. Instruaj kaj instruistaj gazetoĵ.

Juna Amiko. La plej fama kaj longe ekzistanta revuo por lerneĵanoĵ kaj komencantoĵ. Eldonas ĝin en Hungario ekde 1973 ILEI (komence HEA kun aŭspicio de ILEI). Komence aperadis 3-foje jare, ekde 1987 – 4-foje jare. Ĝi uzas sen piednotoĵ 1500 radikoĵn. Tre gravas, ke JA ne nur prezentas facilajn kaj amuzajn tekstoĵn, sed ankaŭ klerigas legantoĵn pri diversaj flankoĵ de E-kulturo. La unua kaj nuna redaktoro estas Géza Kurucz, intertempe redaktis O. Knichal kaj S. MacGill.

Internacia Pedagogia Revuo. Altkvalita kvaronjara metodika revuo pri problemoj de E-instruado, eldonata de ILEI, ricevata de ĉiuj ĝiaĵ membroĵ.

Kara Amiko. 2-monata revuo de “Kastora Klubo de Esperanto”, lerneĵana asocio kun centro en Polio, gvidata de Barbara Chmielewska.

Komencanto. Eldonas en Jekaterinburg V. Kudrjavcev. Interesa kaj utila enhave, sed ne tre impona aspekte.

3b. Sciencaj gazetoĵ.

Internacia Sciencia Revuo. Lanĉita en 1904 laŭ iniciato de P. Fructier kaj post la fondo de ISAE en 1906 fariĝis ties organo. Ĝi ĉesis en 1911. Entute aperis 8 grandformataĵ volumoĵ kun ĉ. 4 mil paĝoĵ. Poste estis pluraj provoĵ reaktivigi ĝin – jen kun tiu, jen kun alia titolo; la plej longa estis “Bulteno de ISAE” (1926-39).

Sciencia Revuo. Eldonaĵo de ISAE ekde 1949. Enhavas artikoloĵn pri tute diversaj sciencaj branĉoĵ – de lingvistiko ĝis matematiko kaj ĉiuj natursciencoj. Aperritmo en diversaj jaroĵ estis diversa, kaj multe dependis de aktiveco de redaktoroĵ – de 2 ĝis 12 fojoĵ jare.

Sciencia Mondo. Revuo pri sciencaj kaj sociaĵ problemoj, E-versio de la kelklingva oficiala organo de Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj. Aperadis 4-foje jare dum 1976-89 en Bulgario, redaktoro — prof. Vasil Peevski.

Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj. Diversfaka sciencia revuo, parte dulingva (E-a kaj ĉina), kiun oni sufiĉe neregule aperigas ekde fino de 1980-aj en Ĉinio.

Medicina Internacia Revuo (ekde 1964, antaŭ tio – ekde 1952 – “Medicina Revuo”) – organo de UMEA, eldonata en Japanio.

Homo kaj Kosmo. Ĝi estis la plej sukcesa projekto de scienc-populara revuo en Esperantujo. La altkvalita enhave revueto pri astronomio kaj kosmonaŭtiko, ankaŭ kun E-movadaj kronikaĵoj estis eldonata dum 19 jaroj (de 1963 ĝis 1981) 4-foje jare de Astronomia observatorio de la Kroata Natursciencia Societo kaj Kroatia E-Ligo, ĉefe dank' al zorgoj de d-ro Gabriel Divjanoviĉ.

En 1987-88 en Budapeŝto estis eldonata ampleksa scienc-populara revuo "**Fokuso**", sed aperis nur 8, kvankam vere bonaj, numeroj.

3c. Revuoj de fakaj asocioj. Ĉiu faka asocio, kiu nur kapablas finance, eldonas sian gazeton. Depende de rimedoj, tio estas etaj bultenoj aŭ relative grandaj revuoj. Vd. sube ĉe "Organizoj".

4. Almanakoj.

De tempo al tempo oni eldonas sporadajn aŭ regulajn almanakojn en Esperanto. Fakte, ĉiujara regula almanako estas "Sennacieca Revuo". Por Sovetio tre gravis la eldonataj de la E-Komisiono de SSOD almanakoj "**Por la Paco**", en kiuj publikiĝis tradukoj de elstaraj sovetiaj esperantistoj (K. Gusev k.a.). – dum 1964-76 aperis entute 12 kajeroj; redaktis K. Gusev kaj poste V. Samodaj. En la 70-aj-8-aj jaroj en Sovetio estis emisiata ankaŭ la samizdata almanako "**Amikeco**" kun precipe beletra enhavo; aperis pli ol 50 24-paĝaj kajeroj, redaktis A. Rogov (Ĥmelnickij), poste K. Pill (Tallinn). En 1980-aj ekzistis tre enhavriĉaj samizdataj kulturaj almanakoj-revuetoj "**Sezonoj**" (eldonis 4-foje jare grupo de A. Korĵenkov en Sverdlovsk) kaj "**Literatura skatolo**" (eldonis A. Fjodorov en Sevastopol kaj J. Muraŝkovskij en Riga 6-foje jare); la lastan la eldonintoj provis en 1990-aj transformi al revuo "**Survoje**", sed ĝi aperadis tre neregule kaj post 17 numeroj ĉesis. En 1989 kaj 1991 tiama E-fako de la eldonejo "Progreso" en Moskvo eldonis du tre altkvalitajn kulturajn almanakojn "**Impeto**". Ĉiujarajn "**Almanakoj Lorenz**", kiuj estas parte religiaj, sed parte – beletraj, eldonas ekde 1980 brazilaj spiritistoj. Ĝenerale, almanakoj rolas gravan rolon, kiam ebloj por eldono de pli ofta kultura revuo estas limigitaj.

Kiel almanakojn eblas konsideri ankaŭ "Jarlibrojn" de UEA, "SAT-adresarojn", jarlibrojn kaj adresarojn de aliaj E-asocioj (ankaŭ de REU), donantaj gravajn kurantajn informojn pri E-movado kaj estantaj seriozaj fontoj por historiaj esploroj.

5. Interretaj eldonoj.

Esperanto tre rapide transiras al Interreto, kaj homoj, havantaj aliron al konforme konektitaj komputiloj, ĝuas eblecon pli rapide ricevi informojn kaj eĉ interŝanĝi opiniojn sen perado de redakcioj. Sur TTT-ejoj ekzistas grandaj

provizoj de diversaj informoj kaj eĉ grandaj bibliotekoj. Estas interese, ke privataj TTT-ejoj de entuziasmuloj estas averaĝe pli interesaj kaj enhavriĉaj, ol tiuj de grandaj organizoj, kiuj pro inercio ankoraŭ ne sentas gravecon de la nova rimedo. Diversaj serĉistemoj ebligas rapide trovi plurajn TTT-ejojn. Uzantoj de nur elektronika poŝto ricevas dissendatajn informilojn (ekz. *ret-info* – ret-versio de “Eventoĵ”, “*Heroldo komunikas*”, *e-rus-info*, *novosti esperanto dvihenija* – en la rusa, ks.) kaj partoprenas diskutlistojn kiel UEA-membroj, SAT-diskuto, esperanto-necenzurita, e-rus kaj dekojn da aliaj.

Retajn gazetojn eblas klasigi je:

- a) ekzistantaj paralele papere kaj rete (ekz. *LOdE*),
- b) transirintaj de papera al reta formo (*El Popola Ĉinio*),
- c) nur retaj (*Heroldo Komunikas*);
- ĉ) retversioj de E-radioprogramoj (*Pola Radio*).

Tamen oni dume ne troigu la signifon de Interreto: plejparto de loĝantaro ne havas privilegion ĝin konstante uzi, kvankam por la uzantoj ĝi komplete ŝanĝis karakteron de la esperantista vivo.

Personoj, havantaj aliron al la reto, povas trovi grandan katalogon de retaj eldonaĵoj en Esperanto en la TTT-ejo www.eventoj.hu.

6. Eldonejoj.

Librojn en Esperanto aperigas pluraj eldonejoj, landaj kaj internaciaj asocioj kaj societoj. Eldonejoj ofte funkcias apud redakcioj de gravaj revuoj. Ni mencias nur kelkajn la plej grandajn kaj historie gravajn.

Hachette (legu – Aŝet’). En 1901 tiu franca eldonejo subskribis kontrakton kun Beaufront, komisiita de Zamenhof, kaj komencis eldonadi librojn kaj periodaĵojn en Esperanto, i.a. verkojn de Zamenhof mem. Eldonadis E-librojn ĝis 1918.

Kun Hachette konkurencis *Presa Societo Esperantista* en Parizo (ĉefaj gvidantoj: Th. Cart, P. Fruictier kaj P. Lengyel). Funkciis ĝis la unua mondmilito.

Librejo “Esperanto” estis fondita en Moskvo de Aleksandr Saĥarov en 1907 kaj komencis libroeldonadon en 1908. Estis eldonitaj kelkaj libroj (de V. Devjatnin, lernolibroj ktp.), sed la ĉefa tasko estis eldonado de la revuo *LOdE*. La entreprenon pereigis la prorevolucia inflacio en 1917.

Posrednik. Tiu rusa eldonejo, disvastiganta librojn kaj ideojn de Lev Tolstoj kaj proksimaj al li verkistoj, en la periodo inter la unua kaj la dua rusaj revolucioj eldonis multajn librojn: lernolibrojn, vortarojn, tradukojn de Tolstoj kaj aliaj rusaj verkistoj (Garŝin, Korolenko, Naĵivin, Aksakov, Mamin-Sibirjak) al Esperanto. La ĉefa motoro de la afero estis d-ro N. Kabanov.

SAT. De la komenco SAT edonadis plurajn librojn – multe da soci-politika kaj scienc-populara literaturo, lernilojn (ekz., internacian lernolibron “Petro”), beletron, vortarojn. Post la dua mondmilito la eldonagado estas ne tiom aktiva, sed la libroj eldonataj estis gravaj kaj valoraj (“Vojaĝo al Kazohinio” de Szathmari, PIV). Apud SAT, tamen, ekzistas nun “Broŝurservo”, kiun gvidas Kribo (Christan Baudé), kiu ekde mezo de 1970-aj eldonis dekojn da broŝuroj (kaj foje ankaŭ pli grandajn librojn) pri diversaj temoj, kaj la popularan ne nur en SAT-medioj dumonatan revuon “*Laŭte!*”.

Literatura Mondo. La plej grava eldonejo de la intermilita periodo, kiu aperigis lingvosciencajn verkojn kaj novajn librojn de la plej bonaj tiutempaj verkistoj. Fakte, ĝi direktis la literaturan procezon en Esperanto, edukis gustojn de la publiko, stimulis la verkadon kaj plialtigis ĝian nivelon. Eblas diri ke, krom kelkaj esceptoj, preskaŭ ĉiuj bonaj libroj de la 1930-aj jaroj estis eldonitaj en LM.

EKRELO (Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo) estis fondita en Leipzig en 1930 sub gvido de ruso Grigorij Demidjuk kaj germano Walter Kampfrad. En 1933 ĝi translokiĝis al Amsterdamo. Ekzistis ĝis 1937, aperigis 73 titolojn. Eldonadis ne Stalin nur marksism-leninisman literaturon (ekz., verkojn de Stalin), sed ankaŭ esperantologiajn verkojn (de Drezen), tradukitan beletron (ekz., Lavrenjov, Majakovskij), originalan beletron (Miĥalski, Varankin, Ĥrima, Ljubin k.a.).

UEA. Eldonagado de UEA estas ne abunda, sed la asocio aperigas tre valorajn kaj gravajn kulture aŭ socie verkojn. Inter esperantologiaj verkoj gravas, ekz., PAG, inter beletraj – tradukoj de mondaj klasikaĵoj el la serio “Oriento-Okcidento” (cetere, librojn el tiu serio UEA ankaŭ mendas ĉe aliaj eldonejoj); dum lasta tempo ĝi publikigas tradukojn de la Unesko-eldonoj pri kulturo, homaj rajtoj ktp. Necesas noti ankaŭ, ke ĉiujare UEA eldonas “Jarlibron”, kiu estas gravega eldono donanta superrigardon pri la stato de E-movado, kaj “Esperantan katalogon” de sia libroservo, donantan tian superrigardon pri E-literaturo.

Stafeto. En 1952 tiun eldonejon fondis hispano Juan Régulo Pérez sur Kanariaj Insuloj. Ĝi estis eldonejo, en kiu aperadis la plej valoraj libroj en 1950-aj-70-aj jaroj. La libroj ĉiam plaĉe aspektis kaj estis perfekte redaktitaj. En tiu periodo la eldonejo, fakte, direktis la literaturan procezon en Esperantujo, malkovrante novajn talentajn aŭtorojn kaj ebligante disvolvi siajn talentojn al jam konataj aŭtoroj. Entute ĝi eldonis pli ol 80 librojn.

KOKO. Eldonejo de “Kopenhaga Konversacia Klubo” sub gvido de Poul Thorsen eldonis fine de 1950-aj-komence de 1960-aj aron da tre valoraj verkoj, fariĝintaj klasikaĵoj de nia literaturo (Kalocsay, Boulton, Szilágyi, Forge k.a.).

TK. Eldonejo, fondita en 60-aj jaroj de Torben Kehlet en Kopenhago. Eldonis plurajn elstarajn librojn (“ABZ de amo”, “Vole . . . novele”, “Kruko kaj Baniko en Bervalo” k.a.). En 1977 unuiĝis kun Stafeto kaj translokiĝis en Belgion. Inter kunaj produktaĵoj de TK/Stafeto: “La granda kaldrono”, reeldono de “Metropoliteno”, eldonado de “Monato” en komencaj jaroj k.a.

FEL. Fariĝinte aktiva en 1980-aj, nuntempe Flandra Esperanto-Ligo estas la plej vigla eldonejo de diversspecaj E-libroj. Speciale necesas noti la serion “Stafeto” de originale verkitaj novaj libroj, kiu kvazaŭ daŭrigas la tradicion de J. Régulo Pérez. La revuo “Monato” estas nun ĝia eldonaĵo.

Komisiono pri Internaciajaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj en 1960-aj-70-aj jaroj dank’ al sindona agado de K. Gusev sukcesis eldoni pli ol 30 modestaspektajn broŝurojn kun tradukoj el la klasika rusa literaturo kaj sovetiaj aŭtoroj de diversaj naciecoj (aperis ankaŭ tradukoj far Gusev el Garcia Lorca el la hispana) kaj almanakojn “Por la paco”. Tio donis la eblecon publikigi verkojn de sovetiaj esperantistoj, inter ili tiaj bonaj tradukistoj kiel K. Gusev, S. Rublov, I. Ĥoves, H. Dresen k.a. kaj prezenti la rusan kaj sovetian literaturon en Esperanto. En 1970-aj eldonis E-librojn ŝtataj eldonejoj en Estonio (pluraj tradukoj el la estona) kaj Litovio (kelkaj tradukoj el la litova kaj ekde 1970 – almanakoj “Horizontoj de Soveta Litovio” – 12 numeroj), kio daŭris ankaŭ post ĉeso de eldonoj de la Komisiono meze de 1970-aj.

HEA. En fino de 1970-aj kaj en 1980-aj jaroj Hungara Esperanto-Asocio havis eldonfakon, kiu aperigis multe da valoraj libroj, estante en tiu periodo unu el la plej aktivaj eldonejoj en la E-mondo. Tio estis kaj tradukoj el la hungara, kaj, tre grave, originalaj verkoj, ekz., deko da libroj de Nemere, k.a. Ankaŭ estis represoj de klasikaĵoj, ekz., “Enciklopedio de Esperanto” (1979 kaj 1986). Tio tre gravis por klerigo de sovetiaj esperantistoj, ĉar okcidentaj eldonaĵoj estis tre malfacile akireblaj, sed libroj el Hungario aĉetebles libere. La ĉefredaktoro kaj motoro de la afero estis Vilmos Benczik.

Fonto. La eldonejo de G. A. Bays, funkcia en Brazilio, en lastaj 20 jaroj estas unu el la plej aktivaj, kaj abunde eldonas originalajn kaj tradukitajn beletraĵojn. Eldonas samtitolan literaturan revuon.

Edistudio. Troviĝas en Italio. Eldonas ĉiam bone presitajn librojn. Ekde 1977 aperis pluraj novaj verkoj kaj tradukoj, ankaŭ reeldonitaj klasikaĵoj, entute pli ol 50 libroj.

Sezonoj. En 1980-aj en Sverdlovsk (nuna Jekaterinburg) aperis samizdata multobligita almanako “Sezonoj” kun bona enhavo, sed ne bela aspekto. Ĝi komencis multobligi ankaŭ broŝurojn kun verkoj de uralaj esperantistoj. Tion faris la geedzoj A. Korĵenkov kaj H. Gorecka. En 1991 ili komencis profesie eldoni librojn – jen kiel eldonaĵojn de memstara eldonejo “Sezonoj”, jen – kiel suplementojn al la gazeto “Ruslanda Esperantisto”. Tio estas kaj

malgrandaj lerniloj, kaj gravaj klerigaj broŝuroj, kaj bone presitaj beletraĵoj, ĉefe tradukoj el la rusa kaj el la angla (“La Majstro kaj Margarita” de M. Bulgakov, “La mastro de l’ ringoj” de J. Tolkien, kaj multaj aliaj).

Impeto. En 1988 en la ŝtata eldonejo “Progreso” en Moskvo aperis Esperanto-fako, kiu eldonis kelkajn esperantlingvajn librojn, i.a. la duan eldonon de “La danĝera lingvo” de U. Lins. En 1992 surbaze de tiu fako aperis memstara eldonejo “Impeto” (laŭ la nomo de du sukcesaj almanakoj, eldonitaj en kadre de “Progreso”). La posedantoj kaj ĉefaj agantoj de la eldonejo estas geedzoj Elena kaj Aleksandr Ŝevĉenko. Ili eldonis plurajn originale verkitajn librojn de rusiaj esperantistoj kaj de I. Nemere, tradukitajn librojn – kelkajn de la fratoj Strugackij kaj dume unu de Harry Harrison, kaj kelkajn ruslingvajn priesperantajn, i.a. la rusan tradukon de “La danĝera lingvo”.

Iltis. Eldonejo en Germanio sub gvido de Reinhard Haupental. Ekde 1989 eldonis kelkajn librojn, kiuj, laŭ ideo de la mastro (kiel li sin nomas, “Iltis skolo”), evoluigas Esperanton per ĝia pliriĉigo per neologismoj (verkoj de K. Piĉ, tradukoj far F. de Diego ks.), ankaŭ klasikaĵojn, kaj revuon “Iltis-forumo”.

KLEKS. Antaŭnelonge fondita eldonejo de pola E-isto Georgo Handzlik. Aperigas “nigran serion” de beletraĵoj, altkvalitaj enhave kaj poligrafie, inter ili lanĉis ĉiujarajn almanakojn de originalaj noveloj.

Pro Esperanto kaj **IEM** (*Internacia Esperanto-Muzeo*) en Vieno, ambaŭ sub redakto de Herbert Mayer, en 1990-aj jaroj eldonis ampleksan liston de originalaj verkoj de Ŝirjaev, Ŝtimec, de Seabra, Steele, la Ibera grupo, Piron kaj aliaj.

7. Esperanto en radio³⁶.

Radioprogramoj en Esperanto estas specifa kaj tre grava formo de periodaĵoj, ĝi permesas al esperantistoj, suferantaj pro malofteco de kontaktoj, speciale kun eksterlandanoj, konstante aŭdi vivan parolon de alinaciaj esperantistooj. Krome, la radioelsendoj donas tre freŝajn informojn (kiel raportojn el UK-oj ks.). Lastatempe radioprogramojn kun aparte altkvalitaj sonoj oni povas aŭskulti ankaŭ pere de Interreto.

Esperanto-disaŭdigojn oni provadis jam en dudekaj jaroj: en 1922 en Newark XYZ (Usono) kaj en Londono. En 1923 (12.04) oni aŭdis la unuan elsendon el Moskvo (Radio Komintern, la elsendoj daŭris ĝis 1933), samjare aperis elsendoj el montreal kaj Rio de Janeiro. En 1933 en 14 landoj oni elsendis radioprogramojn en Esperanto. La plej altkvalita antaŭ la dua mondmilito enhave estis la Praga radio (1924-1939).

³⁶ Tiu ĉi ĉapitro estas verkita kunaŭtore kun Andrej Peĉonkin.

Post la dua mondmilito esperantlingvaj disaŭdigoj okazis en Berno, sed ankaŭ en Sofio, Prago, Ostravo, Varsovio, sed en la orienta Eŭropo ili ĉiuj ĉesis en 1950-52. En 1953 eksendis Zagrebo, tiuj elsendoj daŭris ĝis 1993. En 1959 reaperis la Pola radio, kiu restas la plej grava radiostacio ĝis nun. Bedaŭrinde, la tendenco en lastaj 10 jaroj estas tendenco de ŝrumpo de E-elsendoj.

Nuntempe, sen paroli pri lokaj elsendoj je ultra-kurtondoj (FM), menciendas ke ĉe kelkaj ŝtataj radio-stacioj elsendantaj kurtonde, satelite kaj interrete ekzistas E-fakoj kiuj enhave plej ofte reprezentas la interesojn de la koncernaj ŝtatoj sed havas stabilajn programojn pri-esperantajn programerojn. Pliajn detalojn regule publikigas la revuo Esperanto, kaj ankaŭ "Amikoj de Esperanto en Radio" <osiek.org/aera>. Por aŭskulti kurtonde oni havu prefere kvalitan modernan radio-ricevilon kun preciza indiko de frekvencoj. Por aŭskulti rete (per formatoj "real audio" kaj/aŭ "mp3") oni havu koncernajn programojn libere distribuatajn.

La ĉefaj gravaj stacioj kiuj konsiderinde kontribuas al la monda E-kulturo estas jenaj:

1) Pola Radio ("Radio POLONIA"), Varsovio - konsiderata kiel la plej grava en E-ujo; ekde 1959, iam en 1980-aj ĝis ses foje tage, nun produktata nur 30-minuta programo elsendata du-foje kurtonde kaj unufoje per-satelite (nur por Eŭropo), ekde 1997 aŭskultebla rete www.wrn.org/ondemand/poland.html (eblas aŭ tuj aŭskulti, aŭ elŝuti dosieron kaj aŭskulti poste – la lasta opcio estas ordinare preferinda, ĉar eblas aŭskulti poste kiom ajn kaj distribui; en ties retejo eblas legi aktualaĵojn: www.radio.com.pl/polonia/esperanto_eo.asp. Programeroj inkludas aktualaĵojn, politikajn komentariojn, trarigardon de pola kaj e-gazetaro, kulturajn erojn kaj "Esperanto-Ekspreso" kaj "Homoj kaj Problemoj" – kun oftaj intervjuoj kun diversaj e-aktivuloj; ankaŭ "Leterkesto".

2) Ĉina Radio Internacia, Pekino, ekde 1964, ĉ. 25-minuta programo nur kurtonde kvarfoje tage. Programeroj inkludas novaĵojn, pri-kulturajn temojn, "Vojaĝo en Ĉinio", "Leterkesto" k.a. En ties retejo mankas informoj en esperanto.

3) Aŭstria Radio Internacia, Vieno, funkcias stabile de jardekoj. Aŭskultebla kurtonde unufoje dumsemajne kaj rete tutsemajne ĉe <roi.orf.at/es_infocenter.asp> – oni povas elekti ĉu aŭskulti rekte aŭ elŝuti sondosieron de 25-minuta programo. Kulturaj, politikaj kaj amuzaj programoj.

4) Radio Vatikana. Kurtonde kaj satelite nur por Eŭropo, ankaŭ perrete. Ĉefe religiaj temoj. Inf.: <http://www.vaticanradio.org/esperanto/proesperanto.htm>

5) Itala Radio – RAI. Aŭskultebla same kiel Vatikano. Inf.: www.international.rai.it/radio.index.

6) Radio Havano Kubo. Foje semajne 30 minutoj - kurtonde, sed apenaŭ aŭskultebla en Eŭropo kaj des pli plue en Azio. Sed ekde 2002 la sondosiero kun semajna programo aŭskulteblas kaj elŝuteblas el la retejo de la Aŭstria Radio. Inf.: www.radiiohc.org.

7) Koreio (Suda). Ŝajne privata reta projekto ekde 1999 de regule ĝisdatigataj ĉirkaŭ-dek-minutaj programoj kun akompanaj tekstoj kaj fotoĵoj en esperanto-radio.net.

Ne plu elsendas la iam fama Radio Bern (estis du 15-minutaj elsendoj semajne) kaj antaŭnelonge ĉesinta pro ekonomiaj kialoj Estona Radio, Tallinn (estis 20-minuta elsendo semajne). Menciendas ankaŭ provoj de iama Monda Servo de Radio Moskvo (nun Voĉo de Rusujo) faritaj en 1980 kiam kadre de la Itala Servo estis faritaj kelkaj programoj. Nemalbonan arkivon havas la retejo <osiek.org/aera> kaj tre bonan, kolektatan ekde 1997, programaron havas la retejo prizorgata de aŭstro Anton Obendorfer ĉe <start.at/retradio> - eblas aŭskulti iujn programojn kun elstaraj e-istoj. La rapide evoluantaj komputilaj teĥnologioj de sonprocezado kaj interreto esperigas ke eble baldaŭ pli verŝajne aperos aliaj esperanto-programoj. Tre ĝojigas la fakto ke la E-redakcioj de Radio Polonia, Pekino kaj Vieno ricevas plej multajn reehxojn de siaj aŭsultantoj kompare kun alilingvaj redakcioj.

VI. Organizoj

1. Internaciaj organizoj.

Akademio de Esperanto. Ĝi estas la sola esperantista organizo, kiu okupiĝas ekskluzive pri la lingva mem (kaj tial la sola absolute neŭtrala organizo el ĉiuj kaj ĉies vidpunktoj). La plej alta lingva instanco, teorie aŭtoritata por la tuta esperantistaro. Ĝiaj celoj kaj taskoj estas: 1) konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon; 2) esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton; 3) kritiki verkojn el lingva vidpunkto; 4) defendi Esperanton de ĉiuj konkurencoj. Membroj de AdE estas elektataj por 9 jaroj de la membroj mem, ĉiun 3-an jaron renoviĝas triono de la membraro.

AdE formiĝis interne de Lingva Komitato (fondita en 1905 dum la 1-a UK kun ne limigita kvanto da membroj – estis dum certaj periodoj po pli ol 100, ekzistis ĝis 1948) en 1908 dum Drezdena UK. Komence ĝi konsistis el 16-18 membroj, post malfondo de Lingva Komitato la kvanto kreskis ĝis 40-45.

Universala Esperanto-Asocio. Fondita en 1908 de Hector Hodler, kiel unuiĝo de individuaj membroj sur sennacieca bazo (sen landaj sekcioj) por praktika utiligo de Esperanto far tiuj, kiuj ĝin posedas. Tiam estis fondita sistemo de lokaj reprezentantoj – delegitoj – de UEA. En 1936 okazis skismo, pro kio de UEA apartiĝis pli granda parto sub la nomo Internacia

Esperanto Ligo, kuniginta naciajn esperantistajn societojn. Ĝi havis sidejon en Londono, kaj ĝia organo fariĝis “Heroldo de Esperanto”. En 1947 UEA kaj IEL reunuiĝis. Sidejo de UEA ekde komenco ĝis 1947 estis en Ĝenevo, en 1947-55 en Ĝenevo kaj Londono, ekde 1955 kaj ĝis nun – en Roterdamo. Ekde 1947, post unuiĝo kun IEL, ĝi fariĝis laŭstrukture kombino de individuaj membroj kaj aliĝintaj landaj asocioj. La membroj de aliĝintaj landaj asocioj, laŭ kvanto de ili anoncituraj (kaj kotizituraj), konsistigas aligitajn membrojn. Ĝi estas la plej granda kvante esperantista organizo, la kvanto de individuaj membroj en lastaj jaroj estas ĉ. 7000 el ĉ. 120 landoj, kaj la kvanto de aligitaj membroj el 62 aliĝintaj landaj asocioj estas ĉ. 12000. Aliĝi al UEA rajtas ne pli ol unu landa asocio el ĉiu lando, eĉ se en unu lando estas kelkaj konkurantaj E-organizoj. Krom la landaj, al UEA aliĝas ankaŭ fakaj asocioj (da aliĝintaj nun ekzistas ok).

La statutaj celoj de UEA nuntempe estas:

- disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
- agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
- plifaciligi la iuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi en ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

La supera organo de UEA estas elektata por 3 jaroj Komitato, kiun eniras reprezentantoj de la aliĝintaj landaj asocioj (komitatanoj A), de individua membraro (komitatanoj B) kaj komitatanoj C, elektataj de la komitatanoj A kaj B. En la komitato ĉiuj membroj egalas sendepende de la maniero de elekto. La Komitato, kolektiĝanta dum UK-oj, elektas Prezidanton kaj Estraron (inkluzive vic-prezidantojn kaj ĝeneralan sekretarion); ĉiu estrarano respondecas pri sia laborkampo.

La “ekzekutivan povon” en UEA reprezentas Centra Oficejo en Roterdamo kun kelkaj dungitaj oficistoj kape kun la direktoro, kiu plenumas diversajn funkciojn kaj servojn. En CO troviĝas Biblioteko Hodler kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado. Krom CO, en Nov-Jorko ekzistas Oficejo por rilatoj kun UN.

La ĉefa celo de UEA estas disvastigo de Esperanto, por kio ĝi organizas diversajn kampanjojn ktp., sed la ĉefaj ĝiaj funkcioj nuntempe reale estas diversaj servoj. Por plenumi la servojn inter individuaj membroj libervole funkcias ĉ. 2000 delegitoj en diversaj landoj. La ĉefajn servojn (organizado de UK-oj, libroservo, personaj kontoj de la membroj) efektivigas la CO. Ekster CO ĉe UEA funkcias ankaŭ Koresponda Servo Mondskala.

UEA eldonas ĉiumonatan revuon “Esperanto”, kiu estas ĝia oficiala organo, kaj ankaŭ librojn.

UEA troviĝas, inter ceteraj neregistaraj organizoj, en konsultaj rilatoj kun UN kaj UNESKO.

Prezidanto de UEA nun estas italo Renato Corsetti, vic-prezidantoj – usonano Humphrey Tonkin kaj koreo Chong-Yeong Lee.

Tutmonda Esperantista Junulara Movado. Ĝi estis fondita en 1938 de sino E. van Veenendaal-Bouwens kun la nomo Tutmonda Junular-Organizo, en 1956 ĝi fariĝis junulara sekcio de UEA. Individuaj membroj de TEJO estas ĉiuj individuaj membroj de UEA ĝis 30-jaraĝaj, asociaj membroj estas membroj de landaj sekcioj de TEJO, kiuj ekzistas en 42 landoj. Ĉiu individua membro de TEJO krom “Esperanto” ricevas la 2-monatan porkomencantan revuon “Kontakto”, kaj oficialan organon de TEJO 3-monatan gazeton “TEJO-tutmonde”. TEJO organizas ĉiujarajn Internaciajn Junularajn Kongresojn kaj trejn-seminariojn por aktivuloj. Komitato kaj Estraro de TEJO estas elektataj kaj funkciaj laŭ la modelo de UEA.

Inter servoj de TEJO estas “Pasporta servo”, kiu ĉiujare eldonas libron kun adreso de esperantistoj, pretaj senpage gastigi eksterlandanojn.

Sennacieca Asocio Tutmonda. Fondita dun 13-a UK en Prago (1921) laŭ iniciato de Eŭgeno Lanti. La celo estas uzi Esperanton por klasaj celoj de la tutmonda laboristaro, interŝanĝo de opinioj inter diversaciaj kaj diverspartiaj esperantistoj-laboristoj. Do, SAT ne okupiĝas mem pri disvastigo de Esperanto, sed estas per-esperanta asocio. Tamen ĝi dense kunlaboras kun landaj laboristaj Esperanto-asocioj, kiuj ja pri disvastigo de Esperanto okupiĝas. Ĝia strukturo estas sennacieca, ĉar ĝi ne havas landajn sekciojn, nur individuajn membrojn. SAT ne havas certan soci-politikan starpunkton (ĝi ja servas por interŝanĝo de diversaj ideoj, tial ties membroj ne estas “samideanoj”, sed “kamaradoj”), sed reprezentantoj de diversaj partioj kaj opinioj unuiĝas je frakcioj (liberencana, sennaciisma, liberpensula, ekologiisma, naturista ka.). Ekzistas ankaŭ SAT-junulfako (kun propra gazeto “Juna penso”).

La organo de SAT estas ĉiumonata revuo “Sennaciulo”, ĉiujare ĝi eldonas “Sennaciecan revuon”.

SAT multe okupiĝas pri kultura edukado, tial ĝi eldonas ĉiujare la kulturalan gazeton “Sennacieca revuo” kaj librojn, inter kiuj elstaras Plena Vortaro (PV) kaj Plena Ilustrita Vortaro (PIV).

Ĉiujare SAT organizas siajn kongresojn en diversaj landoj de la mondo.

Inter servoj de SAT estas “Amikeca reto” (propono al eksterlandanoj de adreso de esperantistoj, kiuj pretas helpi al ili en siaj landoj), broŝurservo.

2. Landaj organizoj.

Landaj asocioj. Por disvastigo de Esperanto en diversaj landoj ekzistas naciskalaj organizaĵoj de esperantistoj. La plej malnova estas UFE – Unuiĝo

Franca por Esperanto, fondita en 1898. Preskaŭ ĉiuj landaj asocioj estas aligitaj landaj asocioj de UEA.

Junularaj landaj asocioj. En multaj landoj ekzistas apartaj junularaj esperantistaj unuĝoj, kiuj povas esti jure memstaraj aŭ junularaj sekcioj de koncernaj landaj asocioj. Plejmulto el tiaj junularaj organizoj estas landaj sekcioj de TEJO.

Laboristaj Esperanto-asocioj. Krom “neŭtralaj” landaj asocioj en pluraj landoj ekzistas laboristaj Esperanto-asocioj (LEA-oj). Ili disvastigas kaj propagandas Esperanton en laboristaj medioj kaj inter membroj de maldekstraj kaj progresemaj partioj en siaj landoj (inter verduloj, socialistoj, anarkiistoj ktp). LEA-oj estas membra bazo por SAT, kun kiu ili kunlaboras laŭ speciala konvencio, akceptita en 1926 en Gotenburgo dum SAT-kongreso. Dum SAT-kongresoj ĉiam kolektiĝas LEA-komitato.

En 1920-30-aj jaroj LEA-oj estis multnombraj en multaj landoj; en 1920-aj ankaŭ SEU estis konsiderata LEA; post la 2-a mondmilito LEA estis konsiderata dum certa periodo ankaŭ Jugoslavia Esperanto-Ligo. Sed nuntempe ili plejparte ne estas grandnombraj. Signifa escepto estas LEA por franclingva teritorio (Francio, Valonio, Franca Svisio) – **SAT-amikaro**, kiu membrare konkurencas kun neŭtrala UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto).

Rusia Esperantista Unio (REU). Ĝi konsideras sin heredanto de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), kiu estis fondita en 1921 dum 3-a Rusia Esperanto-Kongreso. La gvidanto fariĝis Ernst Drezen. En 1938 pro reprezalioj SEU ĉesis ekzisti, sed estis restarigita en januaro de 1989 en 3-a konferenco de ASE sur ties membrobazo. Post la restarigo de SEU ĝi tuj aliĝis al UEA. La prezidanto fariĝis Vladimir Samodaj, poste – Viktoro Aroloviĉ. Decembre de 1991, dum kongreso en Kolomna, SEU transformiĝis al REU. En novembro 1994, dum Rusia Esperanto-Kongreso en Niĵnij Novgorod, REU unuiĝis kun REA. La nun funkcia Statuto estis akceptita en oktobro 1995 dum REK en Tjumeno, kaj registrita oficiale en Ministerio de Justico en januaro 1997. Inter 1991 kaj 2002 ĝiaj prezidantoj estis Viktoro Aroloviĉ, Andreo Ananĵin-Grigorjevskij (2-foje), Nikolao Gudskov, Aleksander Korĵenkov, Abduraĥman Junusov kaj Georgij Kokolija.

REJM. Rusia Esperantista Junulara Movado, memstara junulara organizo, fondita en 2000 jaro surbaze de SEJM-2³⁷. Ĝis nun ĝi ne estas

³⁷ Post disfalo de Sovetunio oni ne plu malĉifris la siglon “SEJM”, sed ĝi longe restis komuna junulara asocio por esperantistoj el Rusio, Ukrainio kaj Blankrusio. Kiam en Ukrainio aperis aparta junulara asocio, SEJM fariĝis (preskaŭ) nur rusia unuiĝo, kaj tial estis transformita al naciskala REJM.

oficiale registrita. REJM organizas kaj kunorganizas diversajn aranĝojn, unuavice SEJT³⁸-ojn kaj EoLA-jn.

Popola Rusia Esperantista Movado (PREM). Fondita en 1997 kiel rusia LEA. Ĝi okupiĝas pri diversaj poresperantaj kampanjoj en Rusio inter membroj de politikaj partioj kaj apartaj politikistoj, organizas Ago-Tagojn ktp. Kunlaboras kun SAT kaj Transnacia Radikala Partio. Prezidanto de Plenumkomitato estas Nikolao Gudskov.

2. a. Aldono. Iamaj tutrusiaj organizoj.

Ruslanda Esprantista Ligo (REL), la unua en la historio tutrusia esperantista organizo, estis fondita en 1908 per unuiĝo de Esperanto-societo “Espero” kaj junulara peterburga societo “Esperanto”. Ĝin gvidis kapitano Aleksandr Postnikov. REL havis ĝis 30 lokaj filioj kaj ĝis 900 membroj. Organizis en 1910 en Peterburgo la 1-an Rusian Esperantistan Kongreson. Sed en aprilo 1911 Postnikov estis arestita pro akuzo pri spionado, polico priserĉis oficejojn de REL kaj loĝejojn de ties aktivuloj. Kaj en aŭgusto 1911 ĝi estis fermita.

Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj estis kreita en 1961 ĉe SSOD (Unio de Sovetiaj Amikec-Societoj) kaj certgrade plenumis en Sovetio funkcion de landa asocio ĝis 1979. Ĝi okupiĝis pri eldonagado (pluraj modestaspektaj, sed enhave bonaj broŝuroj), abonigo de esperantistoj al gazetoj el “socialismaj” landoj, sendo de delegitoj al UK-oj, sed tute ne okupiĝis pri instruado kaj enlanda vivo de esperantistoj. Formale gvidis la Komisionon profesoro pri lingvistiko Eŭgeno Bokarev, post lia morto – Mahomet Isaev, sed reale ĝi estis fako de SSOD, kaj ĝin gvidis ties funkciuloj.

SEJM. Meze de la 1960-aj grupo de junaj esperantistoj, ne kontenta pri agado de pli aĝaj generacioj, laŭ iniciato de Anatolo Gonĉarov lanĉis junularan organizon **Sovetia Esperantista Junulara Movado.** Ĝi ekzistis kiel neformala unuiĝo inter 1966 kaj 1979, kiam ĝi estis dissolvita pro fondo de oficiala ASE. Ĝi organizis tendarojn SEJT-ojn (Sovetia Junulara Esperanto-Tendaro), organizis klubojn, kursojn ktp. Fariĝis kerno de E-movado en Sovetio en tiuj jaroj, ankaŭ forĝejo de aktivuloj. La ĉefaj SEJM-motoroj estis, krom Gonĉarov, Boris Kolker, Vladimir Samodaj, Viktoro Aroloviĉ, Mikaelo Bronŝtejn, Vitautas Ŝilas ka. SEJM estis restarigita en 1988 laŭ iniciato de Andreo Ananjin kiel memstara landa junulara organizo; por ne miksi ĝin kun la antaŭa asocio, oni ofte nomas ĝin “SEJM-2”.

ASE. Asocio de Sovetiaj Esperantistoj estis fondita en 1979 laŭ decido de CK de KPSU sub komuna patronado de sindikatoj, komsomolo kaj SSOD, sed fakte ĝi daŭrigis la laboron de la Komisiono kaj restis sub kontrolo nur de SSOD. Ĝi funkciis ne pli bone ol la komisiono, sed oficiala ekzisto de landa asocio permesis al sovetia esperantistaro atingi certajn sukcesojn (rapide kreskis kvanto da kluboj, renkontiĝoj kaj kursoj). Prezidanto de ASE estis profesoro pri lingvistiko Mahomet Isaev, sed pli da reala potenco apartenis al SSOD-funkciuloj – respondecaj sekretarioj.

³⁸ Post disfalo de Sovetunio la siglon «SEJT» oni malcifras kiel *Somera Esperantista Junulara Tendaro*.

REA. Ruslanda Esperanto-Asocio aperis en marto de 1992 laŭ iniciato de Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka surbaze de abonantoj de “Ruslanda Esperantisto” kun centro en Jekaterinburg. Formala prezidanto estis poeto el Perm Nikolaj Lozgaĉev. Post du jaroj, konsiderante neracie havi du landajn asociojn en Rusio, REU kaj REA unuiĝis sub la nomo REU.

3. Fakaj organizoj.

Ekzistas dekoj da diversaj fakaj E-organizoj, de tiuj de kat-amantoj kaj biciklistoj ĝis tiuj de naturistoj kaj samseksamuloj. Ni ĉi tie meciu nur la plej grandajn aŭ signife influhavaj al E-movado kaj la komunumo entute.

Internacia Scienca Asocio Eesperantista (ISAE) estis fondita en 1907 (la plej malnova E-asocio) far generalo Hyppolite Sebert. Eldonas “Sciencan Revuon”.

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) estis kreita en 1983 kun jura sidejo en San Marino, sed kun ĉefa agadcentro en Paderborn, Germanio. Fakte, ĝi estas internacia universitato, en kiu povas studi kaj ricevi sciencajn gradojn homoj el diversaj landoj. Ekzamenajn disertaĵojn ĝi postulas kaj publikigas en du lingvoj: la propra lingvo de la ekzamenato kaj en Esperanto³⁹. AIS organizas stud-sesiojn en diversaj landoj, kaj en diversaj landoj havas filiojn. Sciencajn gradojn (agnoskatajn, i.a., en Germanio) laŭ sistemo de AIS oni povas ricevi ankaŭ en Rusio. La iniciatinto kaj prezidanto – germana profesoro Helmar Frank.

Internacia Fervojista Esperantista Federacio (IFEF), fondita en 1909, estas unu el la plej multnombraj internaciaj esperantistaj asocioj (pli ol mil membroj) kun sekcioj en diversaj landoj. Eldonas “Internacian Fervojiston”, preparas fakajn vortarojn kaj terminarojn, kaj organizas ĉiujarajn internaciajn kongresojn (multnombrajn, interalie, dank’ al tio, ke fervojistoj havas eblecon vojaĝi por ferioj senpage).

Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) fondita en 1908, eldonas “Medicinan Internacian Revuon”.

Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI) estas fondita en 1949 por akceli instruadon de Esperanto, trejni instruistojn, okazigi ekzamenojn, eldoni modernajn lernilojn ktp. Ĝi havas landajn sekciojn, ekde 2001 – ankaŭ en Rusio. Organizas ĉiujarajn konferencojn. ILEI estas agnoskita de UNESKO, kun kiu troviĝas en operaciaj rilatoj. Eldonas “Internacian Pedagogian Revuon” por instruistoj kaj “Junan Amikon” por lernejanaj kaj komencantoj.

³⁹ Por distancigi de la tradicia movado, en AIS oni preferas ne uzi la vorton “Esperanto”, sed diras “Ilo” – “internacia lingvo”.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) estas fondita en 1948 por servi al ĵurnalistoj profesiaj kaj amatoraj. Eldonas gazeton “Internacia ĵurnalisto”, organizas profesiajn kursojn.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) estas fondita en 1950, kvankam la brajla gazeto “Esperanta Ligilo” aperis jam en 1904. Eldonas brajlajn kaj songazetojn, organizas ĉiujarajn kongresojn de blindaj esperantistoj.

Esperantista Verkista Asocio (EVA) estas fondita en 1983 por stimuli kaj plialtniveligi la esperantlingvan verkadon kaj agnoskigi la Esperantan literaturon en kaj ekster la Esperanto-movado; en ĝi membras ĉ. 80 verkistoj.

Esperanta Pen-Centro estis fondita en 1991 kaj estis akceptita al Internacia PEN en 1993. Unuiĝo de profesiaj verkistoj kaj eldonistoj, kiu okupiĝas pri rajtoj de verkistoj kaj interverkistaj kontaktoj. Fondita laŭ iniciato de kooperativo “Literatura Foiro” (G. Silfer k.a.); la unua prezidanto estis I. Nemere, la nuna – W. Auld.

Monda Turismo estas fondita en 1970 por faciligi turismon per Esperanto kaj por faciligi al esperantistoj vojaĝi. La centro de la organizo troviĝas en Bydgoszcz (Polio), kie funkcias turisma servo “Esperantotour”, Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo kaj Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo. Organizas Internaciajn Esperanto-Kongresojn, Internaciajn Forumojn pri Esperanto-Turismo kaj multajn aliajn aranĝojn, eldonas Turismajn Kalendarojn, kie estas menciataj ĉiuj iom signifaj E-aranĝoj. La organizo estas unu el la plej sukcesaj modeloj de la praktika utiligo de Esperanto. La ĉefa motoro kaj prezidanto – la polo Andrzej Grzębowski.

Esperanto-Fako de la Naturamika Internacio (TANEF) estas organizo de koscia naturprotektema turismo, ligita kun laborista movado, en Esperantujo – dense kunlaboranta kun SAT. Eldonas bultenon “La Migranto”.

Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) estis fondita jam en 1908. Inter esperantistoj tradicie multas vegeteranoj, kaj la asocio kaj ties organo “Esperantisto vegetarana” sufiĉe popularas.

4. Kulturaj organizoj

Pri disvolvo de Esperanto-kulturo okupiĝas multaj grandaj E-organizoj (UEA, SAT ka.). Certaj fakaj organizoj, ekz. Verkistoj kaj muzikistoj, estas, fakte, denseigitaj ĝuste al la kultura agado. Sed ekzistas specialaj organizoj, kiuj ne estas propre fakaj, sed kreitaj speciale por tiu celo.

OSIEK – Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj – aperis en 1988 por sperti altnivelan lingvouzadon en kunvenoj apogantaj kaj disvastigantaj kulturajn agadojn en Esperanto ĉirkaŭ revuo “La Gazeto”.

Krom (memkompreneble) organizo de altvaloraj kulture konferencoj, membroj de OSIEK aljuĝas prestiĝajn premiojn al gravaj verkistoj; apud ĝi funkcias AERA (Amikaro de Esperanto en Radio).

5. Politikaj organizoj.

Esperantistaj organizoj, ligitaj kun certaj politikaj ideologioj, ne multas. Tiaj estas frakcioj de SAT, tamen ili ja ne estas memstaraj organizflanke. Inter sendependaj politikaj unuiĝoj oni povas nomi nur kelkajn.

Internacia Komunista Esperantista Kolektivo, IKEK (ĝis 1996 – KEK, Komunista Esperantista Kolektivo), fondita en 1973 laŭ iniciato de la aŭstroj Franz Schick kaj Franz Haiderer. Ĝi unuiĝas komunistojn (ĉ. 300membrojn) de 50 landoj (ne nepre membrojn de sialandaj komunistaj partioj, sed ankaŭ simpatiantojn). Ĝi eldonas 6-foje jare gazeton “Internaciisto” (ĝis 1992 redaktis Franz Schick, poste – Luis Serrano Perez) kaj ekde 1992 organizas siajn internaciajn konferencojn (15-50 partoprenantoj).

“Esperanto” Radikala Asocio (ERA) aperis en 1987. Ĝi estas duosendependa poriesperanta organizo apud Transnacia Radikala Partio (TRP), inter kies idealoj kaj programoj estas ankaŭ enkonduko de neŭtrala internacia lingvo. Sufiĉe aktive agis ĉe Eŭropa Parlamento kaj Unesko. Al ĝiaj meritoj apartenas organizo de Ago-Tagoj (ekde 1988), komence en formoj de surstrataj manifestacioj favore al Esperanto (ankaŭ kolektado de subskriboj de la publiko sub leteroj por enkonduko de E-o) samtempe en diversaj urboj de la mondo (la unuan sabaton de oktobro). Poste, komence de 1990-aj jaroj, la iniciaton, en pli variaj formoj, transprenis UEA (nun Ago-Tagoj povas okazi en formo de priesperantaj standoj, prelegoj en sciencaj societoj ks., nepraj gazetaraĵoj konferencoj). De la komenco ERA estas gvidata de la sekretario Giorgio Pagano.

Mondpaca Esperantista Movado (MEM) estis fondita en 1953 de la ĉeĥo Rudolf Burda kaj aŭstra kataluno Anton Balague, por uzi Esperanton laŭ la plej eble neŭtrala en tiama orienta Eŭropo maniero. Ĝi sufiĉe bone plenumis sian celon ĝis la mezo de 1980-aj, ebligante havi al esperantistoj el tiel nomataj “socialismaj landoj” partopreni internacian E-movadon kaj pacmovadon laŭ maniero akceptebla por komunistaj reĝimoj. La slogano de MEM estis “Per Esperanto al Mondpaco”, ankaŭ nun bone memorata inter esperantistoj, kiuj jam forgesis ĝian devenon (sed kiu bone kaj klare formulas la Internan ideon). MEM eldonis la revuon “Paco”, kiu estis la plej atingebla por sovetaĵ esperantistoj, ankaŭ por kontribuoj, kaj revuon “Pacaktivulo”. Post liberalismaj ŝanĝoj en la Orienta Eŭropo bazo de MEM restis nur la malfortiĝintaj sekcioj en la Okcidenta Eŭropo.

Asocio de Verduloj Esperantistoj (AVE). Fondita en 1984, unuiĝas diverslandajn membrojn de verdulaj partioj kaj senpartiajn aŭ alipartiajn

subtenantojn de ekologiisma movado. Eldonas 1-2 foje jare revuon “Aveno”, kunlaboras kun UEA kaj SAT (parto de AVE-membroj konsistigas tie ekologiisman frakcion). Gvidas la asocion ties sekretario Manfred Westermayer el Germanio.

Esperantista Internacia Centro de Civitanoj de la Mondo estas negranda organizo kun ne tro strikte difinita ideologio de mondcivitanismo (iom proksima al sennaciismo, sed sen socialisma idealo).

Internacia Komitato pri Etnaj Liberecoj (IKEL), fondita en 1978, ne povas nomiĝi proprasence politika, ĉar ne estas ligita al iu konkreta partio aŭ partia ideologio – formale ĝi nur kolektas kaj diskonigas informojn pri etnaj grupoj por forigi diskriminacion inter ili, tamen ĝia agado reale estas influita al naci-liberigaj movadoj kun grandaj politikaj sekvoj, kiuj ja malofte limigas sin je protestoj kontraŭ etna diskriminacio, sed laŭeble strebas al ŝtataj sendependecoj. En IKEL ple reliefe reflektiĝas ideoj de la etno-defenda esperantismo. IKEL eldonas enhavriĉan revuon “Etnismo”.

6. Religiaj organizoj.

Por kelkaj religioj la ideo de Esperanto estas sufiĉe alloga, kaj foje ĝi eĉ preskaŭ eniras concernajn dogmojn (bahaismo, oomoto, spiritismo). Dank’ al tio ekzistas kelkaj fortaj religiecaj Esperanto-movadoj kaj organizoj.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), fondita en 1910 (ties organo “Espero Katolika” aperis en 1903, kaj estas la plej longe ekzistanta E-gazeto), estas agnoskita de Papo (kiu, cetere, mem iom scias Esperanton), kaj okupiĝas ankaŭ pri ekumenisma agado. Ĝi havas multnombrajn membrojn en Italio, Polio, Ĉeĥio, Litovio kaj aliaj landoj.

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) estis fondita en 1911 kaj kunlaborigas kristanojn el diversaj eklezioj (partoprenas tamen plej aktive anoj de protestantaj eklezioj) por diskonigi la Evangelion inter esperantistoj; eldonas revuon “Dia regno”.

Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) estas fondita en 1973, kvankam jam en 1910-20-aj jaroj gvidoroj de bahaismo, agnoskintaj la dogmon “unu dio – unu homaro – unu lingvo” favoris disvastigon de Esperanto kaj ĝi estis tiam instruata en bahaaj lernejoj. Ekde 1950-aj la oficiala rilato de gvidantoj de la religio al Esperanto malvarmiĝis, tamen inter bahaanoj tradicie multas esperantistoj (eĉ filino de L. Zamenhof Lidia famiĝis ne nur kiel Cseh-instruistino, sed ankaŭ kiel propagandisto de bahaismo inter esperantistoj). BEL eldonas “La BEL-mondan leteron” kaj abundan bahaisman literaturon en Esperanto.

Oomoto estas japana religio, kiu laŭ siaj principoj proksimas al bahaismo, ankaŭ favora al Esperanto. **Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto** estas

fondita en 1923 kaj eldonas luksan gazeton “Oomoto”. La asocio funkcias ĉefe en Japanio.

Spiritismo estas kriastana religio, disvastigita ĉefe en Brazilio. Ĉar spiritistoj supozas, ke la spiritoj de mortintoj en transmondo parolas komunan lingvon, ili favoras lernadon de Esperanto, kaj en Brazilio minimume duono da esperantistoj estas spiritistoj. **Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz** eldonas abundan literaturon en Esperanto.

ASISTI – Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj – estis fondita en 1989. Konsistas el sufiĉe liberpensemaj anoj de diversaj konfesioj. Eldonas bonan revuon “Asistilo”, interesan por ĉiuj, ankaŭ ateistoj.

Inter anoj de aliaj religioj ankaŭ foje ekzistas esperantistoj, tamen iliaj malgrandaj organizoj ne ludas rolon en koncernaj religioj, kaj gvidoroj de tiuj eklezioj tre ofte suspekteme rilatas al Esperanto ĝenerale. Inter ili, Kvakera Esperanto-Servo (KES, fondita en 1921), Universala Islama Esperanto-Asocio, organizoj de mormonoj, ortodoksaj kristanoj, budhistoj, kiuj jen iom aktiviĝas, jen latentigiĝas. Oni povas noti inter tiuj organizoj Tutmondan Ekumenan Ligon kaj Hilelistan Esperanto-Rondon (la lasta funkcias ĉefe en la reto).

Iom religiecan karakteron havas **Martinus-Instituto** en Danio, kiu ekde 1965 akceptis Esperanton kiel oficialan internacian lingvon kaj eldonas librojn pri spirita scienco lanĉita de la dana filozofo Martinus.

Al la religiaj esperantistaj organizoj kontraŭstaras **ATEO – Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo**, kiu funkcias jen pli jen malpli aktive, sed estas, cetere, la sola internacia unuiĝo de ateistoj.

VII. Aranĝoj kaj renkontiĝoj

Esperanto vivas dank’ al renkontiĝoj de esperantistoj. Renkontiĝoj en kluboj kaj societoj, regionaj kaj landskalaj E-aranĝoj havas gravan rolon, ĉar, unue, ili instruas la lingvouzon kaj, due, subtenas la komunumon naciskale. Pli gravas internaciaj aranĝoj, ĉar tie la lingvo funkcias en la medio, kie ĝi ne anstataŭeblas per nacia(j) lingvo(j) – ĝuste en sia rekta funkcio de la lingvo internacia. Da diversaj esperantistaj aranĝoj estas tiom, ke preskaŭ senerare eblas diri, ke ĉiutage ie en la mondo esperantistoj ie kolektiĝas kaj praktikas la lingvon – la lingvo kaj komunumo konstante funkcias.

1. Internaciaj aranĝoj

1.1. **Universalaj kongresoj (UK)** estas la plej grandaj kaj imponaj ĉiujaraj internaciaj esperantistaj renkontiĝoj, kiujn partoprenas ĉiujare de 1 ĝis 7 mil personoj. La 1-a UK estis en Bulonjo-sur-Marco (Francio) en 1905 kaj de tiu

tempo ili estis organizataj ĉiujare krom kelkaj jaroj dum la mondmilitoj. Ilian organizadon decidas UEA, organizas UEA kune kun Lokaj Kongresaj Komitatoj (LKK), sed UK-oj apartenas ne nur al UEA, sed estas aranĝoj de ĉiuj esperantistoj: fakte, UK estas kongreso de kongresoj, en kadroj de kiu okazas aranĝoj kaj jarkunvenoj de pluraj fakaj organizoj. Certe, dum UK-oj okazas kunsidoj de la komitato kaj estraro de UEA, sed ankaŭ de AdE, esperantologiaj konferencoj, strategiaj forumoj ktp., ktp. Okazas teatraj prezentoj, nepraj tradiciaj eroj estas nacia koncerto de la lando, en kiu okazas UK kaj internacia koncerto per forto de partoprenantoj, koncertoj de diversaj famaj en Esperantio artistoj, prezentado de novaj libroj, ktp. Dum UK estas enmanigataj premioj laŭ rezultoj de diversaj konkursoj, i.a. de Belartaj Konkursoj. Nepra parto de UK estas Somera Universitato kun diversaj sciencaj prelegoj. Funkcias abundega libroservo de UEA. Nepra estas organizataj pluraj ekskursoj, la turisma programo estas kompletigata ankaŭ per specialaj antaŭkongresaj kaj postkongresaj aranĝoj. Multaj aranĝoj okazas samtempe, kaj al la partoprenanto ofte malfacilas elekti, kien iri kaj kion partopreni. Infanoj de esperantistoj konsistigas Infanan Kongreseton, aparte aranĝatan de ILEI, kaj fine de la Kongreso nepre prezentas sin al la kongresanoj. Laŭ denseco de diversaj organizaj, kulturaj, sciencaj, fakaj, turismaj aranĝoj UK-oj preskaŭ egalas al sumo de ĉiuj ceteraj internaciaj aranĝoj kaj estas la plej grandaj manifestiĝoj de reala vivo de la lingvo kaj ĝia ĉiaflanka funkciado. UK-oj daŭras unu semajnon, same IJK-oj kaj SAT-kongresoj.

1.2. **Internaciaj junularaj kongresoj (IJK)** estas aranĝoj de TEJO, ofte, sed ne nepre, en la sama lando, kie UK, tuj post aŭ ĵus antaŭ ĝi. Kvanto da partoprenantoj kutime estas dekono kompare al kvanto da partoprenantoj en UK-oj. La strukturo de IJK-oj iom similas al UK-oj, sed kun junulara akcento kaj multaj distraj aranĝoj.

1.3. **SAT-kongresoj.** Ekde 1922 okazis ĉiujare en diversaj urboj de la mondo (krom neevitebla dum milita paŭzo). Ili estas asociaj aranĝoj, kiuj dum laborkunsidoj pritraktas raportojn de la Plenumkomitato kaj pridiskutas asocian vivon. Nepra estas akceptataj Deklaracioj, kiuj difinas rilaton de SAT al gravaj eventoj kaj procezoj en la mondo. Okazas ankaŭ kunsidoj de diversaj SAT-frakcioj, kunsidoj de LEA-komitato. Estas tradicio organizi renkontiĝojn kun lokaj sindikataj, politikaj kaj sociaj agantoj, ekskursojn al industriaj entreprenoj. Krom tio, dum la kongresoj nepre okazas klerigaj kaj kulturaj aranĝoj – diverstemaj prelegoj, koncertoj, dancvesperoj. Nepras turismaj eroj – tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj, ofte oni organizas antaŭ- kaj postkongresojn. En la kongresoj kutime partoprenas inter 100 kaj 400 personoj.

1.4. **Kongresoj de fervojistoj.** Inter ĉiuj aranĝoj de fakaj asocioj kongresoj de IFEF estas la plej multnombraj – ĝis 1000 partoprenantoj, sed havas, ĉefe, turisman kaj amuzan karakteron.

1.5. **Aliaj popularaj internaciaj aranĝoj kaj festivaloj.** Inter aliaj grandaj internaciaj aranĝoj necesas mencii popularajn inter junularo IJS-ojn (Internacia Junulara Semajno), organizatajn somere en Hungario) kun 100-200 partoprenantoj, IS-ojn (Internacia Seminario), okaziĝantajn en Germanio ekde 1955 ĉirkaŭ novjaraj festoj kun 200-300 partoprenantoj, kaj Internaciaj Junularaj Festivaloj (IJF), kiuj okazas ekde 1976 printempe en Italio kun ĉ. 100 partoprenantoj. Por pli aĝa generacio ĉirkaŭ novjaraj festoj okazas ekde 1982 en Germanio IF-oj (Internacia Festivalo) kun 150-200 ĉeestantoj. Inter popularaj, jam tradiciaj aranĝoj necesas noti KEF-ojn – Kulturajn Esperanto-Festivalojn, organizatajn en Skandio ĉiun duan jaron kun proksimume po 150 partoprenantoj, pluraj koncertoj, ekspozicioj kaj prelegoj pri literaturo. Jam ekde 1985 okazas aŭtune en Poznań (Polio) festivaloj ARKONES (Artaj Konfrontoj en Esperanto).

1.6. **Kulturaj aranĝoj.** Gravaj manifestiĝoj de Esperanto estas ne ĉiam multnombraj, sed valoraj enhave kulturaj aranĝoj. Inter ili indas nomi Literaturajn Forumojn kun tre altnivelaj programoj, sed nur po ĉ. 50 partoprenantoj, organizatajn de LF-koop ekde 1982, kaj OSIEK-konferencojn, ankaŭ kun vere altnivelaj programoj, sed same kun po malpli ol 100 partoprenantoj.

1.7. **Kontinentaj kongresoj.** Inter internaciaj kaj landaj aranĝoj ekzistas ankaŭ aranĝoj de diversaj mondregionoj: Tut-Aziaj kaj Tut-Amerikaj kongresoj, Eŭropaj kongresoj (ne por la tuta Eŭropo, sed nur por landoj de Eŭropa Unio), okazis ankaŭ kelkaj Afrikaj aranĝoj. Estas organizataj internaciaj renkontiĝoj por malpli grandskalaj regionoj, najbaraj landoj, kie vigligo de esperantistaj kontaktoj povas havi gravan rolon (ekz., estis kelkaj grandaj kaj sukcesaj Alp-Adriaj renkontiĝoj).

2. Landaj aranĝoj.

En ĉiuj landoj, kie ekzistas organizita E-movado, oni organizas kongresojn, konferencojn, seminariojn, festivalojn, tendarojn ktp. Tio povas esti aranĝoj de landaj asocioj, junularaj asocioj, regionaj societoj, lokaj kaj simple iniciataj grupoj. Necesas noti, ke, almenaŭ en Eŭropo, tiaj aranĝoj strebas fariĝi ĉiam pli internaciaj aŭ almenaŭ garantiu sufuĉe signifan partoprenon de alilandanoj. Kvankam tiaj aranĝoj okazas ĉie, ni notu tiujn, kiuj okazadas en Rusio (kaj antaŭe okazadis en Sovetunio).

2. 1. **Landaj kongresoj.** Rusiaj Esperanto-Kongresoj (REK-oj) havas longan tradicion. La unua okazis en 1910 en Peterburgo, la 2-a – en 1913 en Kievo. La tria, en Petrogrado en 1921, fondis SEU. La sekvaj tutsovetaj

kongresoj estis kongresoj de SEU (en 1923, 25, 26, 28, 31 – ĉiuj en Moskvo, krom en 1926 (en Leningrado). Poste oficialaj tutsovetaĵaj kongresoj ne okazis ĝis 1979, kiam estis kolektita fonda konferenco de ASE. La 2-a konferenco de ASE okazis en 1982, kaj la 3-a – en 1989, kiam ĝi estis proklamita kongreso de restarigita SEU (ĉiuj tri en Moskvo). La sekva SEU-kongreso okazis en 1990 en Moskvo. En 1991 la okazinta en Kolomno kongreso estis kolektita kiel REK (ne nur SEU ĝin organizis, sed ankaŭ SEJM), tie SEU transformiĝis al REU. La sekvaj kongresoj okazis en 1992 (Peterburgo), 93 (Soĉi) kaj havis statuson de REU-kongresoj. Ekde 1994 (en Niĵnij Novgorod) ĉiuj tutrusiaj kongresoj havis statuson de REK-oj, estante kongresoj de diversaj rusiaj E-organizoj, ne nur de REU: en 1995 en Tjumeno, en 1997 en Moskvo, en 2000 en Ĉeboksaro kaj en 2001 apud Peterburgo (marte) kaj Kostroma (decembre). La konceptoj de la kongresoj ŝanĝiĝis dum la tempo: se komence la ĉefa celo estis solvado de organizaj problemoj kaj primovadaĵaj diskutoj, dum lastaj jaroj oni ĉiam pli strebas fari REK-ojn pli diverskarakteraj kaj vere la plej gravaj landaj renkontiĝoj de esperantistoj. Ne hazarde en marto de 2001 oni tempe kaj loke proksimigis REK-on al EoLA (Serovo apud Peterburgo). Kvanto da partoprenantoj en diversaj jaroj estis inter 20 kaj 200.

2. 2. Tendaroj.

BET-oj. Tendaroj fariĝis la plej populara formo de aranĝoj en Sovetio post renaskiĝo de la movado fine de 1950-aj. Cetere, tre baldaŭ ili plej ofte okazadis ne (nur) en tendoj, sed en diversaj ripozejoj, turismaj bazejoj ks. La unua malgranda tendaro estis organizita en 1958 apud Moskvo en Alka Insulo, sed la plej grandajn tradiciajn tendarojn lanĉis en 1959 esperantistoj el Ĉebaltaj respublikoj. De tiu tempo preskaŭ ĉiujare BET-oj (Baltaj Esperanto-Tendaroj) okazadis alterne en Litovio, Latvio kaj Estonio kun granda partopreno de esperantistoj el aliaj partoj de Sovetio kaj, fakte, havis signifon de landaj kongresoj. La strukturo de BET-oj penis imiti tiun de UK-oj kun certaj lokaj tradicioj. Post sendependiĝo de la landoj la siglon “BET” oni, cetere, komencis malĉifri kiel “Baltaj Esperantaj Tagoj”, en ili malmulte partoprenas homoj el postsovetaĵaj landoj (eĉ el la Baltaj, krom tiu, en kiu koncerna BET okazas), sed multe – el Skandio kaj Okcidenta Eŭropo. Kvanto da partoprenantoj atingas 300.

SEJT-oj. Ekde 1967 aparte de BET-oj en Sovetio estis organizataj Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj, kiuj estis junulara alternativo de la “tro seriozaj” BET-oj. Tamen, la numerado de la tendaroj kontinuus numeradon de BET-oj, montrante tiel la heredecon de la tradicioj. Ili okazadis en diversaj partoj de Sovetio. Poste unu SEJT jam ne sufiĉis por la granda lando, kaj aperis Okcidentaj kaj Orientaj SEJT-oj. Junularaj tendaroj estis foje organizataj ekster SEJT-a numerado (en Taĝikio, MoskvEJT,

VolgEJT). En 1990-aj jaroj la siglon “SEJT” oni jam malĉifras kiel “Somera EJT”. Diference de ĉiuj aliaj tradiciaj aranĝoj OkSEJT-oj okazadis ĝis nun seninterrompe ĉiujare. En 1970-aj kaj 1990-aj OkSEJT-oj estis la ĉefa faktoro, kiu garantiis konservadon de la landa movado.

En OkSEJT-oj kvanto da partoprenantoj estas de 100 ĝis 300.

Ekde 1995 ĉiujare aŭtune okazas junularaj instru-distras junularaj aranĝoj por komencantoj *STRIGO*-j (Studa Renkontiĝo de Iniciatema Generacio), en kiuj kvanto da partoprenantoj ifoje superas 100, kies ĉefa organizanto estas klubo MASI (Moskva Amikaro de Studentoj kaj Instruantoj).

2. 3. Festivaloj. En Rusio (foj-foje ankaŭ en Ukrainio) ekde 1988 estas organizataj festivaloj EoLA – Esperanto – Lingvo Arta. Ili okazas printempe, kutime ĉirkaŭ la 8-a de marto, kiam aliaj aranĝoj ne estas. Kvanto da partoprenantoj – ĝis 200. Partoprenas ne nur diversaj famaj artistoj el Rusio kaj Ukrainio, sed ankaŭ eksterlandaj (ofta gasto estas, ekz., rok-kantisto el Francio JoMo).

VIII. Esperanto-centroj

Krom dum renkontiĝoj, Esperanto vivas en kelkaj konstantaj lokoj, kie ĝi estas uzata kiel ĉiutaga laborlingvo. Tio estas oficejoj de grandaj internaciaj organizoj (la plej grava estas la Centra Oficejo de UEA), internaciaj kaj naciaj internacisignifaj institutoj (kiel Internacia Esperanto-Muzeo) kaj lokoj, apartenantaj al esperantistaj organizoj, kie konstante okazas diversaj kursoj kaj aranĝoj por esperantistoj (kiel Kastelo Greziljono). Bedaŭrinde, ne ĉiuj tiaj lokoj sukcesas travivi diversajn ekonomiajn kaj politikajn malfacilaĵojn (kiel bona kursejo-ripozejo Pisanica en Bulgario), en nebula stato estas centro en Poprad, Slovakio, sed anstataŭ la malaperintaj aperas alilande novaj. Ni menciuj kelkajn.

Internacia Esperanto-Muzeo (IEM), fondita en 1929 de Hugo Steiner, estas relative memstara parto de Nacia Aŭstria biblioteko en Vieno, en Hofburg. Dum la dua mondmilito la materialoj ne malaperis, ĉar ilin oni sukcesis savi en la kelo, tamen la direktoro trafis en nazian koncentrejon. Nuntempe ĝi estas la plej signifa kolekto de libroj (ĉ. 21000) kaj diversaj dokumentoj en kaj pri Esperanto. Krome, ĝi eldonas librojn.

Internacia Esperanto-Instituto. Estas fondita en 1930 de Andreo Cseh (legu: Ĉe) kaj geedzoj Isbrücker. Troviĝas en Hago, Nederlando. Organizas seminariojn diversgradajn por Cseh-instruistoj, liveras koncernajn diplomojn.

Kulturdomo de Esperanto (Kastelo Gresillon). Ĝi troviĝas en Francio kaj estas malnova nobela kastelo kun 18-hektara parko, kiun posedas asocio, fondita en 1951. Tie estas bonaj loĝeblecoj, kursejoj, biblioteko. En ĝi konstante estas organizataj diversnivelaĵoj kursoj kaj prelegoj, ofte okazas E-aranĝoj.

Kultura Centro Esperantista en Chaux-de-Fonds (legu: Ŝodfon'), Svisio. Malnova centro, posedanta domojn kun loĝeblecoj, kie okazas diversnivelaĵoj kursoj semajnfinaĵoj kaj semajnaĵoj, ankaŭ seminarioj.

Kvinpetalo. Kvin domoj en vilaĝo Bouresse, Francio, apartenantaj al "Societo Yvonne Martinot", kie eblas loĝi kaj kie estas organizataj diversaj kursoj kaj seminarioj.

Krom IEM, gravajn kolektojn de libroj en kaj pri Esperanto (ankaŭ pri aliaj planlingvoj kaj interlingvistiko) posedas kelkaj aliaj **bibliotekoj**. La plej signifaj el ili estas la **biblioteko Hector Hodler** en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. En ĝi estas pli ol 15000 volumoj kaj ampleksa kolekto de periodaĵoj. En Londono ekzistas biblioteko Montagut Butler. En Hispanio grandega kolekto de libroj (pli ol 8400) kaj periodaĵoj (pli ol 12000 jarkolektoj de ĉ. 2500 gazetoj) troviĝas en **Hispana Esperanto-Muzeo**, oficiale inaŭgurita en 1968 surbaze de la kolekto de L. M. Hernández. En Hungario grandegan bibliotekon (ĉ. 10000 libroj kaj pluraj jarkolektoj de periodaĵoj) kolektis ekde 1970 **Károly Fáyzi. Nacia Esperanto-biblioteko** kaj Esperanto-Arkivo de Itala Esperanto-Federacio estis fondita en 1972 de M. Dazzini; en ĝi estas pli ol 7000 volumoj. En **Nacia Esperanto-Muzeo** en Francio estas pli ol 6000 libroj, ĝi konstante okazigas priesperantajn ekspoziciojn. Apartaj kolektoj de Esperanto-libroj kaj dokumentoj (ne tiom signifaj) ekzistas ankaŭ en aliaj landoj. Ekzemple, A. Korjenkov kaj H. Gorecka lanĉis en Jekaterinburg grandan **Komunan Esperanto-Bibliotekon** (nun ĝi troviĝas en Krasnojarsk). Menciindas ankaŭ **Internacia muzeo de Paco kaj Solidaro** en Samarkando, Uzbekio. Ĝin fondis kaj direktoras A. Ionesov; en ĝi troviĝas ĉ. 20000 eksponaĵoj el 100 landoj (ankaŭ libroj).

IX. Instruado de Esperanto

Esperanto-kursoj por la plejmulto da E-instruantoj (laŭeduke plej ofte eĉ ne instruistoj) estas kromokupo, samkiel studado de Esperanto — por E-lernantoj. Grandparte nome tio kaŭzas specificecon de E-instruado, kiun devas konsideri ankaŭ profesiaj fremdlingvaj instruistoj⁴⁰.

⁴⁰ Por ricevi pli sistemajn teoriajn sciojn pri didaktiko kaj metodiko, rilataj al la fremdlingva instruado, estas rekomendindaj la sekvaj libroj: Rudolf Rakuša, Metodiko

1. La celoj de la instruado kaj motivoj de lernado

La ĝeneralaj celoj de E-instruado estas, unue, havigi al la lernantoj lingvoposedon (t.e. kapablon kompreni, paroli, legi kaj skribi en Esperanto) kaj, due, formi el ili esperantistojn (t.e. homojn, kiuj praktike uzos la lingvon kaj emos ĝin disvastigi).

La praktiko montras, ke devigaj kursoj (en lernejoj kaj universitatoj), kvankam povas atingi la unuan celon (liveri la lingvoposedon), tamen ne atingas la duan (ne formas esperantistojn). La escepto estas specialaj fakoj en universitatoj, ligitaj kun Esperanto, sed E-lernado tie estas tre bone motivita de kontinua stud-proceso kaj la fina celo, ekzemple, defendo de bakalaŭra aŭ magistra laboraĵo en Esperanto (kiel en la rusia AIS-klerigejo Interŝtata Universitato "Ruthenia", funkcia ekde 1993 surbaze de MGIU – Moskva Ŝtata Industria Universitato). Sed tiuj instru-situacioj estas escepte raraj. Tial ne indas strebi al nepra lerneja kaj universitata instruado, sed nepre indas varbi lernantojn por fakultativoj kaj rondetoj en diversgradaj klerigejoj kaj ĉefe por kursoj ĉe E-klubo kaj kultur-domoj.

La lernantoj venas al E-kursoj pro diversaj motivoj: jama konatiĝo kun la ideo, intereso pri novaj lingvoj, deziro vastigi rondon de konatoj, simpla scivolemo ktp. Dum enkonduka renkontiĝo la preleganto rakontas pri eblecoj, kiujn povas doni Esperanto: novaj soci-medioj, malmultekostaj vojaĝoj, eblecoj ricevi scienca gradon en AIS ktp. Valorajn por la celgrupo motivojn necesas flegi kaj disvolvi ankaŭ dum la instruado, akompanante ilin per formigo de pozitivaj emocioj. Nur tiam la plejparto de lernantoj restos en la kurso gis la fino kaj en la movado — post ĝi.

2. Kiun metodon elekti (komponentoj de instrusituacio)⁴¹.

Elekto de instru-metodo multe dependas de personaj kvalitoj de la instruanto (kompetenteco, sperto, temperamento, kreiveco ktp), tamen ne nur. Elekto de la metodo povas grave dependi ankaŭ de instrusituacio, en kiu oni laboros. La sperto pravas, ekzemple, ke grup-dinamikaj instru-metodoj tute ne taŭgas por studentaj grupoj en kondiĉoj de universitato, sed bone funkcias por studentaj grupoj en kondiĉoj de libervolaj urbaj kursoj.

Antaŭ ol komenci instrui, la instruonto devas havi klaran imagon pri sia estonta agado. Sistemigi tiun imagon helpas la ses komponantoj de instrusituacio, priskribitaj de Prof. Helmar G.Frank⁴². Jen tiu sistemo, iom

de la Esperanto-instruado (eldonoj de 1957, 1970, 1991); Boris Tokarev, Psikologio kaj metodiko de Esperanto-instruado (1984), A. Melnikov, Instruado sen turmentado (1999).

⁴¹ La ĉapitro estas verkita de Irina Gonĉarova.

⁴² Helmar G. Frank, Günter Lobin. "Lingvo-orientiga instruado". Múnchen, 1998.

plivastigita kaj adaptita al kompreno de praktikantaj E-instruantoj. Temas pri respondo al la subaj demandoj. Esperanto estas instruata:

- 1) al kiu? (celgrupo)
- 2) ĉe kio? (medio, socistrukturo)
- 3) por kio? (celo)
- 4) kiom amplekse? (lernenda materialo)
- 5) kiom longe kaj kiom ofte? (daŭro kaj ritmo)
- 6) kie? (ejo)
- 7) per kio? (lerniloj)
- 8) kiel? (metodo)
- 9) far de kiu? (instruanto)

La demando – *FAR DE KIU?* (9) — estas en la lasta loko, ĉar temas pri la okazo, kiam estas bezonata elekti instruanton por la instrusituacio, kaj jam estas respondoj al ĉiuj ceteraj demandoj aŭ al parto de tiuj, ekzemple, al la demandoj 1-5. Se la instrusituacion analizas la instruonto mem, tiam la lasta demando iĝas por li/si la unua; ja tiu demando estas — kio estas miaj instru-povoj? Cetere, analizo de la reala instrusituacio povas helpi respondi la koncernan demandon: ĉu mi kapablas instrui en tiu ĉi situacio?.

Ni komentu ankaŭ aliajn demandojn.

Respondante *AL KIU?* (1), ne forgesu konsideri ne nur la "homan faktoron", sed ankaŭ la lingvan kompetentecon, kio gravas niakaze: ja niaj celgrupoj povas esti variaj laŭ la homa konsisto, sed homogenaj laŭ la lingvonivelo (startuloj, komencantoj, progresantoj, aplikantoj).

ĈE KIO? (2) rilatas al natura, teknika, socia lernomedio, kiu estas aldona fonto de eblaj influoj al la lernado. Ekzemple, vi instruas Ĉe-metode en universitato kaj per la konstantaj horaj respondoj malhelpas al la studprocezoj, okazantaj samtempe en la najbaraj aŭditorioj.

POR KIO? (3) estas speciale interesa demando, ĉar ekzistas instruceloj (=viaj celoj) kaj celoj de la lernantoj, kiuj, precipe en la komenca fazo, povas ne koencidi. Eĉ pli — celoj inter lernantoj povas esti diversaj. Tion ĉion necesas konsideri por ne perdi la homojn.

KIOM AMPLEKSE? (4) temas pri kiun lernomaterialon vi elektas por la kurso: kiujn gramatikaĵojn, kiun leksikon kaj en kiu kapacito. Ĉi demando estas forte ligita kun la 3-a kaj 5-a.

La demandoj *KIOM LONGE KAJ OFTE?* (5) kaj *KIE ?* (6) kutime estas jam kondicitaj ne de ni; se vi havas elekton — des pli bone: vi povas dependigi la respondojn de aliaj komponentoj de la instrusituacio, sed ne male.

Foje okazas situacioj, kiam *PER KIO?* (7) — teknikaj rimedoj (instruiloj) puŝas nin elekti respektivan instrumentodon. Ekzemple, vi ricevas klasĉambron kun televidilo kaj videomagnetofono — kial ne instrui

startulojn per la instrufilmoj "Mazi el Gondolando" aŭ "Pasporto al la tuta mondo"? Pli ofte vi elektas gramatikan metodon, ĉar krom lernolibroj havas neniun instrumaterialon. (Sed se vi emas varii la studprocezon aŭ uzi alian metodon, vi ja povas/devas mem prepari konvenajn materialojn!).

Fine ni venis al *KIEL?* (6) — kiun metodon elekti. Jen la ekzemplo de la simpla analizo. Se vi scias, ke vi instruos al volontuloj (1) ĉe kulturdomo (2) por doni bazajn sciojn pri la lingvo Esperanto (3), nome, pri E-gramatiko kaj E-parolado (4), dum 1 monato 2-foje semajne (5) en klasĉambro kun formoveblaj tabloj — vi povas elekti grup-dinamikan metodon (7), kondice, ke ekzistos bezonataj lerniloj (8) kaj vi havas konvenan personecon (9).

Evidentas, ke preskaŭ ĉiu demando dependas de respondoj al la aliaj. Tial, ju pli da respondoj vi jam scias, des pli facile vi trovas respondojn al aliaj demandoj, inkluzive al tiu pri la metodo.

3. Metodoj de E-instruado.

1. La *gramatika metodo* estas ordinara instruado en klaso helpe de lernolibro, kiam instruisto donas dum leciono certan porcion de leksika kaj gramatika materialo kaj post ekzercado kontrolas la sciojn. Preskaŭ nepre la lecionoj estas konstruataj akorde al la uzata lernolibro. La metodo havas certajn malavantaĝojn: ĝi estas relative malvigla kaj tuŝas precipe la racion, sed ne emociojn de la lernantoj. Samtempe, ĝin povas apliki ajna instruisto sen specialaj pedagogiaj talentoj kaj tian kurson estas facile prepari. Krome, ĝi sole taŭgas por deviga instruado (kie la lernantoj ne emas emocie implikiĝi en la lernoprocezon) kaj por personoj sen emo subiĝi al influo de la aliaj (la instruisto kaj kunlernantoj), kies cefaj valoroj kuŝas ĝuste en la racia, sed ne en la emocia sfero.

2. La *rektaj metodoj* celas, unuavice paroligi la lernantojn kaj baziĝas sur forigo de gepatra lingvo kaj neuzo de lernolibroj dum la lecionoj. Ofte dum la kurso ne estas instruata gramatiko.

Cseh(Ĉe)-metodo. Rilate Esperanton, la ĉefa aplikata rekta metodo estis ellaborita de *Andreo Cseh* (Ĉe) en 1920 kaj ĝis nun restas tre populara. Ĝi inkludas studadon de la gramatiko. Cseh intuicie aplikis tion, kio venis en la teorion de la fremdlingva instruado nur poste: mezurita kursmaterialo, fraz-modeloj, limigo de studenda vort- kaj gramatikstoko. Li atentis ne nur konscian, sed ankaŭ subkonscian alproprigon de la lingvo. Jen la bazaj principoj de la klasika Ĉe-metodo:

- 1) Ĉe-instruisto — eksterlandano, la klaso – diversnacia: tio psikologie motivigas la kursanojn paroli nur en Esperanto.
- 2) Amika etoso: senkonscia enmemoriĝo surbaze de pozitivaj emocioj (oni "lernas ne lernante").
- 3) La tuta kurso — longa konversaciaro: tuja alkutimigo pensi en la lingvo, memfido pri kapablo paroli.

- 4) Regula ĥora respondado de la kursanoj: forigo de eraro-timemo, ĉar mesdiraĵoj ne rimarkeblas; ebligado al ĉiu paroli multe; (kio ebligas instrui samtempe al kelkdek lernantoj)
- 5) La instruado — nur en E-o: konstanta lingva praktikado, kutimiĝo paroli kaj kompreni.
- 6) „Neuzo de lernolibroj: stimulo viziti la lecionojn (ĉar ne eblas aliel ricevi la informojn).
- 7) Laŭvolaj hejmaj taskoj en formo de demandaroj.

Ĉe-metodo taŭgas, tamen, nur por elementaj kursoj (ĉar progresantoj por akiri pli profundajn gramatikajn sciojn jam devas uzi vortarojn, absolute malpermesitaj en Ĉe-metodo) kaj — tre grave — ne por ĉiuj homoj (plurajn personojn ĝenas guste neceso respondi en horo kaj ceteraj signoj de dissolvigo de onia personeco en kolektivo). Krome, la instruisto devas havi specialajn kapablojn (inkluzive artistecon!) kaj specialan prepariĝon por la kurso.

3. Miksitaj metodoj.

Por elementaj kursoj en naciomogenaj grupoj kun samlingva instruisto (havanta certajn kapablojn) tre taŭgas miksitaj metodoj. Ekzemple, la tuta leciono pasas rekte (imite Ĉe-metodon), sed en la fino la instruisto klarigas ĉiujn gramatikajn regulojn en la nacia lingvo kaj donas la liston de tradukendaj novaj vortoj. Ekzistas multegaj aliaj variantoj de miksitaj metodoj.

4. Sugestopediaj metodoj.

Lozanov-principoj. Bulgaro G. Lozanov, origine psikoterapeŭto, ellaboris principojn de sugestopedia instruado. La metodo baziĝas sur aktivigo de rezervaj eblecoj de la homa organismo (nekonscia memorfiksado, psikologiaj "truko" por plialtigi laborkapablon kaj emon lerni ktp.). Elementa kaj progresiga kurso enhavas po 120-150 instruhorojn dum inter 6 kaj 14 semajnoj La principoj estas:

- 1) Viva kaj intensa persona komunikado (instruisto-lernanto, lernanto-lernanto, lernanto — aliaj lernantoj).
- 2) Kolektiva komunikado (en du-, tri- kvar-opoj, duongrupaj teamoj).
- 3) Maskigo de personeco per rolo. Pseŭdonimoj kaj pseŭdobiografioj, ricevataj de lernantoj, helpas al ili seniĝi de ĝeneco.
- 4) Po-etapa koncentro. La studenda materialo estas donata en du neegalaj dozoj: en la unua triono de la kurso venas la leksika-gramatika kerno (2/3 de la tuta leksiko), en la ceteraj — ne tro multe da novaj leksemoj kaj gramatikemoj, sed multaj tekstoj kaj ekzercoj.
- 5) La grupo devas esti optimume 10-12-persona, homogena laŭ la starta lingvoscio, preteco kunlabori kaj temperamento.

- 6) Konstanta observado kaj reguligado de la psikologia klimato en la grupo kaj de la anoj individue.
- 7) Science organizata medio de la instruado.
- 8) Speciala lernolibro kun traa intrigo, multpersonaj dialogoj (kunparalelaj tradukoj). Gravaj kantoj, aldonaj tekstoj, lumbildostrioj ktp.
- 9) Aŭda percepto antaŭas la vidan; la unuaj lecionoj pasas nur buŝe, sen skribaj tekstoj.
- 10) Enkonduko de la nova materialo okazas ĉiam rite-sugeste.

La elementojn de tiuj principoj inkludas diversaj metodoj de E-instruado (en Rusio ilin sukcese aplikadis, ekzemple, *Aleksandr Melnikov*⁴³).

"Pirata metodo" aŭ **"Fiŝ-kurso"**. Sian varianton de sugestopedia kurso ellaboris la hungaroj *Jozefo Horvath* kaj *Peter Rados*. Dum tiu kurso en iu hotelo aŭ ripozejo kolektiĝas grupo de lernantoj (ĉ. 30) kaj loĝas ne kontaktante la eksteran mondon dum 5 tagnoktoj. Partoprenas kelkaj instruistoj, helpinstruistoj, inter ili almenaŭ 1-2 eksterlandanoj. La kurso postulas tre seriozan preparadon, multajn materialojn (afiŝojn ktp.). Post 5 tagoj la plej sukcesaj lernantoj bone faras elementnivelan ekzamenon. Kvankam la tuta kvanto de instrueroj estas sufiĉe granda, la rapideco de la "Fiŝ-kurso" starigas ĝin proksime al la ekspres-kursoj.

5. Ekspresaj metodoj.

Esperanto-instruadon oni ofte strebas plenumi kiel eble pli rapide — tio pli facilas en klubaj kondiĉoj, kaj facileco de E-o permesas dum ĉ. 30 instrueroj doni la bazajn sciojn de la lingvo. Ekspres-metodoj povas esti rektaj, gramatikaj, miksitaj, grup-dinamikaj kaj aliaj. Tamen ĉiam necesas atenti, ke kio rapide memorfiksiĝas, tio samrapide forgesiĝas, kaj, se ne varti plu la kursfinintojn, ili tuj perdiĝos, kaj la amasa instruado pere de tiaj kursoj, kiom ajn sukcesaj ili estu, havas tre malgrandan efikecon.

Zagreba metodo estas ellaborita komence de 1980-aj de la kroato *Zlatko Tislar*. Ĝiaj ĉefaj principoj estas:

1. Minimumigi la lernandan vort- kaj gramatiker--stokon surbaze de eksperimente ricevitaj donitaĵoj rilate al parolata E-o. Estas

konstatite, ke por kompreni 95% de la parolata lingvo sufiĉas malpli ol 500 morfemoj. En la dua grado de lernado oni instruu pliajn 400-500 morfemojn, kiuj kovras 99% de la uzataj tekstoj.

2. Intensigi la kurson tempe. Estis aplikitaj du modeloj: 1) 1-2-horaj lecionoj ĉiutage dum du semajnoj; 2) pokvinhora lernado dum tri tagoj, entute 15-22 horoj

⁴³ Vd. la libron: Aleksandr Melnikov "Instruadon sen turmentado". La ĉefaj principoj de fremdlingva instruado (Rostov-na-Donu, 1999, 96 p.), en kiu la metodo estas detale priskribita.

3. Ebligi al la kursanoj "digesti" la lernendajn unuojn memstare (tamen en ceesto de instruisto kaj kun ties zorga gvidado/konsultado).

4. Paroligi la kursanojn laŭeble plej multe. Por tio aktive praktiki konversaciojn en partoj.

Pleja avantaĝo de tiu metodo estas, ke ĝi demonstras "palpeblajn" rezultojn en tre mallonga tempo (ĉefe, dank' al studenda minimumo kaj aplikto de akompanaj stimulaĵoj: sonbendo, bildstria rakonto kaj facila romaneto). Por Zagreba metodo estis eldonita esperantlingva lernolibro, tradukita al pluraj naciaj lingvoj kaj sukcese aplikata ne nur en Kroatio, sed ankaŭ en dekoj da aliaj landoj.

Skota metodo estas proponita de la brito *William Auld*. Daŭro — 2 tagoj po 7 horoj. La esenco estas hora legado-ripetado de frazoj post la instruanto, kun tradukado. Leksiko estas minimuma, sed post la kurso fakte parkerigas ĉiuj ĉefaj gramatikaj elementoj.

Afrika metodo estas ellaborita de rusiano *Aleksandr Blinov* komence de la 1990-aj kaj aplikata de liaj disĉiploj. Daŭro — 12 lecionoj po 2 horoj 3-4 fojojn semajne. Miksita metodo kun elementoj de grupa dinamiko: la grupo de lernantoj ludas vojaĝon al Afriko, poiome alproprigante la lernomaterialon.

"Faru la rondon" (FaRo). Ellaborita de rusino *Irina Gonĉarova* en 2000 j. Daŭro — 10 lecionoj po 2 horoj 2-foje semajne plus Lingva Olimpiko kiel lingvokontrolo kaj Gasta Vespere por varbado de novaj grupanoj. Rekta paroliga metodo kun kelkaj sugestopediaj elementoj (pseŭdonimoj, ritoj ks.), varie prezentanta E-gramatikon kun ties situacia praktikado. Abunda uzado de afiŝoj, bildoj kaj objektoj. Ĉefa specialaĵo – helpo de Teamo, kiun konsistigas antaŭaj finintoj de FaRo. Postulas zorgan preparadon de instrumaterialoj

Ilo por sciencistoj. Aplikata de gemana profesoro *Helmar Frank*. Daŭro — 4 lec. po 2-3 horoj en 2-4 sinsekvaj tagoj. Rekta kurso, kiu celas nur instrui kompreni sciencajn prelegojn. Prezentiĝas kiel prelegado en Esperanto, sen ajna reagado de la lernantoj. Post la fino estas akirataj pasivaj scioj, sufiĉaj por la starigita celo.

4. Lernolibroj

Elektio de lernolibro gravas por kursoj per gramatikaj metodoj kaj por korespondaj kursoj. Ankaŭ al lernantoj de la rektaj metodoj indas – almenaŭ en la fino de la kurso — havigi iujn lernilojn por ke lernantoj memstare sistemigu siajn sciojn kaj povu legi iujn tekstojn. El atingeblaj lastatempe en Rusio lernolibroj eblas nomi la sekvajn.

Б. Колкер. Учебник языка эсперанто. Основной курс. 1992 (pli frua varianto de la lernolibro aperis en 1974 kiel "Методические разработки по международному языку эсперанто"). La plej fundamenta lernolibro,

sisteme kaj science prezentanta la lingvon, plej taŭga por homoj kun intelektaj kapablaj pli ol meznivelaj, ne bezonantaj emociigajn apogojn. Enhavas bone elektitajn aldonajn tekstojn, enkondukantajn en la E-kulturton. La bazaj lecionaj tekstoj, tamen, ĝene malaktualiĝis. La lernolibro uzeblas por korespondaj kursoj.

3. Семёнова, М. Исаев. Учебник языка эсперанто. 1984. Bone kompilita lernolibro kun utilaj suplementoj (gramatika skizo, krestomatia de tekstoj, enkondukantaj E-kulturton). Por gramatika ĉeesta instruado.

М. Абольская. Методические разработки по языку эсперанто (для учащихся заочных курсов). 1990. Lernilo tre simpligita, taŭga ĉefe por koresponda instruado, sed ne tre efika por ĉeestaj gramatikaj lecionoj.

И. Гончарова. Эсперанто для студентов и не только. 1995, 1999. Lernolibro, farita surbaze de relaborita Zagreba metodo. Kun elementoj de komuna rakonta enhavfado, bone aranĝita gramatika kaj leksika materialo, viglaj tekstoj kun E-realaĵoj, popularaj kantotekstoj ktp. Por gramatikmetoda instruado; celas ankaŭ enmovadigi studentojn, devige studentajn Esperanton.

А. Юнусов. Эсперанто? Это просто! 2000. Bone aranĝita, kun komuna enhavfado kaj protagonistoj, sed, bedaŭrinde, kun malmultaj referencoj al la movado kaj kulturo (krom bona antaŭparolo). Por ĉeesta instruado.

Dum instruado anstataŭ lernolibroj oni ofte uzas librojn, speciale verkitajn por tiu celo ("La verda koro" de J. Baghy, "Gerda malaperis" de C. Piron, "Mamutido Mijo" de M. Brontejn). La libroj respondas al postuloj al bonaj lernolibroj — interesa enhavo kun konstantaj protagonistoj, konversacioj en la tekstoj ktp., sed por uzi ilin la instruisto devas havi aldonan metodikan rekomendaron kun ekzercoj, laŭlecionaj vortolistoj ktp., aŭ, antaŭ la kurso, prepari ilin mem.

Esperanto estas unuka lingvo, kiun oni povas lerni **koresponde** kaj eĉ memstare. En la jaroj 1988-92 en Moskvo sukcese funkciis E-kooperativo "Kopso", iniciatita de Stanislav Koncebovskij kaj Nikolao Gudskov, kie lernis miloj da homoj el la tuta Rusio. La kooperativo uzis nur propreverkitajn kaj eldonitajn lernilojn kaj vortarojn (kompilitajn de S. Koncebovskij kaj I. Gonĉarova). Ilin ĝis nun ankoraŭ eblas trovi kaj fruktodone uzi por koresponda instruado. Pli popularas kiel korespondaj lerniloj, tamen, la lernolibroj de B. Kolker kaj de M. Abolskaja.

Lastatempe oni instruas Esperanton **pere de Interreto**, kio pli efikas ol perpoŝta koresponda instruado, almenaŭ, ĉar la kontakto inter instruisto kaj lernanto pli rapidas.

Ajna formo de koresponda instruado estas fakte, individua. Tial ĝi povas esti suface efika. Tamen post koresponda kurso necesas inviti kursfinintojn al

iu paroliga renkontiĝo (speciale organizita aŭ, almenaŭ, komuna, kiel StRiGo aŭ SEJT), ĉar sen tio la kursfinintoj rapide perdiĝas.

5. Teknikaj rimedoj.

Teknikaj helpiloj dependas de aplikata metodo kaj kondiĉoj de la instrumedio. Dezirindas, ke ĉiu leciono enhavu iujn demonstrojn, kantojn ktp. Se la instruisto mem kapablas uzi iun muzikinstrumenton kaj kantas, tio tre helpas kaj por krei pli emocian etoson dum la leciono, kaj por formi prononcadon kaj instrui novan leksikon. Bonas, se la lernantoj kantu mem (kaj komprenu la kantatajn tekstojn!). La kantojn necesas elekti laŭ simpleco de la tekstoj, instruataj gramatikaj reguloj, enkondukata leksiko ktp.

Ekzistas bonaj *sonkursoj en Esperanto*. Eĉ se la instruisto certas pri modeleco de sia prononco, la lernantoj devas havi eblecon de la komenco aŭdi paroli aliajn bonajn esperantistojn, kaj nepre — diversnaciajn. Per sonkursoj kun akompanaj lernolibroj eblas ankaŭ memlernado, ilin nepre necesas rekomendi al korespondaj kaj perretaj lernantoj.

Videokursoj povas helpi dum la lecionoj aŭ esti uzataj por memstara lernado. Ĝis nun ekzistas du bonaj videokursoj en Esperanto: "*Mazi en Gondolando*" (1995) – esperantigita de R. Dobrzynski, M. vd Horst-Kalinska, S. MacGill, A. Pettyn versio de la kurso por instrui la anglan lingvon (kun aldona libreto) kaj "*Pasporto al la tuta mondo*" de Paul Gubbins.

6. De lernanto al esperantisto.

Tre grava problemo estas ne perdi la lernantojn post fino de la kurso, konservi ilin por la komunumo kaj movado. Tion oni atingas dum tri etapoj.

1. Dum instruado oni donu bazajn sciojn pri la valoroj de la esperantismo, movada organizo kaj E-kulturo. Aplikante sugestopediajn kaj grupdinamikajn metodojn, eblas uzi elementojn de ludo — la lernantoj, ekzemple, povas ricevi kiel pseŭdonimojn, nomojn de famaj esperantistoj (poste tio vekas intereson al koncerna persono kaj la movado ĝenerale); eblas organizi rolludojn kiel "vojaĝo al UK", ktp. Post ajna elementa kurso necesas, ke la homoj almenaŭ sciu, kio estas UEA, TEJO, SAT, landa asocio — ili minimume kapablu malĉifri ties siglojn kaj iom sciu pri eblecoj, kiujn donas membreco en ili. Certe, la akcentoj dependas de la karaktero de la grupo (junuloj, plenkreskuloj, miksitaj grupo).

2. Post la elementa kurso devas esti nepre organizata la daŭriga, progresiga. Sen tio la elementa instruado estas plejparte vana. Tamen, se en elementa kurso (per Ĉe-metodo aŭ per iu miksitaj metodo) povas partopreni ĝis 50-70 lernantoj, en perfektiga kurso ne povas esti pli ol 20 homoj (optimume 12-15). Tiu kurso jam devas esti preskaŭ tute esperantlingva. La rolo de diversaj ludaj metodoj, rolludoj, teatraĵoj ĉiam pli kreskas.

Nepre necesas konatigi lernantojn kun E-kulturo per legado de bonaj poemoj (paralele konatigante kun la vivo de aŭtoroj kaj tradukistoj). La kursanoj povas poiomete ricevi iujn taskojn, partopreni la vivon de la klubo ktp. – havi gravajn agadcelojn helpas al la homojn resti en la movado. La homojn, emajn al instruado, eblas partoprenigi kiel helpantojn en la elementa kurso. La rezulto de la kurso devas esti, ke plejmulto de la grupo sufiĉe flue parolos, imagos strukturon de la landa kaj internacia movado kaj pretos organiziĝi en klubon (societon). Kursfinintoj pretos kaj emos partopreni esperantistajn aranĝojn, inkluzive la internaciajn. (La aranĝojn povas partopreni ankaŭ homoj, ne finitaj la progresigan kurson, tamen tuj post la elementa kurso plej ofte la homoj ankoraŭ ne taŭgas por tio, ili povas anstataŭ perfektigi en komunikado trafi en la societon de samnivelaj komencantoj, kio ne stimulas peni komuniki en ankoraŭ ne bone posedata lingvo). Por la progresiga kurso indas uzi specialajn lernolibrojn, enkondukantajn en la Esperanto-kulturon, kaj ekzerci laŭ ili. Plej bonas "*Paŝoj al plena posedo*" de *W. Auld* kaj "*Vojago en Esperanto-lando*" de *B. Kolker*.

3. La progresiga kurso povas transformiĝi al **nova klubo**. Tio plej gravas en la loko, kie antaŭe ne ekzistis iuj E-kluboj, sed ankaŭ en urbo, kie la klubo(j) jam ekzistas, indas strebi fondi la novan. Estas la regulo, ke normale funkcia klubo ne povas esti tro granda, optimumo estas 25 personoj, sed neniel pli ol 50-60. Krome, al la novlernintoj estas komplike integriĝi en la stabilan malnovan kolektivon. Sed, certe, la kluboj en la sama urbo devas nepre kunlabori kaj organizi komunajn aranĝojn. (Tamen, eĉ la situacio kiam la kluboj ne amikas, la konkurado inter ili servas ĝeneralan aktivigon de la movado). Do, kreo de novaj kluboj estas ideala (kvankam ne facile realigebla) rimedo kreskigi la movadon en ĉiu urbo kaj vilaĝo kaj devas esti la fina celo de la lingva instruado. Ĉiuokaze, surbaze de du-tri sinsekvaj kursoj (elementa + progresiga) ĉiam eblas krei novan klubon (aŭ apartan filion de la malnova).

Suplemento 1. Historiaj listoj de E-kongresoj kaj kelkaj tradiciaj aranĝoj

Universalaj Kongresoj de Esperanto

N-ro	Jaro	Loko	Numero de partoprenintoj
1	1905	Bulonjo-sur-Marco, Francio	688
2	1906	Ĝenevo, Svisio	1200
3	1907	Kambriĝo, Britio	1317
4	1908	Drezdeno, Germanio	1500
5	1909	Barcelono, Hispanio	1500
6	1910	Vaŝingtono, Usono	357
7	1911	Antverpeno, Belgio	1800
8	1912	Krakovo, Aŭstrio	1000
9	1913	Berno, Svisio	1203
10	1914	Parizo, Francio (ne okazis)	alligis 3739
11	1915	San-Francisko, Usono	163
12	1920	Hago, Nederio	408
13	1921	Prago, Ĉeĥoslovakio	2561
14	1922	Helsinki, Suomio	850
15	1923	Nurenbergo, Germanio	4963
16	1924	Vieno, Aŭstrio	3054
17	1925	Ĝenevo, Svisio	953
18	1926	Edinburgo, Britio	960
19	1927	Gdansko, Germanio	905
20	1928	Antverpeno, Belgio	1494
21	1929	Budapeŝto, Hungario	1200
22	1930	Oksfordo, Britio	1211
23	1931	Krakovo, Polio	900
24	1932	Parizo, Francio	1650
25	1933	Kolonjo, Germanio	950
26	1934	Stokholmo, Svedio	2042
27	1935	Romo, Italio	1442
28	1936	Vieno, Aŭstrio	854
29	1937	Varsovio, Polio	1120
30	1938	Londono, Britio	1602
31	1939	Berno, Svisio	765
32	1947	Berno, Svisio	1370
33	1948	Malmo, Svedio	1761
34	1949	Burnemuto, Britio	1534
35	1950	Parizo, Francio	2325
36	1951	Munkeno, Okc. Germanio	2040
37	1952	Oslo, Norvegio	1614
38	1953	Zagrebo, Jugoslavio	1760
39	1954	Harlemo, Nederio	2353

40	1955	Bolonjo, Italio	1687
41	1956	Kopenhago, Danio	2200
42	1957	Marsejlo, Francio	1468
43	1958	Majncio, Germanio	2021
44	1959	Varsovio, Polio	3256
45	1960	Bruselo, Belgio	1930
46	1961	Harogato, Britio	1646
47	1962	Kopenhago, Danio	1550
48	1963	Sofio, Bulgario	3472
49	1964	Hago, Nederio	2512
50	1965	Tokio, Japanio	1710
51	1966	Budapeŝto, Hungario	3975
52	1967	Roterdamo, Nederio	1265
53	1968	Madrido, Hispanio	1769
54	1969	Helsinki, Suomio	1857
55	1970	Vieno, Aŭstrio	1987
56	1971	Londono, Britio	2071
57	1972	Portlando, Usono	923
58	1973	Beogrado, Jugoslavio	1638
59	1974	Hamburgo, Germanio	1651
60	1975	Kopenhago, Danio	1227
61	1976	Ateno, Grekio	1266
62	1977	Rejkjaviko, Islandio	1199
63	1978	Varno, Bulgario	4414
64	1979	Lucerno, Svisio	1630
65	1980	Stokholmo, Svedio	1807
66	1981	Braziljo, Brazilio	1749
67	1982	Antverpeno, Belgio	1899
68	1983	Budapeŝto, Hungario	4834
69	1984	Vankuvero, Kanadio	802
70	1985	Augsburgo, Germanio	2311
71	1986	Pekino, Ĉinio	2482
72	1987	Varsovio, Polio	5946
73	1988	Roterdamo, Nederio	2321
74	1989	Brajtono, Britio	2280
75	1990	Havano, Kubio	1617
76	1991	Bergeno, Norvegio	2400
77	1992	Vieno, Aŭstrio	3033
78	1993	Valencio, Hispanio	1863
79	1994	Seulo, Koreio	1776
80	1995	Tampereo, Suomio	2443
81	1996	Prago, Ĉeĥio	2972
82	1997	Adelajdo, Aŭstralio	1224
83	1998	Montpeliero, Francio	3133
84	1999	Berlino, Germanio	2712
85	2000	Telavivo, Israelio	1212

86	2001	Zagrebo, Kroatio
87	2002	Fortaleza, Brazilio
88	2003	Gotenburgo, Svedio
89	2004	Pekino, Ĉinio
90	2005	Vilno, Litovio

Internaciaj Junularaj Kongresoj

N-ro	Jaro	Loko	Numero de partoprenintoj
1	1938	Groet (Nederio)	203
2	1939	Tenvuren (Belgio)	400
3	1947	Ipswich (Britio)	200
4	1948	Groet (Nederio)	285
5	1949	Versalles (Francio)	200
6	1950	Konstanz (Germanio)	420
7	1951	Haarlem (Nederio)	280
8	1952	Ry (Danio)	108
9	1953	Wörgl (Aŭstrio)	80
10	1954	Hilversum (Nederio)	90
11	1955	L' Aquila (Italio)	350
12	1956	Büsum (Germanio)	173
13	1957	Villeneuve (Francio)	30
14	1958	Homburg-Saar (Germanio)	126
15	1959	Gdansk (Polio)	300
16	1960	Rotterdam (Nederio)	105
17	1961	Wokingham (Britio)	116
18	1962	Ystad (Svedio)	70
19	1963	Vraca (Bulgario)	550
20	1964	Amsterdam (Nederio)	200
21	1965	Ootu (Japanio)	250
22	1966	Pécs (Hungario)	900
23	1967	Netanja-Rotterdam (Nederio)	90
24	1968	Tarragona (Hispanio)	130
25	1969	Tyresö (Svedio)	120
26	1970	Graz (Aŭstrio)	200
27	1971	Edinburgh (Britio)	150
28	1972	Toruń (Polio)	250
29	1973	Sarajevo (Jugoslavio)	282
30	1974	Münster (Germanio)	250
31	1975	Fredericia (Danio)	265
32	1976	Tesaloniko (Grekio)	350
33	1977	Poitiers (Francio)	325
34	1978	Veliko Târnovo (Bulgario)	450
35	1979	Austerlitz (Nederio)	388
36	1980	Rauma (Suomio)	322

37	1981	Oaxtepec (Meksikio)	108
38	1982	Leuven (Belgio)	315
39	1983	Debrecen (Hungario)	672
40	1984	Swanwick (Britio)	293
41	1985	Eringfeld (Germanio)	425
42	1986	Neurem (Israelio)	106
43	1987	Kraków (Polio)	1034
44	1988	Zagreb (Jugoslavio)	569
45	1989	Kerkrade (Nederio)	725
46	1990	Plaja Giron (Kubio)	153
47	1991	Karlskoga (Svedio)	189
48	1992	Montreal (Kanadio)	104
49	1993	Vraca (Bulgario)	173
50	1994	Chonan (Suda Koreio)	241
51	1995	Serovo (apud Peterburgo)	303
52	1996	Güntersberge (Germanio)	360
53	1997	Assisi (Italio)	470
54	1998	Rijeka (Kroatio)	378
55	1999	Veszprem (Hungario)	500
56	2000	Hong Kong (Ĉinio)	200
57	2001	Strasbourg (Francio)	
58	2002	: Pato Branko (Brazilio)	
59	2003	Kaunas (Litovio)	

Kongresoj de SAT

N-ro	Jaro	Loko	Numero de partoprenintoj
1	1921	Prago (Ĉeĥoslovakio)	79
2	1922	Frankfurto, (Germanio)	232
3	1923	Kaselo (Germanio)	300
4	1924	Bruselo (Belgio)	90
5	1925	Vieno (Aŭstrio)	150
6	1926	Leningrado (Sovetunio)	400
7	1927	Liono (Francio)	200
8	1928	Gotenburgo (Svedio)	436
9	1929	Lejpcigo (Germanio)	650
10	1930	Londono (Britio)	350
11	1931	Amsterdamo (Nederio)	400
12	1932	Studgarto (Germanio)	245
13	1933	Stokholmo (Svedio)	600
14	1934	Valencio (Hispanio)	376
15	1935	Parizo (Francio)	346
16	1936	Manĉestro (Britio)	167
17	1937	Roterdamo (Nederio)	806
18	1938	Bruselo (Belgio)	659
19	1939	Kopenhago (Danio)	568

20	1947	Arhuzo (Francio)	662
21	1948	Amsterdamo (Nederio)	1219
22	1949	Parizo (Francio)	1325
23	1950	Torino (Italio)	292
24	1951	Stokholmo (Svedio)	584
25	1952	Duselдорfo (Okc. Germanio)	622
26	1953	Ŝefildo (ritio)	185
27	1954	Nancio (Francio)	480
28	1955	Linzo (Aŭstrio)	650
29	1956	Beogrado (Jugoslavio)	489
30	1957	Roterdamo (Nederio)	590
31	1958	Helsinki (Suomio)	254
32	1959	Dortmundo (Germanio)	425
33	1960	Arhuzo (Francio)	355
34	1961	Gento (Belgio)	374
35	1962	Vieno (Aŭstrio)	465
36	1963	Hamburgo (Okc. Germanio)	263
37	1964	Narbono (Francio)	300
38	1965	Karlsruho (Germanio)	447
39	1966	Svanviko (Britio)	310
40	1967	Malmo (Svedio)	407
41	1968	Utreĥto (Nederio)	347
42	1969	Novi-Sado (Jugoslavio)	250
43	1970	Aŭgsburgo (Okc. Germanio)	360
44	1971	Parizo (Francio)	502
45	1972	Bazelo (Svisio)	300
46	1973	Toronto (Kanadio)	208
47	1974	Bergamo (Italio)	330
48	1975	Hago (Niderio)	300
49	1976	Gotenburgo (Svedio)	301
50	1977	Aŭgsburgo (Germanio)	251
51	1978	Lekturo (Francio)	272
52	1979	Svanviko (Britio)	310
53	1980	Rijeko (Jugoslavio)	380
54	1981	Bazelo (Svisio)	300
55	1982	Ilsalmo	237
56	1983	Linzo (Aŭstrio)	185
57	1984	Bordofo (Francio)	260
58	1985	Amersforto	260
59	1986	Sankt-Kugato de Valoj	190
60	1987	Bulonjo-sur-Maró (Francio)	400
61	1988	Kampos Do Jordao (Brazilio)	128
62	1989	Ilertiseno (Germanio)	260
63	1990	Linzo (Aŭstrio)	292
64	1991	Bruselo (Belgio)	165
65	1992	Kaŭno (Litovio)	617

66	1993	Kazanlako (Bulgario)	250
67	1994	Straĵnico (Ĉeĥio)	310
68	1995	Mariboro (Slovenio)	150
69	1996	S-Peterburgo (Rusio)	240
70	1997	Aŭgsburgo (Germanio)	133
71	1998	Odeso (Ukrainio)	240
72	1999	Karlovy Vary (Ĉeĥio)	178
73	2000	Moskvo (Rusio)	125
74	2001	Nagykanizsa (Hungario)	176
75	2002	Alikante (Hispanio)	

Rimarkoj. La listoj estas faritaj laŭ *Jarlibroj* de UEA kaj *Adresaroj* de SAT. En la listo de UK-oj la urbonomoj estas esperantigitaj, en la listo de IJK-oj – tiaj, kiaj estas prezentitaj en la *Jarlibro* de UEA⁴⁴ (la leganto mem komparu la sistemojn kaj elekto, kia estas pli bona!), en la listo de SAT-kongresoj tiaj, kiaj estas en la *Adresaro* (do, esperantigitaj). Ĉiuj landnomoj estas esperantigitaj unuece.

Rusiaj Esperantistaj Kongresoj

Nomo	Dato	Urbo	Nombro	Ĉefaj decidoj, komentoj
1-a Ruslanda Kongreso de Esperantistoj	20-24.04.1910	Sankt-Peterburgo	103	La 2-an Kongreson aranĝi en Moskvo en 1911. Ĉeestis Zamenhof.
2-a Ruslanda Kongreso de Esperantistoj	4-6.08.1913	Kievo	76	La 3-an Kongreson aranĝi en Moskvo en 1914. Vigligi la propagandon de E-o en Rusio.
3-a Ruslanda Kongreso de Esperantistoj	junio 1921	Petrogrado	ĉ. 160 (23 kun decida voĉo kaj 18 kun konsulta voĉo)	Fondo de SEU — Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo. La 1-a Statuto de SEU. Okazis akraj disputoj inter neŭtraluloj kaj komunistoj.
1-a Kongreso de SEU (4-a REK)	20.07.1923	Moskvo	ĉ. 30	Malfacila financa stato de SEU.
2-a Kongreso de SEU (5-a REK)	26-30.06.1925	Moskvo	ĉ. 100	Kunlabori kun idistoj. Atingi 10000 membrojn al la jaro 1926. Aranĝi 3-an SEU-Kongreson en Leningrado sekvontan jaron samtempe kun 6-a SAT-

⁴⁴ Cetere, *Jarlibroj* tiurilate ne estas sinsekvaj: kvankam en la listo estas skrupule reproduktataj naciaj skribmanieroj (ial ne sinsekve – la japanaj, arabaj, kirilaj ktp. skriboj ne reproduktiĝas), sed en la teksto la urbonomoj estas esperantigitaj (ekz.: en la teksto – Gotenburgo, en la tabelo – Göteborg).

3-a Kongreso de SEU (6-a REK)	2-5.08.1926	Leningrado	135	Kongreso. SEU-membroj — 1765 el 244 lokoj. La 2-a Statuto, al la titolo aldonita "Tutruslanda Asocio de amikoj de la Internacia lingvo". 6009 membroj de SEU el 426 lokoj. La asocio post la Kongreso ricevis la nomon Sovetrespublikara Esperantista Unio.
4-a Kongreso de SEU (7-a REK)	28-31.07.1928	Moskvo	100	Membroj de SEU — 16366.
5-a Kongreso de SEU (8-a REK)	25-28.12.1931	Moskvo	119	La 3-a Statuto de SEU
(1-a) Tutsovetia fonda konferenco de ASE (6-a Kongreso de SEU, 9-a REK)	14.03.1979	Moskvo	101	Fondi Asocion de Sovetiaj Esperantistoj. Akcepti Regularon de ASE.
2-a Tutsovetia konferenco de ASE (7-a Kongreso de SEU, 10-a REK)	26.03.1982	Moskvo	86	Akcepti amendojn en la Regularo de ASE kaj provizoran Tipan Regularon de la klubo de Sovetiaj Esperantistoj.
3-a Tutsovetia konferenco de ASE / 8-a Kongreso de SEU (11-a REK)	23-25.01.1989	Moskvo	212	Refunkciigi Sovetrespublikaran Esperantistan Union sur la membra bazo de ASE. Anonci la 3-an konferencon de ASE kiel la 8-an Kongreson de SEU. Aprobi la provizoran statuton de SEU.
9-a Kongreso de SEU / Landa E-Kongreso (12-a REK)	21-23.12.1990	Moskvo	200 (83 delegitoj)	Akcepti la Statuton de SEU.
10-a Kongreso de	27-29.12.1991	Kolomna	125 (44 delegitoj)	Fondi Rusian Esperantistan Union surbaze de SEU. Akcepti la Statuton de REU.

SEU-REU / Landa E- Kongreso (13-a REK) 11-a Kongreso de REU (14-a REK)	26-29.11.1992	Sankt- Peterburgo	ĉ. 140 (49 delegitoj)	Renumerado de la kongresoj kun inkluzivigo de tiuj antaŭ SEU; asociajn kongresojn kalkuli aparte de la landaj
15-a Rusia Esperantista Kongreso	6-9.11.1993	Soĉi	ĉ.70	12-a Kongreso de REU enkadre de REK (24 delegitoj). Trakti kun Ruslanda E-Asocio pri komuna organizo de la sekva REK.
(16-a) Rusia Esperantista Kongreso	4-7.11.1994	Niĵnij Novgorod	65	13-a Kongreso de REU enkadre de REK. Unuiĝo kun REA sub la komuna nomo REU.
(17-a) Ruslanda Esperantista Kongreso	6.-8.10.1995	Tjumeno	29	(14-a) Kongreso/Konferenco de REU enkadre de REK (19 delegitoj). Nova versio de la Statuto de REU.
(18-a) Rusia Esperantista Kongreso	31.1.-2.2.1997	Moskvo	ĉ. 75	Kongresa Regularo. (15-a) Konferenco de REU enkadre de REK.
(19-a) Rusia Esperantista Kongreso	3-6.02.2000	Ĉeboksari	51	(17-a ⁴⁵) Konferenco de REU enkadre de REK.
20-a Rusia Esperantista Kongreso (samloke kun EoLA-13)	4-8.03.2001	Serovo (apud Sankt- Peterburgo)	199 (kun EoLA)	18-a Konferenco de REU enkadre de REK.
21-a Rusia Esperantista kongreso.	10-16.12.2001	Kostroma	33	Ne okazis konferencoj kaj ceteraj oficialaj aranĝoj; estis viglaj diskutoj pri la stato de E-movado en Rusio
22-a Rusia Esperantista kongreso.	Decembro 2002 (planata)	Moskvo		Enkadre devos okazi 19-a Konferenco de REU

Rimarko. La numerado de REK-oj elvokis dikutojn, ĉar ne ĉiuj el la listigitaj aranĝoj havis tiun titolon, sed estis nomitaj kongresoj kaj konferencoj de certaj organizoj. Tamen ili ĉiuj (kaj nur ili en koncernaj periodoj) havis karakteron de la plej signifaj tutlandaj kunvenoj, kaj iliaj partoprenantoj sentis heredecon de la aranĝoj rilate al la

⁴⁵ La 16-a konferenco de REU okazis en kadroj de OkSEJT-39 en Tiĥvin.

antaŭaj: ekz., partoprenintoj de la 3-a Konferenco de ASE, fariĝanta restariga Kongreso de SEU, decidis konsideri la konferencojn de ASE daŭrigo de SEU-Kongresoj, kaj SEU estis fondita dum la 3-a tutrusia kongreso. La Kongreso en Kolomna en 1991 konceptis sin kiel aranĝo de ĉiuj esperantistoj, sendepende de aparteno al iu organizo, kaj estis organizita per fortoj de diversaj tutlandaj organizoj (SEU kaj SEJM). Do, la seninterrompa kontinua kalkulado de REK-oj ekde 1910 estas logike kaj psikologie pravigebla.

Baltaj Eesperanto-Tendaroj⁴⁶

N-ro	Jaro	Loko	Nombro de partoprenintoj
1	1959	Baltezers, Latvio	48
2	1960	Käärikku, Estonio	107
3	1961	Mole'tai, Litovio	204
4	1962	Drabeši, Latvio	238
5	1963	Värska, Estonio	288
6	1964	Veisiejai, Litovio	153
7	1965	Saulaine, Latvio	171
8	1966	Pärnu, Estonio	117
9	1967	Vilnius, Litovio	337
10	1968	Ruba, Latvio	194
11	1969	Viljandi, Estonio	ĉ. 400
12	1970	Kretinga, Litovio	316
13	1971	Smiltene, Latvio	189
14	1972	Häädemeste, Estonio	170
15	1974	Riga, Latvio	102
16	1975	Helme, Estonio	222
17	1976	Viekšniai, Litovio	241
18	1977	Rezekne, Latvio	223
19	1978	Kehra, Estonio	174
20	1983	Noreikiške's, Litovio	358
21	1984	Kuldīga, Latvio	299
22	1985	Kose, Estonio	ĉ. 450
23	1986	Smalininkai, Litovio	472
24	1987	Saulaine, Latvio –	406
25	1988	Tallinn, Estonio	ĉ. 350
26	1989	Noreikiške's Litovio	608
27	1990	Jelgava, Latvio	435
28	1991	Tartu, Estonio	422
29	1993	Priekuli, Latvio	50
30	1994	Pärnu, Estonio	100
31	1995	Girionys, Litovio	203
32	1996	Jurmala, Latvio	208
33	1997	Haapsalu, Estonio	162

⁴⁶ La liston afable disponigis la redaktoro de "Litova stelo" Petras Čeliaskas.

34	1998	Veisiejai, Litovio	253
35	1999	Liepaja, Latvio	209
36	2000	Tallinn, Estonio	201
37	2001	Kaunas, Litovio	303
38	2002	Riga, Latvio	

Rimarkoj: 1) La unuaj kvar tendaroj havis siglon ĈET (Ĉebalta Esperanto-Tendaro), la 27a – BEK (Balta Esperanto-Kongreso), en 1990-aj la aranĝoj ne plu nomiĝis “tendaro”, sed “tagoj”

2) Pro malhelpo de oficialaj instancoj BEToj ne okazis en 1973 kaj 1979-1982.

3) En 1992 aparta BET ne estis organizita, ĉar tiujare en Kaunas okazis 65a Kongreso de SAT, en kiu el inter 617 partoprenintoj estis 296 personoj el eksa Sovetio.

SEJT-oj (Sovetiaj/Someraj Esperantistaj Junularaj Tendaroj)⁴⁷

N-ro	Jaro	Loko	Nombro de partoprenintoj
SEJT-9	1967	Kaltanenai, Litovio	150
SEJT-10	1968	Teleckoje lago (Altajo)	88
SEJT-11	1969	Slavsko (Ukrainio)	167
SEJT-12	1970	Kuŝnarenkovo (Baŝkirio)	153
SEJT-13	1971	Kievo (Ukrainio)	300
SEJT-14	1972	Apud Moskvo	105
SEJT-15	1973	Kesterciems (Latvio)	256
SEJT-16	1974	Kineŝma (Ivanova reg.)	217
SEJT-17	1975	Uŝtj-Kamenogorsk (Kazaĥio)	201
SEJT-18	1976	Tiĥvin (Leningrada reg.)	273
OkSEJT-19	1977	Poltava (Ukrainio)	190
OrSEJT-19	1977	Miass (Ĉelabinska reg.)	125
OkSEJT-20	1978	Maĥaĉkala (Dagestano)	110
OrSEJT-20	1978	Zavjalovo (Altajo)	164
OkSEJT-21	1979	Kievo (Ukrainio)	325
OrSEJT-21	1979	Divnogorsk (Krasnojarska reg.)	170
OkSEJT-22	1980	Rubskoj lago (Ivanova reg.)	280
OrSEJT-22	1980	Divnogorsk (Krasnojarska reg.)	211
OkSEJT-23	1981	Sĉerbinka (apud Moskvo)	160
OrSEJT-23	1981	Sulok (apud Taŝkento, Uzbekio)	300
OkSEJT-24	1982	Jurmala (Latvio)	220
OrSEJT-24	1982	Tjumenj	?
SudOkSEJT-24	1982	Voroneĵ	80
OkSEJT-25	1983	Kujbyŝev	?
OrSEJT-25	1983	Mejdureĉensk (Kemerova reg.)	?

⁴⁷ Laŭ la listo, kompilita de Andreo Grigorjevskij, kun korektoj.

OkSEJT-26	1984	Jerevan (Armenio)	240
OrSEJT-26	1984	Divnogorsk (Krasnojarska reg.)	250
OrSEJT-27	1985	Apud la lago Bajkalo	?
OkSEJT-27	1986	Kujbyŝev	268
OrSEJT-28	1987	Rostov Velikij (Jaroslavla reg.)	?
OrSEJT-28	1987	Divnogorsk (Krasnojarska reg.)	100
OkSEJT-29	1988	Urjupinsk (Volgograda reg.)	119
OkSEJT-30	1989	Tučkovo (Moskva reg.)	115
OrSEJT-29	1989	Taŝtagol (Kemerova reg.)	71
OkSEJT-31	1990	Rubskoje lago (Ivanova reg.)	215
OkSEJT-32	1991	Kustorka (Niĵnij Novgoroda reg.)	82
OkSEJT-33	1992	Tolmaĉovo (Smolenska reg.)	109
OrSEJT-30	1992	Tomska reg.	48
OkSEJT-34	1993	Smolensk	175
OkSEJT-35	1994	Jelec	181
OrSEJT-31	1994	Krasnojarsk	137
OkSEJT-36	1996	Taganrog	90
OkSEJT-37	1997	Volgograd	55
OkSEJT-38	1998	Ĉeboksary	112
OrSEJT-39	1999	Tiĥvin	270
OkSEJT-40	2000	Ivanovo	178
OrSEJT-32	2000	Tomsk	64
OkSEJT-41	2001	Kovrov (Vladimira reg.)	120
OrSEJT-33	2001	Tĵumenj	26
OkSEJT-42	2002	Niĵnij Novgorod	

Rimarkoj. 1) La numerado de SEJT-oj ekde 1967 daŭrigas numeradon de BET-oj (ĝis 1967 SEJT-oj ne okazadis).

2) Ekde 1977 okazadis OkSEJT-oj (okcidentaj) kaj OrSSEJT-oj (orientaj) tendaroj. Ne nepre ambaŭ ĉiujare, sed numeroj, elirintaj el la sama komuna komenco, poste diverĝis.

3) En 1987 en Rostov Velikij en aprilo okazis InterSEJT, enirantaj numeradon de OkSEJT-oj; somere estis ĉe orbevo lago apud Zagorsk (Moskva reg.) MoskvEJT, kiu ne eniras la numeradon, sed pli proksimis al rtadiciaj tendaroj.

4) En 1995 SEJT ne okazis, anstataŭ ĝi estis IJK en Serovo (apud Peterburgo) kun 303 partoprenintoj.

Festivaloj EoLA (Esperanto – Lingvo Arta)

- | | |
|---------------------------|------------------------------|
| 1. Volgograd – 1988 | 8. Minsk – 1996 |
| 2. Volĵskij – 1989 | 9. Jalta – 1997 |
| 3. Volĵskij – 1990 | 10. Ivanovo – 1998 |
| 4. Niĵnij Novgorod – 1991 | 11. Kiev – 1999 |
| 5. Ĉeboksary – 1993 | 12. Nabereĵnije Ĉelni – 2000 |
| 6. Ivanovo – 1994 | 13. Serovo – 2001 |
| 7. Kazanj – 1995 | 14. Ĉeboksary – 2002 |

Suplemento 2. Gravaj dokumentoj pri esperantismo

La Interna ideo de Volapük

Volapüka hüm

Fa Zorell.Fr.

Sumolsöd stäni blodäla
Dikodi valik hetobs
Tönöls jüli baladäla
Volapüke kosyubobs.

Vokobsöz ko datuval:
Menade bal püke bal!

Kis also kanos koblödön
Lölika vola menis?
Kis also kanos menodön
Äs pük bal omsa stadis?

Klu tonodozös in val:
Menade bal, püke bal!

Daluvel püka lifömöd,
Lifomsöd pakels ota,
Volapük aiflolomöd,
E volapüked oma!

Oi binomöd su tal:
Menade bal püki bal!

Volapuka himno

*Vortoj de Fr. Zorell
muziko de I. M. Schleyer*

Amikecon plifortigi
Ni kolopodu kun fervor',
Provu revon realigi,
Voku ni kun lingvaŭror':
En la tuta homa rond'
Unu lingvon por la mond'!

Diru, kio realigos
La voladon de l' popol'?'
Diru, kio unuigos
Landojn kun amikkonsol'?'
Sola estas la respond':
Unu lingvo por la mond'!

Vivu niaj samcelanoj,
Vivu lingvo kaj l' aŭtor',
Niaj lingvaj partianoj
Plej kuraĝe al labor'!
Voku ni de l' land' kaj mar':
Unu lingvon por homar'!

Elvolapükigis E. Drezen

Neŭtrala esperantismo

DEKLARACIO PRI LA ESENCO DE LA ESPERANTISMO (1905)

(Akceptita en la lasta laborkunsido de la Bulonja Kongreso: Kunsido de 9-a de Aŭgusto 1905)

Ĉar pri la esenco de la esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

1. La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu “ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn”, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure *privata*, por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo *arta*, kaj ĉar el ĉiuj multegaj pruvoj, faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo *Esperanto* kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas “nenies propraĵo”, nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj mastroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile

al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute *privatan* kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo “Fundamento de Esperanto”, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj “tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto”. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la “Fundamento de Esperanto”, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

MUNKENA DEKLARACIO (1951)

La reprezentantoj de la Esperanto-movado el 40 landoj, kunvenintaj en la 36-a Universala Kongreso de Esperanto en Munkeno, en aŭgusto 1951, akceptis la jenan Deklaracion:

La celo de la Esperanto-movado estas plena apliko de la Internacia Lingvo Esperanto en ĉiuj sferoj de la internacia vivo kaj por ĉiuj internaciaj rilatoj. El tia vasta uzado de la Internacia Lingvo logike rezultas:

1. altiĝo de plin larĝaj popoltavoloj al aktiva partopreno en la internacia vivo;
2. progresigo de la scienco kaj plimultiĝo de la intelektaj interŝanĝoj en internacia kulturo;
3. plifirmigo de tutmonda solidareco kaj rapidiĝo de la procezo de unueciĝo de la homaro.

STATUTO DE UEA

(1947 kun postaj ĝisdatigoj, fragmento)

A. Ĝeneralaj principoj

1. Titolo kaj daŭro.

La nomo de la Asocio estas Universala Esperanto-Asocio; poste en ĉi tiu Statuto kaj en la regularoj ĝi estas nomata la Asocio aŭ UEA. UEA (fondita la 28-an de aprilo 1908) kaj Internacia Esperanto-Ligo (fondita en 1936) kunfandiĝis en unu organizaĵon kun la nomo Universala Esperanto-Asocio la

28-an de aprilo 1947. En 1958 Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kunfandiĝis kun UEA kiel ĝia junulara sekcio. La jura ekzisto de UEA estis plilongigita por nova periodo de 29 jaroj, ĝis la 27-a de aprilo 2005. UEA, ekde validiĝo de ĉi tiu Statuto estas fondita por nelimitita tempodaŭro.

2. Konsisto.

Membroj de la Asocio povas esti :

- (a) Esperanto-organizaĵoj;
- (b) Individuaj membroj, konsistantaj el naturaj personoj kaj juraj personoj.

3. Celoj.

La celoj de UEA estas :

- (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
- (b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
- (c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- (ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

4. Rimedoj.

Por atingi siajn celojn, la Asocio laboras per kunordigo de la diversaj Esperanto-asocioj, studoj kaj esploroj, publikigo de libroj kaj aliaj eldonaĵoj, informa agado, servoj al la parolantoj de Esperanto, okazigo de kongresoj kaj konferencoj, kunlaboro kun aliaj similcelaj asocioj kaj apliko de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj proksimigas la celojn de la Asocio.

5. Neŭtraleco.

UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj problemoj. Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj estas por la laboro de UEA escencaj kondiĉoj.

6. Lingvo.

La oficiala lingvo de UEA estas la Internacia Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento, per la verkaro de ĝia iniciatinto Zamenhof kaj per la ĝenerala lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto.

STATUTO

de la socia organizaĝo “Rusia Esperantista Unio” (1995, fragmento)

akceptita de la 10-a Kongreso de SEU-REU la 28-an de decembro 1991

La nova versio de la Statuto akceptita de la Konferenco de REU la 8-an de oktobro 1995, Tjumenio

La amendoj en la Statuto de la socia organizaĝo “Rusia Esperantista Unio” estas registritaj en la Ministerio de Justico de Rusia Federacio la 16-an de januaro 1997.

Registra atesto № 1512.

1. Celoj, taskoj kaj agadprincipoj de REU

1.1. La socia organizaĝo “Rusia Esperantista Unio” (REU) estas tutrusia socia unuiĝo, aganta sur la teritorio de plimulto de la subjektoj de Rusia Federacio. REU estas formo de kunlaboro por siaj membroj — adeptoj de la internacia lingvo Esperanto.

1.2. Celoj de REU estas:

- popularigo kaj disvastigo de la lingvo Esperanto;
- plifirmigo de la paco, evoluigo de la internacia kunlaboro en ĉiuj sferoj de la homa agado helpe de la lingvo Esperanto.

1.3. Konforme al la celoj REU starigas antaŭ si jenajn taskojn:

- organizado de informintersangoj pri instruado, disvastigo kaj praktika uzado de la lingvo Esperanto;
- trejnado kaj atestado de instruistoj de Esperanto;
- organizado de esperantistaj aranĝoj, inkluzive internaciajn (renkontiĝoj, seminarioj ks);
- kunordigo de planoj de amasaj aranĝoj, praktika, metodika kaj materiala helpo al ties organizantoj;
- organizado de servoj, garantiantaj kontentigon de la informaj, sciencaj, komunikaj, klerigaj interesoj kaj bezonoj de esperantistoj, speciale, pri ricevo de literaturo, de korespondaj adresoj, pri plialtigo de kvalifiko ks;
- eldonado de periodaĵoj kaj literaturo laŭ sia temaro en Esperanto kaj aliaj lingvoj konforme al la leĝaro pri gazetaro kaj aliaj amasinformiloj;
- kunlaboro kun ajnaj, inkluzive internaciajn, organizaĵoj pri demandoj de reciproka intereso;
- reprezentado de la interesoj de REU-membroj en internaciaj kaj landaj esperantistaj organizaĵoj, en ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj.

1.4. Por efektivigi la statutajn celojn REU rajtas:

- libere disvastigi informojn pri sia agado;
- partopreni en ellaboro de decidoj de ŝtatpotencaj kaj municipaj organoj laŭ ordo kaj en amplekso, antaŭviditaj de la leĝaro;
- okazigi kunvenojn, mitingojn, demonstraciojn, manifestaciojn kaj pikedojn;

- fondi amasinformilojn kaj efektiviĝi eldonan agadon;
- reprezenti kaj defendi siajn rajtojn, justajn interesojn de siaj membroj kaj aliaj civitanoj en ŝtatpotencaj kaj municipaj organoj kaj sociaj unuiĝoj;
- efektiviĝi en plena amplekso la funkciojn, antaŭviditajn de la leĝoj pri sociaj unuiĝoj;
- pledi kun iniciatoj pri diversaj demandoj de la socia vivo, prezenti proponojn al ŝtatpotencaj organoj.

1.5. REU devas:

- observi la leĝaron de Rusia Federacio, la ĝenerale agnoskitajn principojn kaj normojn de la internacia juro, koncernantajn ĝian agadsferon, kaj la normojn, antaŭviditajn de ĉi tiu Statuto;
- ĉiujare publikigi raporton pri uzo de sia havaĵo aŭ garantii liberecon de konatiĝo kun la menciita raporto;
- ĉiujare informi la Ministerion de Justico de Rusia Federacio pri daŭrigo de sia agado kun indiko de la efektiva restadloko de la Estraro kaj donitaĵoj pri gvidantoj de REU en la amplekso de informoj, enigataj en la unuecan ŝtatan registroliston de juraj personoj;
- prezenti laŭ postulo de la Ministerio de Justico de Rusia Federacio decidojn de la gvidorganoj kaj funkciuloj de REU, kaj krome jarajn kaj jarkvaronajn raportojn pri sia agado en la amplekso de informoj, prezentataj al la impostaj organoj;
- allasi reprezentantojn de la Ministerio de Justico de Rusia Federacio ĉeesti aranĝojn, okazigatajn de REU;
- asisti al reprezentantoj de la Ministerio de Justico de Rusia Federacio por konatiĝo kun la agado de REU lige kun atingo de la statutaj celoj kaj observo de la leĝaro de Rusia Federacio.

1.6. En sia agado REU baziĝas sur la principoj de demokratio, internaciismo, respekto de tuthomaraj kaj ekologiaj valoroj kaj homaj rajtoj, libervoleco, egalrajteco, memregado kaj publikeco. REU estas politike neŭtrala unuiĝo.

1.7. REU agnoskas memstarecon de esperantistaj unuiĝoj ĉu en, ĉu ekster sia konsisto kaj strebas al konstruiva kunlaboro kun ili.

1.8. La laborlingvo de REU estas la internacia lingvo Esperanto. En necesaj okazoj povas esti uzataj aliaj lingvoj.

1.9. La tuta agado de REU estas efektivigata enkadre de la statutaj celoj kaj taskoj konforme al la aktuala leĝaro.

Homaranismo

DEKLARACIO DE HOMARANO (L. ZAMENHOF, 1906)

Kiam oni min demandas, kiu mi estas, kiaj estas miaj naciaj konvinkoj, religiaj principoj, mia celado kaj idealoj, mi respondas: "mi estas homarano". Tio ĉi signifas, ke mi estas homo, kiu sin gvidas per la sekvantaj dogmoj:

1. Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj; ĉiajn idealojn kaj celadon gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

2. Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo por tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia lingvo aŭ religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

3. Mi kredas, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj, kian ajn lingvon aŭ religion ili havas; la intermiksadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento, lingvo aŭ religio mi rigardas kiel restaĵon de la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

4. Mi kredas, ke en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan, naturan kaj nedisputeblan rajton, paroli kian lingvon aŭ dialekton li volas kaj konfesi kian religion li volas, sed en komunikiĝado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi estas ebla, uzadi lingvon neŭtrale-homan kaj vivi laŭ la principoj de religio neŭtrale-homa. Ĉiun celadon de unu homo, altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion, mi rigardas kiel barbarecon.

5. Mia patrujo mi nomas tiun regnon, en kiu mi naskiĝis aŭ en kiu mi por ĉiam enloĝiĝis. Tiu parto de la regno, en kiu mi pasigis mian infanecon, aŭ kiu estas loĝata precipe de mia gento, povas esti por mi pli kara, ol ĉiuj aliaj partoj; sed nomi mia patrujo unu pecon de mia aŭ tiom pli de fremda regno pro tio, ke tie pleje loĝas aŭ iam regis mia gento, mi neniam devas, ĉar tio ĉi ne sole kondukas al konstantaj disputoj, sed ĝi estus ankaŭ kontraŭa al la morala leĝo pri la sengenteco de la tero. Se tiu parto de la patrujo, en kiu mi loĝas, laŭ sia geografia karaktero aŭ laŭ siaj moroj, tro multe diferencas de la aliaj partoj, tiam – por eviti malkompreniĝon – mi povas al la demando pri mia patrujo nomi aparte tiun parton de la regno, en kiu mi loĝas, sed mi devas tiam ĝin nomi mia patruja lando, por ke estu klare, ke mi rigardas ĝin ne kiel mian ekskluzivan patrujon, sed nur kiel parton de mia patrujo. Sed nek mian tutan patrujon, nek ĝiajn apartajn partojn mi devas nomi per la nomo de ia gento, sed mi devas ilin nomi nur per nomo neŭtrale-geografia, kiel estas farate en ĉiuj plej novaj regnoj; sed se mia regno aŭ lando ne havas ankoraŭ neŭtralan nomon, mi devas ĉiam – almenaŭ en parolado kun homaranoj – nomi mian regnon kaj landon per nomo homarana, kiu konsistas

el la nomo de ilia ĉefa urbo kun la aldono de la finiĝo "io" por la tuta patrujo kaj "lando" por la nomo de ĝia parto.

Ekzemploj: Svisujo, Belgujo, Aŭstrujo, Kanado, Meksiko, Peruo, Peterburgo, Parizio; Algerlando, Varsovilando.

6. Patriotismo aŭ servado al la patrujo mi nomas nur la servadon al la bono de ĉiuj miaj samregnanoj, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas; la servadon speciale al la gentaj intereso, lingvo aŭ religio de tiu loĝantaro, kiu en la lando prezentas la plimulton, mi neniam devas nomi patriotismo. Konforme al la principo, ke unuj regnantoj, eĉ se ili prezentas en la lando grandegan plimulton, ne havas moralan rajton altrudi sian lingvon aŭ religion al la aliaj regnantoj, mi devas penadi, ke en mia lando ĉiu gento havu la rajton fondi por siaj membroj lernejojn kaj aliajn instituciojn kun sia lingvo kaj sia religio, se ili tion ĉi deziras, sed ke en ĉiuj publikaj institucioj, ne destinitaj sole por unu gento, regu nur lingvo neŭtrale-homa kaj festoj neŭtrale-homaj aŭ regnaj. Tiel longe, kiel la atingo de tio ĉi estos ne ebla, mi devas penadi, ke en mia lando ekzistu lernejoj kaj aliaj institucioj kun lingvo neŭtrale-homa por tiuj regnantoj, kiuj ne volas aŭ ne povas uzi instituciojn kun tiu aŭ alia genta lingvo; kaj de ĉia reciproka batalado de lingvoj aŭ religioj pro regado mi devas teni min flanke, ĉar ĝi estas nur batalado inter unu maljustaĵo kaj alia.

7. Mi konscias, ke en tiuj landoj, kie la loĝantaro estas plimalpli unugenta, ĝi longan tempon ne komprenos la maljustecon de regado de unu lingvo aŭ religio super la aliaj kaj ĝi per ĉiuj fortoj batalados kontraŭ la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj, kaj la defendantojn de tiu ĉi egalrajtigo ĝi persekutados kaj superĵetados per koto. Sed mi neniam konfuziĝos per tiu ĉi persekutado, memorante, ke mi batalas pro absoluta vero kaj justeco, ke nenia popolo povas scii, kio fariĝos kun ĝi morgaŭ, ke la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj forigos la kaŭzon de ĉiuj militoj kaj malpacoj inter la popoloj, ke ĉia ago kontraŭ la devizo "la regno por la regnantoj" kaj ĉia perfortaĵo de unuj regnantoj kontraŭ aliaj restas ĉiam perfortaĵo, eĉ se ĝi estas farata de grandega plimulto kontraŭ malgrandega malplimulto, kaj ke fortika feliĉo de la homaro estas ebla nur tiam, kiam por ĉiuj popoloj kaj landoj ekzistos justeco egala kaj absoluta, dependanta nek de loko, nek de tempo, nek de forto, kaj kiam en ĉiu regno ekzistos nur homoj kaj regnantoj kaj ne gentoj.

8. Mia nacio mi nomas la tutecon de ĉiuj homoj, kiuj loĝas mian patrujon, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas; sed al mia nacia nomo mi devas ĉiam aldoni la vorton "homarano", por montri, ke mi alkalkulas min al mia nacio ne en senco ŝovinista. La aron de ĉiuj homoj, kiu havas saman devenon kiel mi, mi nomas mia gento. Mian nacion mi ne devas nomi per la nomo de ia gento, mi devas ĉiam nomi ĝin – almenaŭ en parolado kun homaranoj – per la neŭtralegeografla nomo de mia regno aŭ lando. Se mia interparolanto

deziras scii ne sole al kiu politike-geografia, sed ankaŭ al kiu etnografia grupo mi apartenas, tiam mi aparte nomas al li mian genton, lingvon, religion k.t.p.

Ekzemploj: Sviso-homarano, Peterburgia homarano, Varsovilanda homarano.

9. Mia lingvo mi nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone scias kaj plej volonte parolas, sed al la nomo de tiu ĉi lingvo mi devas ĉiam aldoni la vorton "homarana", por montri, ke mian lingvon mi ne rigardas kiel mian idolon kaj ke mia idealo estas lingvo neŭtrale-homa. En ĉiuj homaranaj kunvenoj kaj, kiom eble, ankaŭ en ĉiuj privataj komunikiĝoj kun homaranoj mi devas uzadi la lingvon homaranan. En mia familia vivo mi povas uzadi kiun lingvon mi volas, sed mi devas ĝin nomi ne mia nacia, sed nur mia lingvo familia. Kiam oni demandas min pri mia lingvo nacia, mi devas respondi: "la ekzistadon de lingvoj naciaj mi ne konfesas, ĉar ĉiu nacio nuntempa parolas per multaj lingvoj; sed mia lingvo genta estas jena (nome tiu lingvo aŭ dialekto, kiun en mia patrujo parolas la plimulto de mia gento, se eĉ mi mem tute ne posedas tiun ĉi lingvon).

Rimarko: Novaj homaranoj, kiuj ne posedas ankoraŭ la lingvon homaranan, povas en la unua tempo uzadi en la kunvenoj kiam lingvon ili volas, sed ili ne devas altrudi sian lingvon al la aliaj ĉeestantoj. Ĉar en la nuna tempo ekzistas nur unu neŭtrala lingvo, nome Esperanto, tial la homaranoj akceptas ĝuste ĝin; tamen ili rezervas al si la rajton anstataŭigi iam poste tiun ĉi lingvon per ia alia lingvo, se tio ĉi montriĝos utila.

10. Mia religio mi nomas tiun religion, en kiu mi naskiĝis, aŭ al kiu mi estas oficiale alskribita; sed al ĝia nomo mi devas ĉiam aldoni la nomon "homarana", por montri, ke mi konfesas ĝin laŭ la religiaj principoj de la homarano, kiuj konsistas en jeno:

- a) Sub la nomo "Dio" mi komprenas tiun al mi nekompreneblan plej altan Forton, kiu regas la mondon kaj kies esencon mi havas la rajton klarigi al mi tiel, kiel diktas al mi mia saĝo kaj koro.
- b) Kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon "agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco", ĉion alian en mia religio mi rigardas nur kiel legendojn aŭ kiel religiajn morojn, kiuj estas enkondukitaj de homoj, por enporti en la vivon difinitan programon kaj spiritan varmon, kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de mia persona deziro.
- c) Mi konscias, ke ĉiu homo apartenas al tiu aŭ alia tradicia religio ne tial, ke ĝi la plej multe respondas al liaj personaj konvinkoj, sed nur tial, ke li en ĝi naskiĝis, kaj ke la esenco de ĉiuj religioj estas la sama, kaj ili distingiĝas unu de alia nur per legendoj kaj moroj, kiuj ne dependas de persona elekto de homo. Tial mi konscias, ke oni neniun povas laŭdi nek mallaŭdi por lia tradicia religio, kaj ke bonaj aŭ malbonaj agoj de homo

dependas ne de lia religio, sed nur de li mem kaj de la cirkonstancoj de lia vivo. Kaj ĉar la religiaj moroj, kiuj prezentas la solan diferencon inter unu religio kaj alia kaj la solan kaŭzon de religia malamo inter la homoj, estas donitaj ne de Dio, sed de homoj, tial mi devas kunhelpi al tio, ke per konstanta reciproka komunikiĝado de la homaranoj de diversaj religioj la diversformaj religiaj moroj de ĉiuj homaranoj iom post iom cedu la lokon al moroj komunaj, neŭtrale-homaj.

11. Kiam en mia urbo estos fondita templo homarana, mi devas kiel eble pli ofte vizitadi ĝin, por frate kunvenadi tie kun homaranoj de aliaj religioj, ellaboradi kune kun ili morojn kaj festojn neŭtrale-homajn kaj tiamaniere kunhelpi al la iom-post-ioma ellaboriĝo de filozofie pura, sed samtempe bela, poezia kaj varma vivo-reguliga religio komune-homa, kiun gepatroj povos sen hipokriteco transdoni al siaj infanoj. En la templo homarana mi aŭskultados la verkojn de la grandaj instruintoj de la homaro pri la vivo kaj morto kaj pri la rilato de nia "mi" al la universo kaj al la eterneco, filozofie-etikajn interparolojn, altigajn kaj nobligajn himnojn k.t.p. Tiu ĉi templo devas edukadi la junulojn kiel batalantojn por la vero, bono, justeco kaj ĉiuhoma frateco, ellaboradi en ili amon al honesta laboro kaj abomenon por frazisteco kaj por ĉiuj malnoblaj malvirtoj; tiu ĉi templo devas donadi spiritan ripozon al la maljunuloj, konsolon al la suferantoj, doni la eblon senŝarĝigi sian konsciencon al tiuj, ĉe kiuj ĝi estas ŝarĝita per io k.t.p. Tiel longe kiel en mia urbo ne ekzistas templo homarana, mi devas kiel eble plej ofte kunvenadi por komunaj interparoladoj kun aliaj homaranoj de mia urbo, kaj se tiaj ne ekzistas, mi devas komunikiĝadi letere kun homaranoj de aliaj urboj.

Rimarko: Pri la dogmo 11, kiu krom la karaktero societa havas ankoraŭ karakteron teozofian, oni devas memori, ke ĝi parolas nur pri tiaj instruoj, kiuj ne kontraŭparolas al la scienco, kaj ke ĝi rilatas nur al la templo de la homaranoj, sed tute ne al la privataj rondetoj de la homaranoj. Tiuj ĉi rondetoj havas karakteron ne religian, sed pure societatan kaj servas por liberaj amikaj interparoladoj pri ĉiuj eblaj temoj, laŭ la deziro de la partoprenantoj, kaj de aliaj rondetoj ili distingiĝas nur per tio, ke en ili partoprenas homoj, kiuj havas neŭtrale-homajn, religiajn kaj naciajn principojn, kaj ke la interparolado en ili estas farata precipe en la lingvo neŭtrale-homa.

12. Homarano mi nomas ĉiun homon, kiu subskribis la "Deklaracion de Homarano" kaj alskribiĝis al iu el la ekzistantaj homaranaj temploj aŭ rondetoj.

Rimarko: Ĉiu nova rondeto de homaranoj devas publikigi sian adreson en iu el la gazetoj, kiuj estas eldonata en la lingvo internacia.

Laborista esperantismo

STATUTO DE SAT (1921, fragmento)

Sub la nomo "Sennacieca Asocio Tutmonda" (SAT) estas fondita Asocio, kiu celas: a) utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda; b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidaro; c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj; ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT; d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari ĉuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn, kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

Sennaciismo

KELKAJ DIFINOJ DE E. LANTI (1942)

NACIO. – Aparato farita el potencavido, ĵaluzo, malamo kaj stulto, kiun uzas suvereno, diktatoro, partio aŭ klaso, por akiri famon, honorojn, bonstaton ktp. je la malprofito de l' grandega plimulto de la aparateroj, t.e. simplaj nacioj.

Memkompreneble aparato utilas nur al ties uzantoj, t.e. la registoj.

PARTIO. – Organizo, per kiu ties gvidistoj celas fariĝi uzantoj de aparato nacia.

Ekzistas diversprogramoj partiaj, simile kiel en la kristanismo, ekzemple, ekzistas diversaj konfesioj.

PATRIOTISMO. – La plej moderna kaj potenca el iuj religioj. Per ĝi la uzantoj de l' nacia aparato sukcesas atingi, ke bonkoraj, pacemaj homoj fariĝu buĉistoj, kiuj mortigas amase infanojn, virinojn, malsanulojn ktp.,

detruas hospitalojn, artaĵojn kaj ĉiel kondutas kiel frenezuloj aŭ sovaĝaj bestoj.

La patriotismo estas unu el la plej necesaj konsistopartoj de nacia aparato.

POLITIKO. – Arto, scienco aŭ agmetodo, per kies lernado oni akiras ŝancon fariĝi manipolanto de nacia aparato, anstataŭ esti nura ero de ĝi.

Kiuj plej bone sukcesas en la politiko, tiuj ordinare estas kaŝaj adeptoj de Makiaveli.

PUBLIKA OPINIO. – Speciala temperaturo, kiun devas havi nacia aparato, por ke ties uzantoj povu manipuli ĝin profite al si.

Por atingi tian temperaturon, la naciprofituloj utiligas lernejojn, gazeton, fetiĉojn kaj ĉion, kio tiklas agrable la senton de l' simplaj nacioj kaj anestezas ilian racion.

SENNACIISMO. – Kultura doktrino, kies cefaj celoj estas: 1) malapero de ĉiuj nacioj, rigardataj kiel sendependaj, suverenaj unuoj; 2) mondmastrumado kaj racia utiligado de ĉia energio kaj materio profite al ĉiuj homoj de nia planedo; 3) unuecigo je ĉiuj mezuriloj kaj kalkuliloj; 4) praktikado de sennacieca lingvo (Esperanto) kun la celo, k□ ĝi fariĝu la sole uzata kulturlingvo.

La sennaciismo signifas la venkon de l' homeco super la nacieco; ĝia realiĝo estus la triumfo en la homa cerbo de la racia tendenco super la mistike senta.

SENNACIISTO. – Homo, kiu aprobas kaj propagandas sennaciismon, kaj [kiu] absolute ne taŭgas kiel materialo por fabriki aparaton nacian.

SENNACIULO. – Homo, kiu ne nur aprobas sennaciismon, sed plie sukcesis senigi sin je prefero por la lando, kie ĝi naskiĝis kaj kies civitano jure kaj devige ĝi estas; homo, kiu havas geamikojn en ĉiuj mondpartoj kaj sopiras jen al Berlino, jen al Buenos Aires, jen al Moskvo, jen al Parizo, jen al Stokholmo, jen al Tokio ktp.: homo, kiu scipovas pli bone Esperanton ol sian gepatran lingvon.

Sennaciulo kapablas anticipi ne nur ideo sed sente, kaj plej ofte li spertas esti tute fremda inter la filistroj, kiuj svarmas ĉie en la mondo.

SOLDATO. – Dresita animalo dupieda kaj obeema, kiu manipulas armilojn kun la celo mortigi aliajn soldatojn, komandataj de aliaj estroj ol liaj propraj.

Tamen ne malofte okazas, ke soldatoj mortigas ankaŭ nearmitajn homojn.

Iaj soldatoj povas *heroiĝi* kaj tiaokaze ili fariĝas ĉefverko de la stultiga dresado patriotisma.

DEKLARACIO PRI SENNACIISMO (2001)

Antŭaparolo

Kapitalismo kaj naciismo estis la ĉefaj karakterizaj faktoj de la 20a jarcento. Ili ne ĉesis nutri unu la alian per rivaleca sistemo: ĉiunivele regas konkurenco kaj ekspluatado de homoj far homoj. Tiu sistemo, kiu favoris iun minoritaton de homoj kaj nacioj, damaĝis al la plimulto. Ĝi ekstremigis la perfortecon inter la homoj. En la nova jarcento, kiu komenciĝis en ĉi tiu jaro

2001, kunveninte en Nagykanizsa (Hungario) kadre de la 74a SAT kongreso, la sennaciistoj celas alian sistemon.

La Sennaciista Frakcio aganta en kaj ekster S.A.T. kunigas la gekamaradojn konvinkitajn pri tio, ke la naciismo estas unu el la bazaj elementoj de la nuntempa socia sistemo. Ni ne povas konsenti, ke pro ĝi estu oferataj homamasoj.

La ekspluatistoj obeigas siajn servistojn ĉu per narkotilo kiel naciismo, ĉu perforte. Naciismo bremsas evoluon de la tutmonda kulturo kaj, pere de ĝi, kondukas al ekologia katastrofo.

Ne ĉiuj homoj klare rimarkas tion, sed tiuj, kiuj racie aplikas Esperanton, devas konscii, ke partopreni en naciista agado signifas daŭrigi la homan ekspluatadon.

La kapitalistoj subtenas ĉiamaniere la naciismon, ĉar ili el sia sperto scias, ke tiu religieca animstato estas altgrade ekspluatebla.

Tasko de la Sennaciista Frakcio

Imunigi ĉiujn homojn, esperantistojn aŭ ne, kontraŭ la naciisma bacilo. Klare montri, ke la internacia konkurenco parencas kun la interentreprena, ke la landlimoj neniel povas respondi racie al la kulturoj, gentoj, lingvoj nek al religioj, sed utilas por protekti privatajn interesojn.

La sennaciistoj luktas cele al ĝenerala rajto de memdetermino. Ĉiu homo rajtas sin determini, kiel ajn li volas : ĉu religie (kristano, judo, islamano, homaranisto, ktp), ĉu metafizike (ateisto, agnostikulo, materiisto...), ĉu etne (cigano, kurdo, ĉerkeso, flandro...), ĉu asocie (SATano, UEAano...), ĉu klase (proleto, etburĝo...), ĉu politike (komunisto, anarkiisto...), ĉu eĉ nacie (franco, germano...). Tiuj, kiuj sin determinas SENNACIISTOJ, ĉie kaj senlace agas cele al homaro emancipita kaj frateca. Ili partoprenas la klasbatalon kune kun ĉiuj siaj luktantaj gekamaradoj.

Nepenseblas, ke iam ajn la sennaciistoj intencos trudi perforte sian ismon ĉu en SAT ĉu ekstere.

Ek de la fondiĝo de SAT, ili scias ke: Fulmrapida evoluo de ĉiuj teknikoj pli kaj pli kondukas nin al tutplanedaj konceptoj kaj al reala mondmastrumado.

Ideala socio ne devenos tute preta el loka kaj nacia revolucio.

Estas nepre necese sin prepari, sin ekzercadi por la tasko de mondcivitanoj. Tial, ili celas kutimigi siajn proksimulojn al EKSTERNACIA SENT-, PENS-kaj AGADKAPABLO.

Raŭmismo

MANIFESTO DE RAŬMO (1980)

Ĉi tiu dokumento ricevas la nomon de la urbo, en Finnlando, kie oni debatis, okaze de la 36a Internacia Junulara Kongreso (1980 07 25 / 08 01), la temon "Esperanto en la 80aj jaroj: celoj kaj metodoj".

Ĝi ankoraŭ ne esprimas la oficialan opinion de TEJO kiel organizo, sed nur de tiuj, individuoj kaj grupoj, kiuj subskribis aŭ subskribos ĝin. La originalo de la Manifesto troviĝas ĉe FEJO (Finnlanda Esperantista Junulara Organizo), kiu akceptas eventualajn aliĝojn en skriba formo ĝis 1980 12 31. [FEJO, ĉe s-ro B.Holmberg, Arentikuja 1 B 253, SF-00410 Helsinki 41, Finnlando.]

1. Krizo de identeco. La subskribintoj konstatis kontraŭdiron en la sinteno de la esperantistaro, kvazaŭ konflikton inter idea superego kaj ego: nia superego igas nin prediki al la aliaj homoj pri kelkaj mitoj – la dua lingvo por ĉiu / la angla lingvo estas nia malamiko / UNO devas adopti Esperanton, ktp – kaj laŭdegi la lingvon eĉ neobjektive okaze de intervjuo; samtempe, inter ni, ni ĝuas kaj aplikas Esperanton laŭ tio kio ĝi efektive estas, sendepende de la praelaj sloganoj. Tio ja estas krizo de identeco, kaj ni sentas la neceson motivi nian esperantistecon per io pli kohera.

2. Kritiko de prceloj. Ni kredas ke:

- a) la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna nek esenca dum la 80aj jaroj – oni havu alternativajn celojn;
- b) la faligo de la angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la esperantistoj: finfine la angla rolas nur kiel *help*lingvo, analoge al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la E-movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.

3. Niaj celoj. Ni celas disvastigi Esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn:

- a) propedeŭtiko por lingvoinstruado;
- b) kontaktoj inter ordinaraj homoj;
- c) kontaktoj sendiskriminaciaj;
- ĉ) novtipa internacia kulturo.

Lige kun la lasta valoro, ni emfazas ke la serĉado de propra identeco igis nin koncepti esperantistecon kvazaŭ la aparteno al mem elektita diaspora lingva minoritato. La kresko de niaj fortoj kaj la aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciigo pri tiuj ĉi valoroj.

4. La kongresoj kiel vojo al kresko. Internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas esencaj por la asimiliĝo de homoj al nia lingva komunumo: necesas

unuflanke kongresi pli ofte inter ni, kaj rezervi la kunsidadon de gvidorganoj al apartaj funkciulaj kunvenoj, laŭ la modelo de la TEJO-seminario en Strasburgo (junio 1980), kaj aliflanke necesas fortigi la uzon de E-o kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj, laŭ la modelo de la Freinet-instruistoj.

5. Ni kredas ke la unua jarcento de Esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi *ĉion*; meze de la 80aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos ekmontri al la mondo ke ni kapablas ankaŭ diri *ion* – ion kulture originalan kaj internacie valoran.

LA PAKTO POR LA ESPERANTA CIVITO (1998)

La subskribintaj establoj, por kiuj Esperanto estas ordinara laborlingvo, akceptinte la sekvan Kvintezon:

- 1) La esperanto-komunumo estas senŝtata diaspora lingva kolektivo al kiu homoj apartenas pro libera elekto, aŭ pro libera konfirmo kaze de denaskaj esperantistoj.
- 2) La lingvokono estas la sola komuna distingilo de la anoj de tiu ĉi komunumo. Ĉiu alia karakterizo (rasa, religia, etna, klasa, seksa...) ne gravas por difini la apartenecon al la komunumo.
- 3) Konsekvence, laŭ la propra naturo, la esperanto-komunumo respektas ĉiun religian (ne)kredon, ĉiun politikan opinionon demokratie esprimitan kaj ĉiun kulturalan tradicion.
- 4) Sed la esperanto-komunumo ne povus evolui se ĝi konsistus nur el disigitaj eroj, indiferentaj unu al la alia, konsiderantaj nur la proprajn regulojn kaj kutimojn, engaĝitaj je nura kunekzistado. Civito ne estas nur lingvanaro dotita je individuaj rajtoj: ĝi estas ankaŭ realaĵo kun komuna destino.
- 5) Ĉi tiun komunan destinon forĝis la jam 110-jara historio de la lingvanaro. Ĝin atestas la originala esperanto-literaturo kaj la komunaj kulturaj trajtoj. Ĝin firmigas la oficialaj renkontoj de la lingvanaro mem, sub ĉiu formo, de la kurso ĝis la kongreso. Tiuj renkontoj estas esencaj por la vivo de nia civito, se ili donas la ŝancon reciproke edukiĝi kaj integriĝi, lerni vivi kune kaj respekti unu la alian. Tiurilate, kulturcentroj kaj esperanto-domoj havas apartan signifon kaj specifan mision.

difinas la Pakton por la Esperanta Civito

- 6) La Pakto celas:
 - a) firmigi la rilatojn inter la paktintaj establoj, favore al reciproka helpo kaj respekto;
 - b) solvi eventualajn konfliktojn per arbitracio;
 - c) formi la kernon de la Esperanta Civito.
- 7) La rimedoj kaj instancoj por plenumi la celojn de la Pakto estas priskribitaj en la Konstitucio de la Esperanta Civito. Specife, la Kortumo

estas la arbitracia instanco de la Pakto, kaj la Forumo estas la asembleo de la paktintaj establoj.

- 8) La Pakto engaĝas la subskribintojn nur se la suverena instanco (ĝenerala Asembleo) de la respektivaj establoj ratifas ĝin. Se la establo ne havas propran juran personecon (ekz. redakcio de gazeto) necesas la ratifo de la kolektivo kun jura personeco aŭ individuo kun civilaj rajtoj, kiu posedas ĝin.
- 9) La aliĝo ekvalidas nur se la absoluta plimulto (duono plus unu) de la Forumo aprobas.
- 10) El la Pakto eblas retiriĝi pro unu el la subaj kialoj:
 - a) pruvita malfondo de la establo;
 - b) verdikto de la arbitracia instanco (Kortumo), kiu ekzamenis la peton de la koncerna establo;
 - c) novaj artikoloj kaj amendoj en la Pakto, kiuj ŝanĝus ĝian nunan strukturon kaj celaron.
- 11) La verdiktoj de la Kortumo estas neapelacieblaj. Se establo ne estas kontenta pri la verdikto, ĝi povas sin turni al la Forumo, kiu povas peti (je absoluta plimulto) la Kortumon reekzameni unu fojon la kazon.
- 12) La Kortumo verkos iom post iom komunan kondutkodon, kiu estos aneksaĵo de ĉi tiu Pakto. Provizora referenco por la Kortumo estas la svisa civila kodo.
- 13) En kazo de dubo, la paktintaj establoj referencas al la Konstitucio de la Esperanta Civito.

Kiuj rajtas peti aliĝon al la Pakto?

Ĉiu loka, regiona, landa, internacia aŭ faka E-societo, ĉiu klubo, kulturcentro aŭ lernejo, ĉiu redakcio, eldonejo, scienca au arta establo kiuj rekonas sin en la Kvintezo, kaj sekvas la aliĝproceduron. Dum la aliĝpeton ekzamenas kaj aprobas la Forumo, eksigojn kaj eksigojn ekzamenas kaj aprobas la Kortumo, kiel estis ĝis nun antaŭvidite. La samtempa aparteno al aliaj organizoj, esperantistaj aŭ ne, ne malhelpas la aliĝon de establo al la Pakto.

Kiel aliĝi al la Pakto por la Esperanta Civito?

La Pakto por la Esperanta Civito ne estas asocio, sed kontrakto kiun diversaj establoj subskribis la 10an de aŭgusto 1998. Nur establoj, do neniu individuo, rajtas peti aliĝon, en kiu ajn momento. Se la 2an de junio 2001 naskiĝos la Esperanta Civito, individuoj rajtos peti la civitanecon, tra establo aliĝinta al la Pakto. Pri la civitaneco decidus la starigota Registro. La civitaneco estas principe dumviva, sed eblas rezigni pri ĝi aŭ perdi ĝin, kadre de la koncernaj normoj. La aliĝojn de nova establo al la Pakto aprobas la Forumo (kunveno de la paktintoj). Eksigojn kaj eksigojn verdiktas la Kortumo (arbitracia instanco), laŭ la peto de la koncernaj establoj. Aliĝpetojn por la Pakto oni direktu al "Pakto por la Esperanta Civito", CP 28, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando).

Sinteza provo

PROKLAMO DE VOSS (1991)

Akceptita en 25-a ILEI-konferenco, Voss, Norvegio

Esperanto kiel funkcia lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange gravas emfazi, ke Esperanto estas jam funkcia lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajtojn, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiĝinteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al la demokratiigo de la komunikado.

Esperanto kaj strategio

Kerne al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj. Evidentas unuflanke, ke klopodoj devigi la uzon de Esperanto desupre al iu nekonvinkita popolo ne nur fiaskos, sed estas kontraŭ la etika bazo de la lingvo. Klaras aliflanke, ke dum desuba laboro konstante necesas, de si mem ĝi malverŝajne kondukos al signifa kresko de la lingvo aŭ ĝia komunumo. Pli saĝa strategio estas la kombino de ambaŭ vojoj per zorge elektitaj projektoj, tiel ke la desupre akiritaj decidoj kaj permesoj renkontu desube kreitan deziron aŭ bezonon.

La celo al kvalito estas laŭdinda, sed necesas konstati, ke la kvalito plej ofte fontas el kvanto, kaj tiun kvanton povas krei la instruado, kadre de kiu apartan gravecon havas la adekvata kaj laŭeble oficiala trejnado de instruistoj.

Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajtojn de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu neniun specifan lingvon – naciaj lingvoj estas respektendaj, sendepende de grandeco. Esperantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkonstrui la mitojn kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

Esperanto kaj ĝia destino

